

eLIBRO

*Henri Bernardin
de Saint-Pierre*

Paŭlo
kaj
Virginio

I N K O

Henri Bernardin de Saint-Pierre (1737–1814)

PAŮLO KAJ VIRGINIO

El la franca tradukis Hector Hodler

Lingve reviziita en 2002

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-180-1

inko@omnibus.se

http://www.omnibus.se/inko

DECEMBRO 2002

Sur la orienta flanko de la monto staranta post la urbo *Port-Louis de la Ile-de France*, oni vidas, en iam kulturita kampo, ruinon de du malgrandaj kabanoj. Ili estas preskaŭ en la mezo de ebenaĵo ĉirkaŭata de grandaj ŝtonegoj kaj kiu havas nur unu malfermiĝon al la nordo. Oni vidas maldekstre la monton nomatan *Morne de la Découverte*, de kiu oni signalas la ŝipojn albordiĝantajn al la insulo — kaj, sub tiu monto, la urbon nomata *Port-Louis*; dekstre, la vojon kondukanta al la kvartalo *Pamplemousses*; poste la samnoman preĝejon, kiu staras kun siaj bambuejoj meze de granda ebenaĵo; kaj, pli malproksime, arbaron etendiĝanta ĝis la limo de la insulo. Oni distingas antaŭ si, sur la marbordo, la golfon *Tombo*; iom dekstre la promontoron *Malfeliĉa*, kaj trans ĝi la solan maron, kie aperas akvosupre kelkaj neloĝataj insuletoj, interalie *le Coin de Mire*, kiu similas bastionon inter la ondaro.

Ĉe la eniro al tiu ebenaĵo, de kiu oni vidas tiom da objektoj, la eĥoj de la monto senĉese ripetas la murmuron de la ventoj skuantaj la apudan arbaron kaj la bruegon de la ondoj frakasiĝantaj malproksime sur la rifo;

sed ĉe la kabanoj mem oni ne plu aŭdas ian bruon, kaj ĉirkaŭ si oni jam vidas nur grandajn ŝtonegojn, krutajn kiel murojn. Arboj kreskas ĉe ilia malsupro, en iliaj fendoj kaj eĉ sur ilia supro, kie haltas la nuboj.

Pluvoj, altiritaj de iliaj pintoj, ofte aperigas la kolorojn de ĉielarko sur iliaj verdaj kaj brunaj flankoj, kaj provizas malsupre la fontojn, el kiuj formiĝas la rivereto *Lantania*. Granda silento regas en tiu zono, kie kvieta estas ĉio, aero, akvaro kaj lumo. Apenaŭ eĥo tie ripetas la murmuradon de la palmoj kreskantaj sur la altaj plataĵoj kaj kies longajn pintojn oni vidas ĉiam balancatajn de la ventoj. Dolĉa heleco lumigas la fundon de tiu ebenaĵo, kie suno brilas nur tagmeze; sed jam en la matenruĝo ĝiaj radioj atingas ĝian ĉirkaŭaĵon, kies pintoj, starante super la ombroj de la monto, ŝajnas oraj kaj purpuraj sur la ĉiela bluaĵo.

Mi ŝatas iri al tiu loko, kie oni ĝuas samtempe vaste-gan vidaĵon kaj profundan solecon. Iun tagon, kiam mi sidis apud la kabanoj kaj rigardis ilian ruinaĵon, viro jam maljuneta okaze preteriris. Laŭ la kutimo de la malnovaj insulanoj, li estis vestita per mallonga brustumo kaj longa pantalono. Li marŝis nudpiede kaj apogis sin sur ebonligna bastono. Liaj haroj estis tute blankaj, lia fizionomio estis nobla kaj simpla. Mi respekte salutis lin. Li respondis mian saluton kaj, konsiderinte min dum kelka tempo, li proksimiĝis al mi kaj ekripozis sur la altaĵe-

to, kie mi sidis. — Instigita de tiu konfida signo, mi ekparolis al li:

”Patro,” mi diris, ”ĉu vi povus min sciigi pri la posedintoj de tiuj du kabanoj?” Li respondis: ”Filo, en tiuj kabanoj kaj la senkultura kampo antaŭ dudek jaroj loĝis du familioj, kiuj tie vivis feliĉe. Ilia historio estas kortuŝa; sed sur ĉi tiu insulo, situanta survoje al Hindujo, kiu eŭropano povas interesiĝi pri la sorto de kelkaj senfamaj privatuloj? La homoj volas scii nur pri la historio de alt-ranguloj kaj reĝoj, kiu servas por neniu.”

”Patro,” mi diris, ”laŭ via ŝajno kaj parolo mi facile konstatas, ke vi akiris grandan sperton. Se vi havas la necesan tempon, rakontu, mi petas, kion vi scias pri la homoj loĝintaj en ĉi tiu dezertaĵo, kaj kredu, ke eĉ homo plej malbonigita de la komunaj antaŭjuĝoj, ŝatas aŭdi pri feliĉo liverita de la naturo kaj de la virto.” Tiam, klopodante rememori pri diversaj okazintaĵoj, apoginte dum kelka tempo siajn manojn sur sian frunton, la maljunulo jene rakontis:

En jaro 1726-a, normanda junulo nomata sinjoro de La Tour, vane petinte militistan oficon en Francujo kaj helpon de sia familio, decidis veturi sur ĉi tiun insulon por riĉiĝi. Li havis kun si tre amatan kaj amantan edzinon. Ŝi estis el malnova kaj riĉa familio de lia provinco, sed li kaŝe kaj sendote edziĝis kun ŝi, ĉar la gepatroj de lia

edzino kontraŭis al tiu edziĝo, ĉar li ne estis nobela. Li lasis ŝin en *Port-Louis*, sur ĉi tiu insulo, kaj ŝipveturis al Madagaskaro, celante tie aĉeti kelkajn negrojn kaj tuj reveni por konstrui loĝejon. Li elŝipiĝis en Madagaskaro dum la malfavora sezono komenciĝanta en la mezo de oktobro; kaj baldaŭ post la alveno li mortis pro la pestecaj febroj, kiuj tie regas dum ses monatoj en ĉiu jaro kaj ĉiam malhelpos la tiean starigon de daŭraj eŭropaj kolonioj. La kunportitaj pakaĵoj estis disigitaj post lia morto, kiel ordinare okazas, kiam oni mortas ekster la patrujo. Lia edzino, restinta sur franca insulo, troviĝis vidvino, graveda, havanta nur unu negrinon kiel solan posedaĵon en lando, kie ŝi havis nek influon, nek rekomendon.

Volante nenion peti de iu ajn viro, post la morto de tiu, kiun sole ŝi amis, ŝi ĉerpis kuraĝon el sia malfeliĉo. Ŝi decidis kulturi kun sia sklavino malgrandan teraĵon por trovi tion, kio estas necesa por la vivo.

Sur preskaŭ dezerta insulo, kies tero estis laŭvole okupebla, ŝi elektis la parton nek plej fruktodonan nek plej favoran por la komercado; sed, serĉante montaran kavaĵon, kaŝan rifuĝejon, kie ŝi povos vivi sola kaj nekonsata, ŝi iris de la urbo al ĉi tiuj ŝtonegoj, por izoliĝi kvazaŭ en nesto. Rifuĝi en la plej sovaĝajn kaj dezertajn lokojn, tio estas instinkto komuna al ĉiuj estaĵoj sentemaj kaj suferantaj, kvazaŭ ŝtonegoj estus bariloj kontraŭ mal-

feliĉo, kvazaŭ la kvieteco de la naturo povus pacigi la malfeliĉajn animajn konfuzojn. Sed la Providenco, kiu helpas al ni, kiam ni bezonas nur necesaĵojn, difinis al sinjorino de La Tour bienon, kian povas doni nek riĉeco, nek altrangeco: tio estas amikino.

En tiu loko de unu jaro loĝis vigla, bona, sentema virino; ŝia nomo estis Margarito. Ŝi naskiĝis en Britujo, el simpla vilaĝana familio, kiu ŝin amegis kaj estus farinta ŝin feliĉa, se ŝi ne estus fidinta al najbara nobelo, kiu al ŝi promesis edziniĝon. Sed li, satiginte sian pasion, foriĝis de ŝi kaj eĉ rifuzis certigi nutraĵon por la infano, je kiu li gravedigis ŝin. Ŝi tiam decidis forlasi por ĉiam sian vilaĝon kaj kaŝi sian kulpaĵon en koloniojn, for de sia patrolando, kie ŝi perdis la solan doton de malriĉa kaj honesta fraŭlino, la bonfamon. Maljuna negro, kiun ŝi aĉetis per iom da prunteprenita mono, kulturis kun ŝi anguleton en ĉi tiu insula parto.

Sinjorino de La Tour, akompanata de sia negrino, trovis en tiu loko Margariton, kiu mamnutris sian filon. Ŝi ĝojis renkonti virinon en stato, kiun ŝi opiniis simila al sia. Per malmultaj vortoj ŝi rakontis pri sia estinta stato kaj estantaj bezonoj. Margarito estis kortuŝita de la rakonto de sinjorino de La Tour; kaj dezirante meriti ŝian konfidon pli ol ŝian estimon, konfesis senkaŝe sian kulpan nesingardemon. "Mi," ŝi diris, "mi meritis mian sorton; sed vi sinjorino ... vi, saĝa kaj malfeliĉa!" kaj ploran-

te, ŝi proponis sian kabanon kaj amikecon. Sinjorino de La Tour, kortuŝita de tiel amema bonakcepto, diris, ĉirkaŭpremante ŝin en siaj brakoj: "Ha! Dio volas fini mian ĉagrenon, ĉar ĝi inspiras al vi pli multe da boneco ol mi iam mi trovis ĉe miaj parencoj."

Mi konis Margariton; kaj kvankam mi loĝas je mejlo kaj duono de ĉi tie, en la arbaro, post Longa monto, mi tamen konsideris min ŝia najbaro. En la eŭropaj urboj strato aŭ simpla muro malhelpas samfamilianojn kunveni dum tutaj jaroj; sed en la novaj kolonioj oni konsideras najbaroj homojn, de kiuj oni estas apartigata nur per arbaroj aŭ montoj. Precipe en la tiama tempo, kiam ĉi tiu insulo malmulte komercis kun Hindujo, simpla najbareco estis kaŭzo por amikiĝo, kaj gastado al fremduloj estis devo kaj plezuro. Kiam mi eksciis, ke mia najbarino havas kunulinon, mi vizitis ŝin, por laŭeble utili al ambaŭ. Mi trovis, ke sinjorino de La Tour estas interesa, nobla kaj melankolia persono. Ŝi estis tiam baldaŭ akuŝonta. Mi diris al tiuj du sinjorinoj, ke konvenas, por la bono de iliaj infanoj kaj precipe por malhelpi la enloĝiĝon de iu alia, ke ili dividu inter si la fundon de ĉi tiu ebenaĵo, kiu konsistas el proksimume dudek "arpenoj" da tero. Ili fidis al mi por tiu divido. Mi formis du preskaŭ egalajn partojn: unu enhavis la supran parton de tiu zono, komence de tiu ŝtona pinteĝo kovrata de nuboj, el kiu eliras la rivero *Latania*, ĝis tiu krutega malfer-

maĵo en la supro de la monto, kaj kiun oni nomas *la Pafejo*, ĉar ĝi efektive similas paffenestron por pafilego. La fundo de tiu tero estas tiel plena de ŝtonoj kaj sulkaĵoj, ke oni apenaŭ povas marŝi; tamen ĝi produktas grandajn arbojn kaj estas kovrata de fontoj kaj malgrandaj riveretoj.

En la alian parton mi enmetis la tutan malsupran parton sterniĝantan laŭ la rivero *Latania* ĝis ĉi tiu malfermaĵo, kie ni staras, kaj kie la rivero komencas flui inter du montetoj ĝis la maro. Vi tie vidas kelkajn herbejrandojn kaj teron sufiĉe ebenan, sed ne pli bonan ol la alia; ĉar dum la pluva sezono ĝi fariĝas marĉa — kaj dum la seka tempo ĝi estas malmola kvazaŭ plumbo: kiam oni volas fosi, oni estas devigata ĝin hakiltranĉi.

Farinte tiun dividon, mi admonis ambaŭ sinjorinojn, ke ili lotu. La supran parton havis sinjorino de La Tour kaj la malsupran Margarito. Ambaŭ estis kontentaj pri sia lotaĵo; sed ili petis, ke mi ne dispartigu iliajn loĝejoj, por ke, ili diris, "ni povu ĉiam vidi kaj helpi unu la alian."

Tamen ĉiu el ili devis havi privatatan hejmon. La dometo de Margarito sidis meze de la ebenaĵo, ĝuste sur la limo de ŝia terparto. Mi konstruis tute apude, sur la teraĵo de sinjorino de La Tour alian dometon; tiamaniere ambaŭ amikinoj estis samtempe najbaraj kaj restis sur sia posedaĵo. Mi mem hakis palisarojn sur la monto; mi

alportis lataniajn foliojn de la marrando por konstrui tiujn du kabanojn, kie vi nun vidas nek pardon, nek tegmenton. Ve! tro multe restas ankoraŭ por mia memoro. La tempo, kiu tiel rapide detruas la monumentojn de la imperiestroj, ŝajnas respekti en ĉi tiu dezerto la konstruaĵojn de amikeco, por daŭrigi miajn bedaŭrojn ĝis la fino de mia vivo. Apenaŭ la dua kabano estis finita, sinjorino de La Tour naskis filinon. Mi estis baptopatro de la filo de Margarito, nomata Paŭlo. Sinjorino de La Tour petis ankaŭ, ke mi nomu ŝian filinon kune kun ŝia amikino. Tiu ĉi nomis ŝin Virginio: "Ŝi estos virta," ŝi diris, "kaj ŝi estos feliĉa. Mi estis malfeliĉa, nur kiam mi malzorgis la virton."

Kiam sinjorino de La Tour restariĝis, tiuj du bienetoj komencis iom fruktodoni pro mia zorgetado kaj precipe dank'al la diligentaj laboroj de la gesklavoj: la negro de Margarito, nomata Domingo, estis jolovo, ankoraŭ forta, kvankam jam maljuneta. Li estis sperta kaj nature bonjuĝema. Li kulturis sen diferenco sur la du bienoj la terojn ŝajne plej fruktodonajn kaj enmetis la plej taŭgajn semojn. Li metis milion kaj maizon en la malbone taj lokoj, iom da tritiko en la bonaj teroj, rizon en la marĉaj malaltaĵoj, kaj apud la ŝtonegoj diversajn kukurbojn kaj kukumojn, kiuj sin ligas al ili. En la sekaj lokoj li plantis patatojn, kiuj fariĝas tie tre sukeraj; kotonarbojn sur la altaĵoj, sukerkanojn en la fortaj teroj, kafarbojn sur

la montetoj, kie la grajno estas malgranda, sed bonega; laŭlonge de la rivero kaj ĉirkaŭ la dometoj bananarbojn, kiuj liveras dum la tuta jaro longajn fruktarojn kaj belan ombron; kaj fine kelkajn tabakŝtipojn por distri la zorgojn de si mem kaj de la bonaj mastrinoj. Li hakis brullignon sur la monto kaj disrompis ŝtonojn tie ĉi kaj tie por ebenigi la vojojn. Li faris ĉiujn laborojn vigle kaj taŭge, ĉar li faris ilin fervore.

Li estis tre korligita al Margarito kaj ankaŭ al sinjorino de La Tour, kun kies negrino li edziĝis post la naskiĝo de Virginio. Li pasie amis sian edzinon, nomatan Mario; ŝi naskiĝis en Madagaskaro, kie ŝi estis iom edukita pri laborado, precipe pri farado de korboj kaj teksado de ŝtofoj per herboj kreskantaj en arbaroj; ŝi estis lerta, pura kaj tre fidela; ŝia tasko estis preparado de manĝaĵoj, zorgo pri kelkaj kokinoj kaj de tempo al tempo ŝi iris al *Port-Louis* por vendi la malgrandan superfluaĵon de ambaŭ loĝejoj. Aldonu al tio du kaprinojn vivantaj kune kun la infanoj kaj dikan hundon, kiu atentis ekstere pri la domoj dum la nokto, — kaj vi havos ideon pri la tuta produktaĵo kaj mastraĵo de tiuj du bienetoj.

La amikinoj ŝpinis kotonon dum la tago. Tiu laboro liveris sufiĉe por la bezonoj de ili kaj iliaj familioj, — sed cetere al ili tiel mankis ĉiuj flankaj oportunaĵoj, ke ili marŝis nudpiede en sia loĝejo kaj vestis ŝuojn nur dimanĉe frumatene por iri al la meso en la preĝejo de

Pamplémousses, kiun vi povas vidi tie malproksime. Tamen ĝi estas multe pli malnajbara ol *Port-Louis*, sed la sinjorinoj malofte iris en tiun urbon, timante, ke oni malŝatos ilin, ĉar ili estas vestitaj per dikaj bluaj bengalaj tolaĵoj, kvazaŭ sklavinoj. Cetere, ĉu la publika estimo egalvaloras hejman feliĉon? Se tiuj sinjorinoj iom suferis ekstere, ili revenis hejmen kun des pli granda plezuro. Apenaŭ Mario kaj Domingo ilin ekvidis de tiu altaĵeto, sur la vojo al *Pamplémousses*, ili alkuris malsupren por ilin helpi dum la suprenirado. Ili vidis en la okuloj de siaj sklavoj, kiom tiuj ĉi ĝojas pro ilia reveno. Hejme ili trovis purecon, liberecon, posedaĵon akiritan nur per sia propra laboro, kaj fervorajn, amemajn servistojn. Ili mem, kunigitaj de samaj bezonoj, suferinte preskaŭ la samajn malfeliĉojn, nomis unu la alian per la dolĉaj nomoj amikino, kunulino, fratino, kaj havis nur unu volon, unu intereson, unu tablon. Inter ili ĉio estis komuna. Sed se malnovaj sentoj, pli vivaj ol la sentoj de la amikeco, revekiĝis en ilia animo, tiam pura religio, helpata de ĉastaj moroj, gvidis ilin al alia vivado, same kiel flamo leviĝas al la ĉielo, kiam ĝi ne havas plu ian nutrilon sur la tero.

La naturaj devoj ankaŭ pliigis la feliĉon de ilia kunestado. Ilia reciproka amikeco plivarmiĝis je la vido de iliaj infanoj, fruktoj de amo same malfeliĉa. Plezurigis ilin meti ilin en la saman banon, kaj kuŝigi en la saman

lulilon. Ofte ili mamŝanĝis ilin. "Amikino," diris sinjorino de La Tour, "ĉiu el ni havos du infanojn kaj ĉiu el niaj infanoj havos du patrinojn." Kiel du burĝonoj restantaj sur du samspecaj arboj, kies ĉiujn branĉojn rompis ventego, produktas pli dolĉajn fruktojn, se ĉiu el ili, disigitata de la patra trunko, estas enŝovita en la najbaran trunkon: tiel same tiuj infanetoj, senigitaj de ĉiuj parencoj, fariĝis pli amplenaj ol gefiloj, ol gefratoj, kiam la naskintaj amikinoj ilin mamŝanĝis. Jam iliaj patrinoj preparolis ilian geedziĝon, apud iliaj luliloj, kaj tiu antaŭrigardo al geedza feliĉo, per kiu ili distris sian propran malĝojon, tre ofte elvokis poste iliajn larmojn, ĉar unu memoris, ke ŝia malfeliĉo devenis de la needziniĝo, kaj la alia, de la edziniĝo; unu, ĉar ŝi volis superi sian rangon, la alia, ĉar ŝi delasiĝis. Sed ili konsolis sin, pensante ke iam iliaj infanoj, pli feliĉaj, ĝuos for de la kruelaj eŭropaj antaŭjuĝoj samtempe la plezurojn de amo kaj la feliĉon de egaleco.

Nenio ja estis komparebla kun ilia jama amikeco. Se Paŭlo ekplendis, oni montris al li Virginion; ŝin vidante, li ridetis kaj kvietiĝis. Se Virginio suferis, la krioj de Paŭlo sciigis pri tio; sed tiu amindulino tuj malmontis sian suferon, por ke li ne ĉagreniĝu pro ŝia doloro. Kiam mi alvenis, mi ĉiam vidis ilin ambaŭ, tute nudajn, laŭ la landa kutimo; ili kapablis apenaŭ paŝi, kaj tenis unu la alian per la manoj kaj sub la brakoj, kiel oni prezentas la ste-

laron de la Ĝemeloj. Eĉ dum nokto ili ne disiĝis, oni ofte trovis ilin kuŝantaj en la sama lulilo, vango ĉe vango, brusto ĉe brusto, kun la manoj reciproke ĉirkaŭprenantaj iliajn kolojn: ili dormis inter la brakoj unu de la alia.

Kiam ili komencis paroli, la unuaj nomoj, kiujn ili uzis, estis "frato" kaj "fratino." La infaneco, kiu konas pli amemajn karesojn, ne konas pli dolĉajn nomojn. La edukado pliigis ilian amikecon, ĝin utiligante por iliaj reciprokaj bezonoj. Baldaŭ ĉio rilatanta la mastrumadon, purecon, preparadon de modesta manĝo, estis la laborkampo de Virginio, kaj ŝiaj laboroj ĉiam elvokis la laŭdojn kaj kisojn de ŝia frato. Li senĉese agis; li fosis en la ĝardeno kun Domingo aŭ, kun hakileto en la mano, li sekvis lin en la arbarojn; kaj, se dum tiuj iroj, bela floro, bona frukto aŭ birdnesto aperis antaŭ li, por ilin alporti al sia fratino li tuj surrampis la arbon, eĉ se ili estis sur ĝia supro.

Kiam oni renkontis unu el ili en iu loko, oni estis certa, ke la alia ne estas malproksima. Iun tagon, kiam mi mal-supreniris de la pinto de ĉi tiu monto, mi ekvidis ĉe la ĝardenlimo Virginion kuranta hejmen, kun la kapo kovrita per sia jupo, kiun ŝi levis malantaŭe por sin ŝirmi kontraŭ pluvego.

Estante malproksime, mi kredis, ke ŝi estas sola, sed alirinte por helpi al ŝi, mi vidis, ke per la brako ŝi tenas

Paŭlon, preskaŭ tute envolvitan en la sama ŝirmilo, ridante ambaŭ pro la elpenso de tiu nova pluvombrelo. Tiuj du ĉarmaj kapoj, sub tiu ŝvelblovata jupo, rememorigis min pri la infanoj de Leda, enfermitaj en la sama konko.

Ilia sola zorgo estis plaĉi unu la alian kaj sin interhelpi. Cetere ili estis malkleraj kiel kreoloj kaj sciis nek legi, nek skribi. Ili ne okupis sin pri tio, kio okazis en la antikva kaj malproksima tempo: ilia scivolemo ne celis trans tiun ĉi monton. Ili kredis, ke la mondo finiĝas tie, kie limiĝas ilia insulo, kaj ili ne imagis ion ameban en loko, kie ili ne estas. Ilia reciproka amo kaj la amo al la patriroj sole okupis ilian animan agemon. Neniam senutilaj sciencoj ilin plorigis; neniam lecionoj de malgaja moralo ilin enuigis. Ili ne sciis, ke oni ne rajtas ŝteli, ĉar ĉio inter ili estis komuna; nek ke oni ne rajtas esti malsobra, ĉar ili havis laŭvole simplajn nutraĵojn; nek esti mensogema, ĉar ili bezonis nenion kaŝi. Neniam oni terurigis ilin, dirante, ke Dio severege punos la sendankajn infanojn; ĉe ili la filan amon naskis la amo patrina. Oni instruis al ili pri religio nur tion, kio faras ĝin aminda, — kaj se ili ne preĝis longtempe en la preĝejo, ĉie kie ili estis, en la domo, sur la kampoj, en la arbaroj, ili levis al la ĉielo senkulpajn manojn kaj prezentis koron plenan de amo al siaj patrinoj.

Tiel forpasis ilia plej juna infaneco, kiel bela tagiĝo anoncanta belan tagon. Jam ili kun siaj patrinoj partoprenis en la mastrumaĵoj. Tuj kiam la koka krio anoncis la revenon de la matenruĝo, Virginio leviĝis, ĉerpis akvon el proksima fonto kaj reiris hejmen por prepari la matenmanĝon. Poste, kiam la suno ornamis la pintojn de tiu montozono, Margarito kaj ŝia filo iris al sinjorino de La Tour; tiam ili ĉiam kune komencis preĝon sekvan de matenmanĝo; ofte ili faris tion sidante antaŭ la pordo, sur herbo, sub laŭbo de bananarboj, kiuj liveris al ili samtempe tute pretan manĝaĵon per siaj nutremaj fruktoj, kaj tablotukojn per siaj longaj, larĝaj, glataj folioj. Saniga kaj malmanka nutraĵo rapide kreskigis la korpojn de tiuj gejunuloj, kaj dolĉa edukado montris en ilia fizionomio la purecon kaj kontentecon de ilia animo. Virginio estis nur dekdujara; ŝia talio jam estis pli ol duone formita; grandaj blondaj haroj ombris ŝian kapon; ŝiaj bluaj okuloj kaj kvazaŭ koralaj lipoj plej agrable brilis sur ŝia juneca vizaĝo; ili ĉiam akordiĝe ridetis, kiam ŝi parolis; sed kiam ŝi silentis, ilia natura klineco al la ĉielo faris ilin tre sentesprimaj kaj eĉ iom melankoliaj. La vira karaktero de Paŭlo montriĝis jam en la fraŭliĝaj ĉarmoj. Lia talio estis pli alta ol la talio de Virginio; lia vizaĝa koloro pli bruna, lia nazo pli agleca kaj liaj nigraj okuloj estus estintaj iom fieremaj, se la kvazaŭ penikaj forradiantaj okulharoj ne farus ilin plej dolĉegaj. Kvankam

li ĉiam movis sin, tuj kiam lia fratino aperis, li trankviligis kaj sidiĝis apude. Ofte ili nenion diris dum la tuta manĝo. Pro ilia silentado, pro la naiveco de ilia sinteno, pro la beleco de iliaj nudaj piedoj, oni kredus vidi antikvan statuaron el blanka marmoro, prezentanta kelkajn el la infanoj de Niobo; sed laŭ iliaj renkontiĝemaj rigardoj, iliaj ridetoj respondataj per pli amaj ridetoj, oni povus ilin konsideri kiel tiujn infanojn de la ĉielo, kiel tiujn feliĉajn spiritojn, kies esenco estas amo, kaj kiuj ne bezonas esprimi la senton per pensoj kaj la amikecon per vortoj.

Tamen sinjorino de La Tour, vidante ke ŝia filino tiel ĉarmoplene kreskas, sentis, ke ŝia malkvieteco pliiĝas kun ŝia amemo; ŝi diris al mi kelkfoje: "Se mi mortus, kio okazus al la malriĉa Virginio?"

Ŝi havis en Francujo onklinon, nobelan, riĉan, maljunan kaj pieman, kiu tiel malkompate rifuzis helpon, kiam ŝi edziniĝis kun sinjoro de La Tour, ke ŝi promesis nenion plu peti de ŝi, en kia ajn okazo. Sed iĝinte patriino, ŝi ne timis plu honton de forrifuzoj. Ŝi skribis al sia onklino pri la neatendita morto de ŝia edzo kaj la embaraso, en kiu ŝi estas, senhelpa, for de sia patrujo kaj ŝarĝata de infano. Ŝi ne ricevis respondon. Antaŭe fieranima, ŝi ne ŝanceliĝis humiligi sin kaj maltimis la riproĉojn de sia parencino, kiu neniam estis pardoninta ŝian edziniĝon kun viro nenobela, kvankam virta. Ŝi do skribis al

ŝi, uzante ĉiujn okazojn por vekii ŝian kompaton al Virginio. Sed multaj jaroj pasis, kaj ŝi ne ricevis ian memorsignon de ŝi.

Fine, en 1738, tri jarojn post la alveno de sinjoro de La Bourdonnais sur ĉi tiun insulon, sinjorino de La Tour eksciis, ke tiu insulestro havas leteron de ŝia onklino por transdoni al ŝi. Tuj ŝi kuris al *Port-Louis*, ne timante nun sin montri en malbona vestaĵo, ĉar la patrino ĝoje maltimigas la mokon. — Sinjoro de La Bourdonnais efektive donis al ŝi leteron de ŝia onklino. Tiu ĉi sciigis al ŝia nevino, ke ŝi tute meritas sian sorton, ĉar ŝi edziniĝis kun aventuristo, diboĉulo; ke la pasioj entenas sian propran punon, ke la frutempa morto de ŝia edzo estis justa puno de Dio; ke ŝi pli bone agis, forirante en koloniojn ol se ŝi estus restinta en Francujo por tie senhonorigi sian familion; ke ŝi entute estas en taŭga lando, kie ĉiuj riĉiĝas, escepte la maldiligentuloj. Tiel riproĉante, ŝi fine laŭdis sin mem: por eviti, ŝi diris, la ofte malfeliĉajn sekvojn de geedzeco, ŝi ĉiam rifuzis edziniĝi. La vera afero estis, ke, ambiciema, ŝi volis edziniĝi nur kun nobelego; sed kvankam en la kortego oni indiferentas pri ĉio, escepte de la mono, neniu volis ligiĝi kun tiel malbela kaj senkora fraŭlino, malgraŭ ŝia riĉegeco. Ŝi aldonis en postskribo, ke tamen ŝi forte rekomendis ŝin al sinjoro de La Bourdonnais. Efektive ŝi rekomendis ŝin, sed, laŭ la nuna ofta kutimo, kiu faras la protektanton pli timin-

da ol estus vera malamiko: por pravigi antaŭ la insules-tro sian malbonkorecon por sia nevino, ŝi kalumniis ŝin, ŝajnante ŝin kompati.

SinJORINO de La Tour, kiun neniu indiferentulo povis vidi seninterese aŭ senrespekte, estis severe akceptita de sinJORO de La Bourdonnais antaŭavertita kontraŭ ŝi. Li respondis nur per malafablaj vortetoj al ŝia klarigo pri la stato de ŝia familio: "Mi vidos ... ni vidos ... post ia tempo ... multaj malfeliĉuloj estas ... kial kolerigi tiel respek-tindan onklinon? ... Vi estas la malpravulino."

SinJORINO de La Tour reiris hejmen kun la koro plena de doloro kaj maldolĉeco. Alveninte, ŝi sidiĝis, sur la ta-blon ĵetis la leteron de sia onklino kaj diris al la amiki-no: "Jen la sekvo de dek unu jaroj da paciencado!" Sed, ĉar en la aro nur sinJORINO de La Tour sciis legi, ŝi repre-nis la leteron kaj legis ĝin antaŭ la tuta kunveninta fami-lio. Apenaŭ ŝi finis, Margarito tuj ekkriis: "Ĉu ni bezonas viajn parencojn? Ĉu Dio nin forlasis? Ĝi sola estas nia patro. Ĉu ni ne vivis feliĉe ĝis nun? Kial do ĉagreniĝi? Vi ne havas kuraĝon." — Kaj vidante, ke sinJORINO de La Tour ploras, ŝi ĉirkaŭprenis ŝin en siaj brakoj: "Kara ami-kino!" ŝi kriis, "kara amikino!" — Sed ŝiaj propraj ekplo-roj konfuzis ŝian voĉon. Vidante tion, Virginio, ekplore-gante, premis alterne la manojn de sia patrino kaj de Margarito kontraŭ sian buŝon kaj bruston; kaj Paŭlo, kun koleregaj okuloj, kriis, krispis la pugnojn, piedbatis,

ne sciante kiun ataki. Je tiu bruado, Domingo kaj Mario alkuris, kaj en la dometo oni aŭdis nur tiujn dolorkriojn: "Ha! ... sinjorino! ... bona mastrino! ... patrino! ... ne ploru!" Tiel dolĉaj amikaĵoj forigis la ĉagrenon de sinjorino de La Tour; ŝi ĉirkaŭprenis Paŭlon kaj Virginion kaj diris kontente: "Infanoj miaj, vi estas la kaŭzo de mia ĉagreno; sed vi estas mia ĝojo. Ho! karaj infanoj, la malfeliĉo venis al mi nur de malproksime; la feliĉo estas tute apud mi." Paŭlo kaj Virginio ne komprenis; sed kiam ili vidis ŝin trankvila, ili ridetis kaj karesis ŝin. Tiel ili daŭrigis la feliĉan vivadon kaj tio ĉi restis nur kvazaŭ fulmotondro dum bela sezono.

La bonaj emoj de tiuj infanoj ĉiutage pliiĝis. Iun dimanĉon, je matenruĝo, kiam la patrinoj estis foririntaj al la preĝejo *Pamplemousses* por la unua meso, forkurinta negrino aperis sub la bananarbojn ĉirkaŭ la loĝejo; ŝi estis malgrasega kvazaŭ skeleto, kaj estis vestita nur de viŝtuka peco metita ĉirkaŭ la lumboj. Ŝi ĵetis sin al la piedoj de Virginio, kiu preparis la familian matenmanĝon, kaj diris: "Juna fraŭlino, kompatu al mizera forkurinta sklavino; de unu monato mi vagas sur tiuj montoj, turmentata de malsato, ofte persekutata de ĉasistoj kaj iliaj hundoj. Mi forkuris de mia mastro, riĉa loĝanto ĉe la Nigra rivero; li agis kun mi, kiel vi povas vidi." Kaj samtempe ŝi montris sian korpon strekita de profundaj cikatroj kaŭzitaj de skurĝobatoj. Poste ŝi aldonis: "Mi volis

dronigi min; sed eksciinte, ke vi loĝas ĉi tie, mi diris: ĉar ekzistas ankoraŭ bonaj blankuloj en ĉi tiu lando, mi ne bezonas ankoraŭ morti.” Virginio, tute kortuŝita, respondis: ”Rekuraĝiĝu, malfeliĉulino! Manĝu, manĝu!” Kaj ŝi donis la preparitan matenmanĝon. En kelkaj momentoj la sklavino ĝin tute englutis. Virginio, vidante, ke ŝi estas satigita, diris: ”Malfeliĉa virino! Mi intencas peti pardonon de via mastro; vidante vin, li kompatos; ĉu vi volas, ke mi konduku vin al li?”

”Anĝelo de Dio,” respondis la negrino, ”mi sekvos vin kien ajn.” Virginio vokis sian fraton kaj petis, ke li ŝin akompanu. La forkurinta sklavino kondukis ilin laŭ mezarbaraj vojetoj, tra altaj montoj, kiujn ili malfacile suriris kaj larĝaj riveroj, kiujn ili trairis.

Fine, en la tagmezo, ili alvenis malsupren de monteto, ĉe la rando de Nigra rivero. Ili tie vidis bone konstruitan domon, grandegajn plantejojn kaj multajn sklavojn okupatajn per ĉiuspecaj laboroj. Ilia mastro promenis inter ili, kun pipo en la buŝo kaj stangeto en la mano. Li estis altkreska, malgrasa, olivkolora kun kavaj okuloj kaj nigraj unuiĝantaj brovoj. Virginio, kortuŝata, tenante Paŭlon ĉe la mano, alproksimiĝis al la mastro kaj petis, ke li pardonu al sia sklavino, kiu staras kelkajn paŝojn poste. La mastro unue ne multe atentis tiujn malriĉe vestitajn infanojn; sed, kiam li rimarkis la elegantan talion de Virginio, ŝian belan blondan kapon sub blua ĉapelo

kaj aŭdis la dolĉan sonon de ŝia voĉo, tremanta, kiel ŝia tuta korpo, kaj petanta tiun pardonon, li deprenis sian pipon el la buŝo kaj, levante sian bastonon al la ĉielo, li ĵuris, kun terura blasfemo, ke li pardonas sian sklavinon, ne pro amo al Dio, sed pro amo al ŝi. Virginio tuj signalis al la sklavino, ke ŝi aliru sian mastron, kaj ŝi forkuris, sekvata de Paŭlo.

Ili kune resupreniris la flankon de la monteto, de kiu ili venis, ĉe ĝia supro ili sidiĝis sub arbon, premitaj de laceco, soifo kaj malsato. Ili marŝis, ne ekmanĝinte, pli ol kvin leŭkojn* de la sunleviĝo. Paŭlo diris al Virginio: "Fratino mia, estas pli ol tagmeze: vi malsatas kaj soifas; ni ne trovos nutraĵon tie ĉi; ni remalsupreniru la monton kaj petu manĝaĵon de la mastro de la sklavino."

"Ho! ne! amiko," respondis Virginio, "li tro timigis min. Rememoru tion, kion diras kelkfoje nia patrino: La pano de la malbonulo plenigas la buŝon per ŝtonaĵo."

"Kion do ni faru," diris Paŭlo; "tiuj ĉi arboj produktas nur malbonajn fruktojn; ne estas eĉ tamarindo-citrono por vin sensoifigi."

"Dio kompatos al ni," diris Virginio; "li aŭdas la birdetojn, kiuj petas nutraĵon." Apenaŭ ŝi diris tiujn vortojn, ili aŭdis bruon de fonto falanta el najbara ŝtonego. Ili kuris al ĝi kaj, sensoifiginte sin per ĝia kristalklara

* Ĉirkaŭ 20 kilometroj; *leŭko* estas malnova spacmezuro.

akvo, ili kolektis kaj manĝis iom da kreso kreskanta sur ĝiaj bordoj.

Rigardante ĉi tien kaj tien, ĉu ili trovos ian pli nutran manĝaĵon, Virginio ekvidis junan palmon inter la arboj. La brasiko, kiun entenas la supro de tiu arbo inter siaj folioj, estas tre bona manĝaĵo; sed kvankam la arbotrunko ne estis pli dika ol kruro, tamen ĝi estis alta pli ol sesdek futojn. Vere, la ligno de tiu arbo konsistas nur el fadenaĵaro; sed ĝia alburno estas tiel malmola, ke ĝi malakrigas la plej bonajn hakilojn, kaj Paŭlo eĉ ne havis tranĉilon. Li pensis ekbruligi la malsupron de tiu palmo: alia embaraso; li ne havis fajroŝtonon, kaj cetere en tiu tiel ŝtonplena insulo, oni apenaŭ povus trovi fajroŝtonon. Neceso kreas lertecon kaj ofte la plej utilajn eltrovaĵojn ni ŝuldas al la plej mizeraj homoj. Paŭlo decidis bruligi fajron laŭ la negra maniero; per ŝtonkojno li faris trueton en tre sekan branĉon, kiun li metis sub siaj piedoj; poste, per la tranĉado de tiu ŝtono, li pintigis alian sekan sed alilignan branĉaĵon; li poste metis tiun pintan lignaĵon en la trueton de lia subpieda branĉo, kaj ĝin rapide turnis en siaj manoj, tute kiel oni ruligas turnkrucon por ŝaŭmigi ĉokoladon; post malmulte da tempo fumo kaj fajreroj eliris el la kuntuŝa punkto. Li kolektis sekajn herbojn kaj aliajn branĉojn kaj ekbruligis la malsupron de la palmo, kiu baldaŭ frakase falis. La fajro ankaŭ utilis al li por senigi la brasikon de ĝiaj longaj, lig-

necaj kaj pikemaj folioj. Virginio kaj li manĝis parton de tiu brasiko krude kaj la alian post kuiro sur cindro, kaj ili trovis ambaŭ same tre bongustajn. Ili faris tiun simplegan manĝon, ĝojigitaj de la memoro pri la bona ago matene farita; sed tiun ĝojon konfuzis la nedubebla malkvieteco de iliaj patrinoj pro tiu longa foresto. Virginio ofte parolis pri tio. Tamen Paŭlo, kiu sin sentis denove forta, certigis, ke ili tuj trankviligos siajn familiojn.

Post la tagmanĝo ili estis tre embarasitaj, ĉar ili ne havis plu gvidanton por ilin rekonduki hejmen. Paŭlo, kiu miris pro nenio, diris al Virginio: "Nia dometo sidas ĉe la flanko de la tagmeza suno, same kiel hodiaŭ matene, ni devas suriri la tripintan monton, kiun vi povas vidi tie. Nu, ni marŝu, amikino." Tiun monton oni nomas la *Tri mamoj**, ĉar ĝiaj pintoj estas mamformaj. Ili do malsupreniris la monteton de la Nigra rivero norde, kaj alvenis post unu horo sur la randon de larĝa rivero, baranta la vojon. Tiu insula parto, tute kovrata de arbaroj, estas tiel malmulte konata, eĉ nuntempe, ke multaj el ĝiaj riveroj kaj montoj eĉ ne havas ankoraŭ nomon. La

* Ekzistas multaj montoj, kies supro estas ronde mamforma, kaj estas tiamaniere nomataj en ĉiuj lingvoj. Ili ja estas veraj mamoj, ĉar el ili elfluas multe da riveroj kaj riveretoj alportantaj fruktadon sur la teron. Ili estas deirejo de la ĉefaj riveregoj banantaj la teron, kaj senĉese liveras la necesan akvokvanton, altirante nubojn ĉirkaŭ la ŝtonegan pintegon, kiu superas ilian centron, kvazaŭ mampinto. Mi jam montris tiajn admirindajn antaŭaranĝojn de la naturo en antaŭa libro.

rivero, sur kies bordo ili estis, ŝaŭme fluis sur ŝtonoj. La bruo de la akvo timigis Virginion; ŝi ne kuraĝis trairi piede la riveron. Tiam Paŭlo prenis Virginion sur sian dorson kaj, tiel ŝarĝita, paŝis sur la glitigaj riveraj ŝtonegoj, malgraŭ la bruego de la akvo.

”Ne timu,” li diris, ”kun vi, mi sentas min forta. Se la loĝanto de la Nigra rivero estus al vi rifuzinta pardonon al sia sklavino, mi estus batiĝinta kun li.”

”Kiel,” diris Virginio, ”kun tiel alta kaj malbona viro? Al kia danĝero mi vin elmetis! Dio mia! Kiel malfacile estas fari la bonon! Nur la malbono estas facile farebla.”

Kiam Paŭlo alvenis sur la riveran bordon, li volis daŭrigi la iradon, ŝarĝita de sia fratino, kaj li esperis supreniri la monton Trimaman, kiun li vidis je duona mejlo antaŭ si; sed baldaŭ la fortoj mankis kaj li devis ŝin meti teren kaj ripozi apude. Virginio tiam diris: ”Frato, la tago mallumiĝas; vi havas ankoraŭ forton, dum la mia ekmankas; lasu do min ĉi tie kaj reiru sola hejmen por trankviligi niajn patrinojn.”

”Ho! ne,” diris Paŭlo, ”mi ne lasos vin. Se noktiĝas, dum ni estas en ĉi tiu arbaro, mi ekbruligos fajron, mi faligos palmon, vi manĝos ĝian brasikon kaj per ĝiaj folioj mi faros al vi rifuĝejon.” Tamen Virginio, iom ripozinte, kolektis sur trunko de maljuna arbo, klininta sur la riverbordo, longajn *skolopendrajn* (cervlangajn) foliojn, kiuj kreskis el ĝia trunko; ŝi faris el tio kvazaŭ-

ŝuetojn, per kiuj ŝi ĉirkaŭis siajn piedojn, vunditajn de la vojŝtonoj; ĉar, pro sia rapidemo esti utila al la sklavino, ŝi forgesis vesti la piedojn. Sentante, ke la malvarmeteco de tiuj folioj refortigas ŝin, ŝi rompis bambuan branĉon kaj ekmarŝis, sin apogante per unu mano sur tiun kanon kaj per la alia sur sian fraton.

Tiamaniere ili malrapide vojiris tra la arbaro; sed la alteco de la arboj kaj la denseco de la foliaro baldaŭ kaŝis al iliaj okuloj la monton Trimaman, al kiu ili celis, kaj eĉ la subirantan sunon. Post kelka tempo ili senrimarke forlasis la surmarŝitan vojeton, kiun ili ĝis tiam sekvis kaj ili troviĝis en senelireja kvazaŭlabirinto da arboj, lianoj kaj ŝtonegoj. Paŭlo, tre ekscitita, sidigis Virginion kaj serĉis ĉi tie kaj tie vojon el tiu dika densaĵo; sed li vane laciĝis. Li supreniris altan arbon, por almenaŭ ekscii, kie estas la monto Trimama, sed li vidis ĉirkaŭ si nur arbopintojn, de kiuj kelkaj estis lumigataj de la lastaj radioj de la subiranta suno. La ombro de la montoj jam kovris la arbaron en la valoj; la vento kvietiĝis, kiel okazas ĉe la subiro de la suno; mallaŭta silento regas en tiuj izolejoj kaj oni aŭdis nur blekojn de cervoj, serĉantaj rifuĝejon en tiuj senhomaj lokoj. Paŭlo, esperante, ke iu ĉasisto povos lin aŭdi, kriis laŭ sia tuta forto: "Venu, helpu al Virginio!" Sed nur eĥoj de la arbaro respondis lian voĉon kaj multfoje ripetis: "Virginio! ... Virginio!"

Premita de laceco kaj ĉagreno, Paŭlo tiam malsupreniris la arbon: li serĉis rimedon por tie pasigi la nokton; sed estis nek fonto, nek palmo, eĉ ne seka ligna branĉaĵo taŭga por ekbruligi fajron. Li tiam spertis la nesufiĉecon de sia kapablo kaj li ekploris. Virginio diris: "Ne ploru, amiko, se vi ne volas min ĉagreni. Mi estas kaŭzo de ĉiuj viaj malfeliĉoj kaj de la malkvieteco de niaj patrinoj. Oni devas nenion fari, eĉ bonon, ne petinte konsilon de siaj gepatroj. Ho! mi ja estis malsaĝa!" Kaj ŝi ekploris. Tamen ŝi diris al Paŭlo: "Ni preĝu Dion, frato mia, kaj li kompatos al ni."

Apenaŭ ili finis sian preĝon, ili aŭdis bojon. "Tio ĉi estas la hundo de iu ĉasisto, kiu venas vespere por mortigi cervojn en embusko," diris Paŭlo. Iom poste, la bojado pliiĝis. "Al mi ŝajnas, diris Virginio, ke tio ĉi estas Fidela, la hundo de nia dometo: jes, mi rekonas ĝian voĉon; ĉu ni estus tiel proksime al nia hejmo kaj jam ĉe nia monto?"

Efektive iom poste Fidela aperis ĉe iliajn piedojn, bojante, blekante, ĝemante kaj ilin ĉirkaŭkaresante. Ili ne ankoraŭ sensurpriziĝis, kiam ili ekvidis Domingon alkuranta. Je la alveno de tiu bona negro, ploranta pro ĝojo, ili ankaŭ ekploris, ne kapablante diri eĉ unu vorton. Kiam Domingo rekonsciis: "Ho, junaj gemastroj," li diris, "kiel malkvietaj estas viaj patrinoj! kiel ili miris, ne revidante vin post la reveno el la preĝejo, al kiu mi

akompanis ilin! Mario, kiu laboris ie en la loĝejo, ne povis diri, kien vi iris. Mi iris kaj reiris ĉirkaŭ la domo, ne sciante, kie serĉi. Fine mi prenis viajn malnovajn vestojn, mi flarigis ilin al Fidela kaj tuj, kvazaŭ tiu besto komprenus min, li ekserĉis viajn paŝojn; li kondukis min, ĉiam movante la voston, ĝis la Nigra rivero. Tie, mi eksciis de iu loĝanto, ke vi rekondukis al li forkurintan negrinon kaj ke li konsentis pardoni al ŝi! Sed kia pardono! Li montris ŝin al mi, ligita al ligna ŝtupo, kun ĉeno ĉe la piedoj kaj fera trikroĉa ĉirkaŭkolo. De tie Fidela, ĉiam flaresplorante, kondukis min sur la Nigran riveron, kie li ankoraŭ haltis bojante: tio okazis sur la vindo de fonto, apud renversita palmo kaj ankoraŭ fumanta fajro. Fine li kondukis min tien ĉi: ni estas sub la monto Trimama kaj ni devas marŝi ankoraŭ kvar mejlojn ĝis nia hejmo. Nu, manĝu kaj refortiĝu.” Li prezentis al ili kukon, fruktojn kaj grandan nuksbotelon, plenan de trinkaĵo konsistanta el akvo, vino, citronosuko, sukero, muskato; iliaj patrinoj ĝin preparis por ilin refortigi kaj sensoifigi.

Virginio sopiris, rememorante pri la malfeliĉa sklavino kaj la maltrankvileco de iliaj patrinoj. Multfoje ŝi ripetis: ”Ho! kiel malfacile estas fari la bonon.” Dum Paŭlo kaj ŝi refortigis sin, Domingo ekbruligis fajron kaj, serĉinte inter la ŝtonoj tordecan lignon, kiu brulas malvelka, ĵetante grandan flamon, li faris per ĝi torĉon, kiun

li bruligis, ĉar jam estis nokto. Sed li estis multe pli embarasita, kiam ili volis ekiri: Paŭlo kaj Virginio ne povis plu marŝi; iliaj piedoj estis ŝvelintaj kaj tute ruĝaj. Domingo ne sciis, ĉu li devas iri malproksimen por peti helpon aŭ pasigi la nokton kun ili en tiu loko.

”Kie estas la tempo,” li diris, ”kiam mi portis vin ambaŭ samtempe en miaj brakoj? Sed nun vi estas altaj kaj mi estas maljuna.”

Dum lia ŝanceliĝo, aro da förkurintaj negroj aperis je dudeko da paŝoj. La estro de tiu bando, proksimiĝante al Paŭlo kaj Virginio, diris: ”Bonaj geblankulidoj, ne timu; hodiaŭ matene ni vidis vin preterirantajn kun negrino de la Nigra rivero; vi iris por peti pardonon por ŝi de ŝia malbona mastro: ni danke reportos vin hejmen sur niaj ŝultroj.”

Li tiam signalis kaj kvar fortikaj forkuruloj tuj faris portilon per branĉoj kaj lianoj, sur ĝin metis Paŭlon kaj Virginion, levis ilin sur siajn ŝultrojn kaj ekvojiris, dum la tuta bando ĝoje benis ilin kaj Domingo paŝis antaŭe kun sia torĉo. Virginio, kortuŝita, diris al Paŭlo: ”Ho, amiko! Neniam Dio lasas bonfaron sen rekompenco.”

Ili alvenis noktomeze ĉe la malsupro de sia monto, kies deklivojn lumigis kelkaj fajroj. Apenaŭ ili eksupreniris, ili aŭdis voĉojn krientajn: ”Ĉu vi, infanoj miaj?”

Ili respondis kun la negroj: "Jes, jen estas ni!" kaj ili baldaŭ ekvidis siajn patrinojn kaj Marion alvenantaj kun flamantaj brulbranĉoj.

"Malsaĝaj infanoj," diris sinjorino de La Tour, "de kie vi venas? Kiel multe vi maltrankviligis nin!"

"Ni venas," diris Virginio, "de la Nigra rivero, kie ni petis la mastran pardonon por kompatinda forkurinta sklavino, al kiu mi donis la familian matenmanĝon, ĉar ŝi estis mortanta pro malsato; kaj jen tiuj vagistaj negroj rekondukis nin."

Sinjorino de La Tour, ne povante paroli, kisis sian filinon; kaj Virginio, sentante sian vizaĝon malsekigatan de la patrinaj larmoj, diris: "Vi pagas al mi por ĉiuj miaj suferoj."

Margarito, ĝojega, ĉirkaŭpremis Paŭlon kaj diris: "Kaj vi ankaŭ, filo mia, vi bone agis!"

Kiam ili alvenis en siajn dometojn, ili donis nutraĵon al la vagistaj negroj, kiuj reiris en la arbaron, dezirante al ili ĉiaspecajn sukcesojn.

Por tiuj familioj ĉiu tago estis feliĉa kaj paca. Nek envio, nek gloramo ilin turmentis. Ili ne deziris ekstere vanan famon, akiratan per intrigado kaj perdeblan per kalumnio; ili kontentiĝis, estante siaj propraj atestantoj kaj juĝantoj. En tiu insulo, kiel en ĉiuj eŭropaj kolonioj, oni avidas nur pri malicaj anekdotoj, kaj iliaj virtoj, eĉ iliaj

nomoj estis nekonataj. Nur kiam preteriranto, pasante sur la vojo al *Pamplemousses*, demandis al kelkaj loĝantoj sur la ebenaĵo: "Kiu loĝas tie supre en tiuj dometoj?" oni respondis, ne konante ilin: "Ili estas bonaj homoj." Tiel la violoj, sub domaĵoj, malproksimen dissendas sian dolĉan odoron, kvankam ili estas ne vidataj. Ili tute ne parolis pri la malbonaĵoj de la aliaj homoj, ĉar tio ĉi, kvankam ŝajne justema, nepre inklinas la koron al malamo aŭ al hipokriteco; estas ja neeble ne malami la homojn, se oni kredas ilin malbonaj kaj vivi kun la malbonuloj, ne kaŝante sian malamon al ili sub ŝajna afableco. Tiel la mallaŭdo de aliaj devigas nin malami aŭ la aliajn aŭ nin mem. Sed ne opiniante pri homoj aparte, ili nur parolis pri la rimedoj bone agi por ĉiuj ĝenerale, kaj, kvankam ili tion ne povis, ili tamen tion senĉese deziris, kaj tio ĉi faris ilin ĉiam bonfaremaj.

Vivante en izoleco, anstataŭ fariĝi homevitemaj, ili do fariĝis pli homamaj. Se skandala anekdotaro de la societo ne estis temo por iliaj interparoloj, la naturo ilin plenis per ĉarmo kaj ĝojo. Ili rave admiris la potencon de la Providenco, kiu, per iliaj manoj, naskis inter tiuj senfruktaj ŝtonegoj la malmankon, ĉarmojn kaj plezurojn purajn, simplajn kaj ĉiam renoviĝantajn.

Paŭlo, dekdujare, estis pli fortika kaj pli inteligenta ol dekkvinjara eŭropano; li plibeligis tion, kion nur kulturis Domingo. Li iris kun li en la proksiman arbaron por

elradikigi junajn plantojn de citron- kaj oranĝarboj, de tamarindarboj, kies ronda kapo estas tiel bele verda; de daktilarboj, kies frukto estas plena de dolĉa kremo odoranta kvazaŭ oranĝfloro. Li plantis tiujn jam grandajn arbojn ĉirkaŭ la ŝtonega zono. Li tie semis arbograjnojn, kiuj havas florojn aŭ fruktojn jam en la dua jaro, nome agatio, de kiu ĉirkaŭpendas kvazaŭ lustraj kristaloj, longaj blankaj floraroj; persa siringo, kiu rekte altigas al la ĉielo siajn lingrizajn girlandojn; papajo, kies senbranĉa trunko, formita kiel kolono ornamita de verdaj melonoj, portas kapitelon el larĝaj folioj, similaj al la figarbaj.

Li ankaŭ plantis grajnoj kaj kernojn de terminalioj, mangarboj, avokadoj, psidioj, iakoj, kaj jambozioj. La plimulto de tiuj arboj liveris al sia juna mastro ombron kaj fruktojn. Lia laborema mano fruktodonigis eĉ la plej senproduktemajn lokojn de tiu korto. Diversaj alooj, kun raketformaj branĉoj ŝarĝataj de flavruĝe striataj floroj, dornaj kaktoj superis la nigrajn kapojn de la ŝtonegoj kaj ŝajnis atingi ĝis la longaj lianoj, ŝarĝataj de bluj aŭ skarlataj floroj, pendantaj ĉi tie kaj tie sur la montaj krutegaĵoj.

Li aranĝis tiujn vegetaĵojn tiel, ke oni povis ĝui ilian vidaĵon unurigarde. Meze de tiu loko li plantis malaltajn herbojn, poste arbetojn kaj mezaltajn arbojn kaj fine grandajn arbojn, kiuj borderis la ĉirkaŭon: tiamaniere tiu vasta enfermaĵo ŝajnis, el sia centro, kvazaŭ verda,

flora kaj frukta amfiteatro, enhavanta legomajn kreskaĵojn, herbejlimojn, riz- kaj tritik-kampojn. Sed aranĝante tiujn vegetaĵojn laŭ sia plano, li ne disiĝis de la difinoj de la naturo: gvidata de ĝiaj montroj, li metis en la altaj lokoj la kreskaĵojn, kies semoj estas flugemaj, kaj sur la rando de la akvo la kreskaĵojn, kies grajnoj emas flosi. Tiel ĉiu vegetaĵo kreskis en sia taŭga sidejo kaj ĉiu loko ricevis naturan ornamaĵon per sia vegetaĵo.

La akvo, fluanta de la supro de tiuj ŝtonegoj, formis en la fundo de la valo jen fontojn jen larĝajn kvazaŭspegulojn, kiuj rebrilis inter la verdaĵaro la florajn arbojn, la ŝtonegojn kaj la ĉielan bluan.

Malgraŭ la malebeneco de tiu teraĵo, ĉiuj plantejoj estis kaj tuŝeblaj kaj videblaj. Ni ja helpis al li per niaj konsiloj kaj subtenoj por tion efektiviĝi. Li aranĝis voje-ton, kondukanta ĉirkaŭ tiu ĉi enfermaĵo kaj kies kelkaj branĉoj atingis la centron. Li uzis la plej malglatajn lokojn kaj akordigis, laŭ la plej lerta harmonio, la promeneblecon kun la termalebeneco, la dornajn arbojn kun la sovaĝaj. El tiu grandega kvanto da rulantaj ŝtonoj, kiuj nun embarasas tiujn vojojn kaj multajn lokojn de la insulo, li formis, ĉi tie kaj tie, piramidojn, en kies ŝtupoj li miksis teron kaj radikojn de rozujoj, pincianoj kaj aliajn arbojn, kreskantaj sur la ŝtonegoj. En malmulte da tempo tiuj malhelaj kaj krudaj piramidoj tegiĝis per verdaĵoj aŭ plej belaj floroj. Sulkegoj, borderataj de

malnovaj kliniĝantaj arboj, formis arkefleksitajn, nevarmigeblajn kavojn, kie oni refreŝiĝis dum la tago. Vojetoj kondukis al sovaĝa arbareto, en kies mezo kreskis fruktoŝarĝita kulturarbo, ŝirmata kontraŭ la ventoj. Tie estis grenejo, ĉi tie fruktejo. Trans tiu aleo oni vidis la dornetojn; trans tiu alia oni vidis la neatingeblajn montosuprojn.

Sub densa arbareto de tatamakoj kunplektitaj kun liaj oni ne distingis plu ian objekton dum la tagmezo; sur la pinto de ĉi tiu najbara ŝtonego, elflankiĝanta el la monto, oni vidis ĉiujn aĵojn de tiu korto kaj, malproksime, la maron, kie aperis kelkfoje ŝipo alvenanta aŭ reverturanta Eŭropon. Sur tiu ŝtonego la familioj vespere kunvenis, silente ĝuante la aeran freŝecon, la floran odoron, la fontan murmuron kaj la lastajn harmoniojn de la lumo kaj de la ombroj.

Nenio estis pli agrabla ol la nomoj donitaj al la plej ĉarmaj rifuĝejoj de tiu labirinto. La ŝtonego, pri kiu mi ĵus parolis, de kie oni vidis min venanta tre malproksime, estis nomata la *Eltrovejo de amikeco*. En siaj ludoj, Paŭlo kaj Virginio plantis tie bambuon, sur kies supron ili levis blankan tuketon por signali mian alvenon, same kiel oni altigas flagon sur la najbara monto, kiam oni ekvidas ŝipon sur la maro. Venis al mi la ideo gravuri skribaĵon sur la trunkon de tiu arbeto. Se mi havis plezuron en miaj vojaĝoj, vidante statuon aŭ antikvan mo-

numenton, mi havas ankoraŭ pli grandan legante bone verkitan surskribaĵon: ŝajnas al mi tiam, ke homa voĉo eliras el la ŝtono, aŭdiĝas tra la jarcentoj kaj, alparolante la homon meze de la dezertoj, diras, ke li ne estas sola, ke aliaj homoj en tiuj samaj lokoj sentis, pensis, suferis same kiel li. Se tiu surskribo estas farita de ia antikva, ne plu ekzistanta nacio, ĝi vagigas nian animon tra la senfinaĵo kaj pruvas ĝian senmortecon, montrante, ke penso postvivis eĉ la ruinon de imperio.

Mi do skribis sur la flagmasto de Paŭlo kaj Virginio ĉi tiujn Horaciajn versojn:

*Fratres Helenæ, lucida sidera
Ventorumque regat pater
Obstrictis aliis, præter Iapyga!*

Fratoj Helenaj, brilantaj stelaroj,
Kaj ventpatro vin direktu,
Kaj neniu blovu vento krom Zefiro!

Mi gravuris tiun Virgilian version en la ŝelon de tata-mako, ĉe kies ombraĵo Paŭlo kelkfoje sidis por rigardi la malproksime moviĝantan maron:

*Fortunas at ille deos qui novit agrestes!
Kaj feliĉa kiu konas kampajn diaĵojn!*

Kaj tiun alian super la pordo de la dometo de sinjorino de La Tour, en kiu okazis la kunvenoj:

At segura quies, et nescia fallere vita.

Tie kvieta saĝec' kaj vivo ne scias trompadi.

Sed Virginio ne aprobis miajn latinaĵojn; ŝi diris ke tio, kion mi metis sur ŝian montrilstangon, estas tro longa kaj tro klera. "Mi pli amus, ŝi diris: *ĉiam agitata, sed konstanta.*"

"Tiu ĉi devizo, mi respondis, pli bone konvenus por la virto." Mia penso ŝin ruĝigis.

Tiuj feliĉaj familioj alsignis siajn sentemajn animojn al ĉio ilin ĉirkaŭanta. Ili plej ameme nomis la objektojn ŝajne plej indiferentajn. Rondo da oranĝ-, bananarboj kaj jambozioj plantitaj ĉirkaŭ herbejo, en kies mezo Virginio kaj Paŭlo kelkfoje dancis, estis nomata *Kunakordiĝo*. Malnovan arbon, sub kies ombro sinjorino de La Tour kaj Margarito estis reciproke rakontintaj siajn malfeliĉaĵojn, oni nomis *Viŝitaj ploroj*. Ili nomis *Britujo* kaj *Normandujo* malgrandajn teraĵojn, en kiuj ili semis grenon, fragojn kaj pizojn. Domingo kaj Mario, laŭ la ekzemplo de siaj mastrinoj, rememorante pri siaj naskolokoj en Afriko, nomis *Angolo* kaj *Fujpinto* du lokojn, kie kreskis la herbo, per kiu ili faris korbojn kaj kie ili plantis krescencion. Tiel per tiuj produktaĵoj de sia klimato, la elpatrujiĝintaj familioj konservis la dolĉajn iluziojn de sia lando kaj kvietigis la bedaŭrojn al ĝi en fremda tero. Ho ve! vivplenaj estis tiuj ĉarme nomataj arboj, fontoj,

ŝtonegoj, en tiu nun renversita loko kiu, simila al greka kampo, prezentas nur ruinaĵojn kaj kortuŝajn nomojn.

Sed, el ĉio enfermita en tiu enmontaĵo, nenio estis pli agraba ol la *Ripozejo de Virginio*. Malsupre de la ŝtonego *Eltrovejo de amikeco*, estas sulkaĵo, el kiu eliras fonto, kiu formas tuj ĉe sia fonto marĉaĵeton, en delikata herbejo. Kiam Margarito naskis Paŭlon, mi donacis al ŝi hindan kokosnukson, kiun oni iam donis al mi; ŝi plantis tiun frukton sur la bordon de tiu marĉaĵeto, por ke la devenonta arbo iam estu kvazaŭ kalkulsigno pri la aĝo de ŝia filo. Sinjorino de La Tour, laŭ ŝia ekzemplo, plantis alian, en simila celo, tuj kiam ŝi naskis Virginion. El tiuj du fruktoj kreskis du kokosarboj, kiuj estis la solaj arboj de ambaŭ familioj: unu estis nomata *arbo de Paŭlo* kaj la alia *arbo de Virginio*. Ambaŭ kreskis en sama proporcio, kiel iliaj junaj gemastroj; ili estis iom malegale altaj, sed superis post dekdu jaroj la altecon de la domegoj. Jam ili interligis siajn branĉojn kaj iliaj kokosaroj pendis super la fonto. Escepte de tiu plantejo, oni lasis tiun ŝtonegan sulkaĵon en la stato kiel la naturo ĝin ornamis. Sur ĝiaj brunaj kaj malsekaj flankoj radiis, kvazaŭ verdaj kaj nigraj steloj, larĝaj adiantoj kaj blovis al la vento skolopendraj tufoj, pendantaj kvazaŭ longaj purpurverdaj rubandoj. Apude kreskis vinkoj, kies floroj preskaŭ similas la ruĝan levkojon, kaj kapsikoj, kies sangokoloraj ŝeloj pli brilas ol koralo. En la ĉirkaŭaĵo, ĝen-

tilmentoj kun siaj korformaj folioj kaj kariofilodoraj bazilikoj elsendis la plej dolĉajn parfumojn. El la supra krutaĵo de la monto pendis lianoj similaj al plenblovaj drapiraĵoj, kiuj formis sur la flankoj de la ŝtonego grandajn verdaĵajn kurtenojn. La marbirdoj, allogitaj de tiuj trankvilaj ripozejoj, venis tien por pasigi la nokton. Je la sunsubiro, oni vidis flugantajn laŭlonge de la maro la korvon kaj la maralaŭdon kaj supre en la aero la nigran takipeton kun la tropika blankbirdo, kiuj forlasis, kiel la taga astro, la solaĵojn de la Hinda oceano. Virginio ŝatis ripozi ĉe la rando de tiu fonto, samtempe belege kaj sovaĝe ornamita. Ofte ŝi venis tien por lavi la tolaĵojn de la familio ĉe la ombro de la du kokosarboj. Kelkfoje ŝi alkondukis siajn kaprinojn por ilin paŝti. Dum ŝi preparis fromaĝon el ilia lakto, ŝi plezuris vidi ilin manĝantajn la adiantojn sur la krutaj flankoj de la ŝtonego kaj starantajn sur kornico kvazaŭ sur piedestalo. Paŭlo, vidante, ke tiun lokon ŝatas Virginio, alportis nestojn de ĉiuspecaj birdoj el la najbara arbaro. La gepatroj sekvis siajn idojn kaj loĝiĝis en tiun novan kolonion. Virginio disĵetis al ili de tempo al tempo grajnoj de rizo, maizo kaj milio. Tuj kiam ŝi aperis, la fajfemaj merloj, la bengalfringoj, kies pepado estas tiel dolĉa, la fajrokoloraj ruĝbirdoj, forlasis siajn arbetojn; konuroj, verdaj kiel smeraldoj, malsuprenflugis de la najbaraj latanioj; perdrikoj alkuris inter la herbo; ĉiuj intermiksitaĵoj antaŭen-

venis kvazaŭ kokinoj ĝis ŝiaj piedoj. Paŭlo kaj ŝi ĝojege sin amuzis per iliaj ludoj, apetitoj kaj amoj.

Amindaj infanoj, vi tiel pasigis en simpleco viajn unuajn tagojn, vin ekzercante pri la bonfaroj! Kiom da fojoj en ĉi tiu loko viaj patrinoj, premante vin en siaj brakoj, laŭdegis al la ĉielo, ke vi estas ilia konsolo, ĉar vi tiam ekvivis sub tiel favoraj aŭspicioj! Kiom da fojoj, ĉe la ombro de ĉi tiuj ŝtonegoj, mi partoprenis kun ili niajn kampajn manĝojn, kiuj ne oferigis la vivon de ia ajn besto! Botelnuksoj plenaj de lakto, freŝaj ovoĵoj, rizkukoj sur bananfolioj, korboj ŝarĝitaj per patatoj, mangoj, oranĝoj, granatoj, bananoj, daktiloj, ananasoj, kune prezentis la plej sanigajn nutraĵojn, la plej gajajn kolorojn kaj la plej agrablajn sukojn.

La interparolo estis tiel malkruela kaj tiel simpla kiel tiuj festenoj. Paŭlo ofte parolis pri la hodiaŭaj kaj morgaŭaj laboroj; ĉiam li meditis pri io utila por la familio. Tie ĉi la vojetoj ne estis sufiĉe oportunaj; tie oni sidis malbone; tiuj novaj laŭboj ne liveris sufiĉe da ombro; Virginio estus pli bone en tiu alia loko.

Dum la pluva sezono ili pasigis la tagon ĉiuj kune en la dometo, gemastroj kaj geservistoj, okupataj pri farado de herbaj matoj kaj bambuaj korboj. Oni vidis, plej orde aranĝitajn kontraŭ la muroj, rastilojn, hakilojn, fosilojn; kaj apud tiuj kampaj iloj, la produktaĵojn akiritajn per ili: sakojn da rizo, garbojn da greno kaj fruktarojn da

bananoj. Delikateco ĉiam akompanis la malmankecon. Virginio, instruita de Margarito kaj de sia patrino, preparis glaciaĵojn kaj refortigajn trinkaĵojn el la suko de sukerkanoj, citronoj kaj cedratoj.

Kiam noktiĝis, ili vespermanĝis je lumo de lampo; poste sinjorino de La Tour aŭ Margarito rakontis aventurojn de vojaĝantoj nokte perdiĝintaj en eŭropaj arbaroj, plenaj de ŝtelistoj, aŭ la pereon de ŝipo, ĵetita de ventego sur ŝtonegojn de senhoma insulo. Aŭdante tiujn rakontojn, la sentemaj animoj de la infanoj ekscitiĝis; ili preĝis Dion, ke li favoru ilin iun tagon, liverante okazon por gastado al tiaj kompatinduloj. Poste la familioj disiĝis por ripozi, senpacience atendente la morgaŭan revidiĝon. Kelkfoje ili ekdormis je bruo de pluvo falanta riverece sur la tegmenton de iliaj dometoj aŭ je muĝado de la ventoj alportantaj la malproksiman murmuron de maraj ondoj frakasiĝantaj kontraŭ la bordo, ili dankegis Dion pro sia propra kvieteco, kies sento pliiĝis pro la malproksima danĝero.

De tempo al tempo sinjorino de La Tour publike legis kortuŝan rakonton el la Malnova aŭ Nova Testamentoj. Ili malmulte disputis pri tiuj sanktaj libroj, ĉar ilia teologio konsistis nur en sento kiel la teologio de la naturo kaj ilia moralo estis agema kiel la moralo de la evangelio. Ili ne havis tagojn dediĉitajn al ĝojo kaj aliajn al malĝojo; ĉiu tago estis por ili festa tago kaj ĉio ĉirkaŭa dia

templo, kie ili senĉese admiris la senfinan, ĉiopovan kaj homaman Inteligenton. Tiu konfido al la supera potenco konsolis ilin por la estinto, kuraĝigis por la estanto kaj esperigis por la estonto. Jen kiel tiuj virinoj, devigitaj pro malfeliĉo vivi laŭ la naturo, pliigis ĉe si kaj ĉe siaj idoj la sentojn donitajn de la naturo, por ke ni ne falu en malfeliĉon.

Sed kiel konfuzoj okazas kelkfoje en la plej reguligita animo, tiel same, kiam iu familiano ŝajnis malĝoja, ĉiuj aliaj ĉirkaŭvenis kaj forpelis de ĝi la malgajajn pensojn, pli per sento ol per argumentoj; ĉiu uzis por tio sian specialan karakteron: Margarito vivan gajecon; sinjorino de La Tour dolĉan teologion; Virginio amemajn karesojn; Paŭlo sincerecon kaj korecon; eĉ Mario kaj Domingo helpis al ĝi. Ili malgajiĝis se ĝi estis malĝoja, ili ploris, se ĝi ploris. Tiel same, malfortaj kreskaĵoj interligiĝas por kontraŭstari al la ventegoj.

Dum la bela sezono ili iris ĉiudimance al la meso, en la preĝejo *Pamplermousses*, kies sonorilejon vi vidas sur la ebenaĵo. Tien palankene venis riĉuloj, kiuj multfoje deziris konatiĝi kun tiel kunigitaj familioj kaj invitis ilin al festoj; sed ili ĉiam honeste kaj respektive malakceptis iliajn proponojn, konvinkitaj, ke la potenculoj konatiĝas kun la malpotenculoj nur por havi servantojn, kaj ke oni estas servanto nur flatante la pasiojn de la aliaj, bonajn aŭ malbonajn. Aliflanke, ili ankaŭ zorge evitis la rilata-

don kun la mezaj insulanoj ordinare ĵaluzaj, kalumnieraj kaj maldelikataj. Iuj konsideris ilin timemaj, aliaj fieraj; sed ilian saĝan konduton akompanis tiel sindonemaj ĝentilaĵoj, precipe al la mizeruloj, ke ili, iom post iom, akiris respekton de la riĉuloj kaj konfidon de la nerriĉuloj.

Post la meso oni ofte petis ilin por ia bonservo. Aŭ malĝoja persono deziris konsilon, aŭ infano petis, ke ili venu al lia malsana patrino en najbara kvartalo. Ili ĉiam havis kun si kelkajn utilajn receptojn por la ordinaraj malsanoj de la insulanoj kaj al tio ili aldonis afablecon, kiu faras tiel valoraj la malgrandajn servojn. Ili precipe sukcesis forpeli la spiritajn ĉagrenojn, tiel neelporteblaj en soleco kaj en kripla korpo. Sinjorino de La Tour parolis tiel konfide pri Dio, ke la aŭskultanta malsanulo kredis, ke li ĉeestas. Virginio tre ofte revenis kun okuloj malsekaj de ploroj, sed ĉiam kun ĝoja koro, ĉar ŝi estis povinta fari bonon; ŝi preparis antaŭe la sanigilojn necesajn por la malsanuloj kaj prezentis ilin kun nedirebla afableco. Post tiuj homamaj vizitoj ili kelkfoje iris tra la valo de la *Longa monto* ĝis mia hejmo, kie mi atendis ilin por tagmanĝi sur la rando de apuda rivereto. En tiuj okazoj mi provizis kelkajn botelojn da malnova vino, por pliigi niajn hindajn manĝojn per tiuj dolĉaj kaj karaj produktaĵoj el Eŭropo. Aliffoje ni kunvenis ĉe la marbordo, ĉe la enfluejo de kelkaj aliaj malgrandaj riveroj,

kiuj estas tie nur grandaj riveretoj. Ni alportis el la loĝejo vegetajn provizaĵojn kaj ni plie havis la multegajn marproduktojn. El la bordoj ni kaptis platfiŝojn, polipojn, ruĝfiŝojn, palinurojn, markankretojn, krabojn, marerinacojn, ostrojn kaj ĉiuspecajn konkojn. La plej teruraj lokoj ofte liveris la plej trankvilajn plezurojn. Kelkfoje, sidante sur ŝtonego ĉe ombro de velurbarbo, ni vidis mezmarajn ondegojn frakasiĝantaj sub niaj piedoj kun terurega bruigo. Paŭlo, kiu cetere naĝis kvazaŭ fiŝo, kelkfoje antaŭeniĝis sur la rifojn, renkonte al ondegoj; kaj kiam ili alproksimiĝis, li fornaĝis al la bordo antaŭ iliaj ŝaŭmaj, muĝantaj rulondoj, kiuj lin persekutis ĝis la sablobordo. Vidante tion Virginio kriegis kaj diris, ke tiuj ludoj ŝin terurigas.

Niajn manĝojn sekvis kantoj kaj dancoj de la gejunuloj. Virginio kantis pri la feliĉo de la kampa vivado kaj pri la malfeliĉo de la maristoj, kiujn avareco instigas veturi sur furioza elemento plivole ol kulturi la teron, kiu tiel sendanĝere liveras tiel multajn bonaĵojn. Kelkfoje, laŭ la negra maniero, ŝi faris kun Paŭlo pantomimon. Pantomimo estas la unua homa lingvo: ĝin konas ĉiuj nacioj; ĝi estas tiel natura, tiel esprimema, ke la blankuloj konis ĝin, kiam ili vidis la negridojn ekzerciĝantajn. Virginio, rememorante el la legaĵoj de sia patrino la plej tuŝantajn rakontojn, naive reproduktis iliajn ĉefajn okazintaĵojn. Jen, je la tamtamo de Domingo, ŝi montriĝis

sur la herbejo portante kruĉon sur la kapo; ŝi timeme antaŭeniris al la najbara fonto por ĉerpi akvon. Domingo kaj Mario, prezentantaj la paŝtistojn de Mediano, malhelpis, ke ŝi antaŭenpaŝu kaj ŝajnis ŝin forpeli. Paŭlo alkuris por helpo, venkis la paŝtistojn, plenigis la kruĉon de Virginio kaj metante ĝin sur ŝian kapon, li samtempe ornamis ŝin per ruĝa vinkoflora krono, kiu plividigis la blankecon de ŝia vizaĝo. Tiam, partoprenante al iliaj ludoj, mi prezentis Raguelon kaj mi donis al Paŭlo mian filinon Seforon kiel edzinon.

Alifoje ŝi prezentis la malfeliĉan Ruton, kiu reiras, vidvino kaj malriĉa, en sian landon, kie ŝi troviĝas preskaŭ fremda post tiel longa foresto. Domingo kaj Mario imitis la rikoltistojn. Virginio ŝajnis postkolekti ĉi tie kaj tie kelkajn grenspikojn. Paŭlo, imitante patriarkan gravecon, demandis ŝin: tremante ŝi respondis liajn demandojn. Baldaŭ, kortuŝita de kompatato, li regalis la senkulpan malfeliĉulinon; li plenigis la antaŭtukon de Virginio per ĉiuspecaj provizaĵoj kaj kondukis ŝin al ni, kvazaŭ antaŭ la urbaj maljunuloj, deklarante, ke li edziĝos kun ŝi, malgraŭ ŝia malriĉeco. Je tiu vido sinjorino de La Tour rememoris pri sia propra forlasiĝo de ŝiaj parencoj, pri vidviniĝo, la bonakcepto de Margarito, nun sekvata de la espero pri feliĉa edziĝo inter iliaj gefiloj kaj ŝi ne povis deteni siajn plorojn; kaj je tiu konfuza rememoro pri

feliĉo kaj malfeliĉo, ni ĉiuj verŝis larmojn de doloro kaj ĝojo.

Tiuj dramoj estis tiel vere prezentataj, ke oni kredis esti en la siriaj aŭ palestinaj kampoj. La ornamaĵoj, luminoj kaj orkestroj taŭgaj por tiu vidaĵo, ne mankis. La scenejo estis ordinaro vojkruciĝo de arbaro, kies malfermaĵoj formis ĉirkaŭ ni multajn foliarajn arkaĵojn. Ni estis, en la centro, ŝirmataj kontraŭ la varmece dum la tuta tago; sed kiam la suno subiris ĉe la horizonto, ĝiaj radioj, rompitaĵoj de la arbotrunkoj, disiĝis tra la ombroj de la arbaro en longaj lumaj faskoj, kiuj plej majeste elrigardis. Kelkfoje ĝia plena disko aperis ĉe la fino de aleo kaj faris ĝin lumbrilega. La foliaro de la arboj, sube lumigataj de ĝiaj safrankoloraj radioj, brilis kvazaŭ topazo kaj smeraldo; iliaj muskotegitaj kaj brunaj trunkoj ŝajnis fariĝi kolonoj el antikva bronzo; kaj la birdoj, jam silente foririntaj sub la malhelan foliaron por pasigi la nokton, mirantaj pro la revido de dua tagiĝo, ĉiuj kune salutis la lumastron per miloj da kantoj.

Tre ofte la nokto nin surprizis en tiuj kampaj festoj; sed la aera pureco kaj la klimata dolĉeco ebligis al ni dormi sub branĉa rifuĝejo, meze de la arbaroj, sen ia ajn timo pri ŝtelistoj. La morgaŭan tagon, ĉiu reiris en sian dometon kaj retrovis ĝin en sama stato, kiel li ĝin lasis. La konfido kaj la simpleco en tiu insulo tiam senkomer-

ca estis tiel grandaj, ke oni ne ŝlosis la pordojn de multaj domoj kaj seruro estis kuriozaĵo por multaj kreoloj.

Sed en la jaro ekzistis por Paŭlo kaj Virginio grandfestaj tagoj: tio estis la datrevenoj de iliaj patrinoj. La antaŭan tagon, Virginio ne forgesis knedi kaj baki kukojn el tritika faruno, kaj ŝi sendis ilin al malriĉaj blankaj familioj, naskitaj en la insulo; ĉi tiuj neniam manĝis eŭropan panon kaj sen helpo de la negroj, ili estis devigataj sin nutri je manihoto meze de la arbaroj; kaj por elporti la malriĉecon, ili havis nek la malspritecon, kiu akompanas sklavecon, nek la kuraĝon, kiu venas de bonedukiteco. Tiuj kukoj estis la solaj donacoj, kiujn povis fari Virginio el la superfluo de la loĝejo; sed ŝi aldonis al tio afablecon, kiu faris ilin grandvaloraj. Unue Paŭlo mem devis porti ilin al tiuj familioj kaj ĉi tiuj, ricevante ilin, promesis veni la morgaŭan tagon al sinjorino de La Tour kaj Margarito. Oni tiam vidis patrino alvenanta kun du aŭ tri mizeraj, flavaj, malgrasaj filinoj, tiel timemaj, ke ili ne kuraĝis levi la okulojn. Virginio baldaŭ malĝenis ilin; ŝi servis refreŝigajn trinkaĵojn, kies bonguston ŝi pliigis per ia specialaĵo kiu, laŭ ŝia opinio, faris ilin pli allogaj: tiun likvoron preparis Margarito; ĉi tiun alian ŝia patrino; tiun frukton ŝia frato mem kaptis sur arbo; ŝi admonis Paŭlon ilin dancigi; ŝi ne forlasis ilin, antaŭ ol ili estis kontentaj kaj ĝojaj: ŝi volis, ke ili estu ĝojaj pro ŝia familia ĝojo. "Oni feliĉiĝas, ŝi diris, nur

sin okupante pri la feliĉigo de aliaj.” Kiam ili foriris, ŝi admonis, ke ili forportu ĉion plezurigan kaj ŝi akceptigis siajn donacojn, pretekstante ilian novecon aŭ strangecon. Se ŝi rimarkis, ke iliaj vestoj estas disŝiritaj, ŝi elektis, kun la konsento de sia patrino, kelkajn el siaj kaj komisiis al Paŭlo, ke li kaŝe metu ilin antaŭ la pordon de iliaj dometoj; ŝi tiel bonfaris laŭ la ekzemplo de Dio: kaŝante la bonfarintinon, montrante la bonfaraĵon.

Vi eŭropanoj, kies spirito pleniĝas jam en la infaneco per tiom da kontraŭfeliĉaj antaŭjuĝoj, vi ne povas kompreni, ke la naturo povas havigi tiom da klereco kaj tiom da plezuroj. Via animo, enfermita en malgranda nombro de homaj scioj, baldaŭ atingas la finon de la artefaritaj ĝuadoj: sed la naturo kaj la koro estas neelĉerpeblaj.

Paŭlo kaj Virginio havis nek horloĝojn, nek almanakojn, nek librojn de kronologio, historio aŭ filozofio. La periodojn de la vivo ili kalkulis laŭ la naturo. Ili konis la horojn de la tago laŭ la ombro de la arboj; la sezonojn laŭ la tempo de la floroj aŭ de la fruktoj; la jarojn laŭ la nombro de la rikoltoj. Tiaj dolĉaj komparoj ĉarmis iliajn interparolojn: ”Jen tempo de tagmanĝo,” diris Virginio al la familio, ”la ombro estas ĉe la malsupro de la bananarboj;” aŭ: ”La nokto proksimiĝas, la tamarindarboj fermas siajn foliojn.” — ”Kiam vi venos nin viziti?” demandis kelkaj najbaraj amikinoj. — ”Je la sukerkanoj,” respondis Virginio.” — ”Via vizito estos al ni des pli dol-

ĉa kaj agrabla,” aldonis la junulinoj. Kiam oni demandis pri ŝia aĝo aŭ tiu de Paŭlo: ”Frato mia,” ŝi diris, ”havas la aĝon de la granda kokosarbo apud la fonto. Kaj mi estas samaĝa kiel la pli malgranda. La mangarboj liveris siajn fruktojn dek du fojojn kaj la oranĝarboj siajn flo-rojn dudek kvar fojojn, de mia naskiĝo.” Ilia vivo ŝajnis ligita kun la arboj, kiel tiu de faŭnoj kaj de driadoj. Alian historian epokon ili ne konis ol la vivo de siaj patrinoj; alian kronologion ol tiu de la fruktokampoj; alian filozofion ol la bonfarado al ĉiuj kaj la rezignigo al la Dia volo.

Cetere, kial bezonus tiuj gejunuloj riĉecon aŭ klerecon, kiel ni? La bezonoj kaj la malklereco ankoraŭ pliiĝis ilian feliĉon. Ili lernis unu de la alia ĉiutage helpon aŭ scion: jes scion; kaj eĉ, kvankam ĝi okaze estus estinta erara, la purulo ne konas danĝeran eraron. Tiel kreskis tiuj infanoj de la naturo. Neniu timo sulkigis iliajn fruntojn; neniu trouzo putrigis ilian sangon; neniu malfeliĉa pasio senpravigis ilian koron: amo, senkulpeco, pieco ĉiutage pliiĝis ilian animan belecon en neesprimeblaj graciaĵoj en trajtoj, sinteno kaj movoj. En la komenco de la vivo, ili havis kvazaŭ matenan freŝecon; tiel same, en la Edena ĝardeno, aperis niaj unuaj prapatroj kiam, elirinte el la Dia mano, ili vidis unu la alian, alproksimiĝis kaj interparolis, unue kvazaŭ frato kaj fratino. Virginio,

dolĉa, modesta, konfida, kiel Evo; kaj Paŭlo, simila al Adamo, havanta viran talion kun infana simpleco.

Kelkfoje, sola kun ŝi (ĉi tion li milfoje rakontis al mi), li diris, post la fino de siaj laboroj: "Kiam mi estas laca, min senlacigas via apero. Kiam de la montosupro mi vidas vin en la fundo de tiu valo, vi ŝajnas al mi kvazaŭ rozburĝono. Kiam vi marŝas al la domo de niaj patrinoj, perdriko kuranta post siaj idoj havas malpli belan talion, malpli gracian iron. Kvankam tra la arboj vi ne estas plu videbla, mi ne bezonas vin vidi por vin trovi; kvazaŭ neesprimebla io el vi restas por mi en la aero, tra kiu vi pasis, sur la herbo, kie vi sidis. Kiam mi proksimiĝas al vi, ĉiujn miajn sentojn vi ravas. La ĉiela bluo estas malpli bela ol viaj bluaj okuloj; la bengalfringa kanto malpli dolĉa ol la sono de via voĉo. Se mi nur per mia fingro tuŝetas vin, mia tuta korpo tremas de plezuro. Rememoru pri la tago, en kiu ni pasis sur la rulemaj ŝtonoj de la rivero Trimama. Alvenante sur ĝian bordon, mi estis jam tre laca; sed kiam vin mi prenis sur mian dorson, ŝajnis al mi, ke mi havas birdflugilojn. Diru, per kia ĉarmo vi povis min tiel ravi? Per via spirito? Sed niaj patrinoj havas tion pli ol ni ambaŭ. Per viaj karesoj? Sed ili kisas min pli ofte ol vi. Mi kredas, ke per via boneco. Mi neniam forgesos, ke vi nudpiede marŝis ĝis la Nigra rivero por peti pardonon por mizera forkurinta sklavino. Prenu, kara mia, prenu ĉi tiun citronfloran branĉon, al-

portitan de mi el la arbaro; vi ĝin metos, dum la nokto, apud via lito. Manĝu ĉi tiun ĉi mielan ĉelaron: por vi mi ĝin prenis el supro de ŝtonego. Sed, antaŭe, ripozu sur mia brusto kaj mi mallaciĝos.”

Virginio respondis: ”Ho, frato! La matenaj sunradioj super tiuj ŝtonegoj malpli ĝojigas min ol via apudesto. Mi tre amas mian patrinon, mi tre amas vian; sed ilin mi ankoraŭ pli multe amas, kiam ili vin nomas ’filo mia’. Iliaj karesoj al vi pli tuŝas ol tiuj, kiujn mi ricevas de ili. Vi demandas, kial vi amas min; sed ĉio kune edukita sin amas reciproke. Vidu niajn birdojn edukitajn en la samaj nestoj, ili amas unu la alian, kiel ni; ili ĉiam kune estas kiel ni. Aŭskultu, kiel ili sin reciproke vokas kaj respondas de arbo al arbo: same, kiam la eĥo aŭdigas al mi la ariojn, kiujn vi ludas per fluto, sur la monto, mi rekantatiliajn versaĵojn ĉe la fundo de tiu ĉi valo. Kara vi estas al mi, precipe de la tago, kiam por mi vi volis batiĝi kun la mastro de la sklavino. De tiu tempo multfoje mi pensis: Ha! mia frato havas bonan koron; sen li, mi estus mortinta de teruro. Mi ĉiutage preĝas al Dio por mia patrino, por la via, por vi, por niaj malriĉaj geservistoj; sed kiam mi elparolas vian nomon, ŝajnas, ke pliiĝas mia pieco. Mi tiel insiste petas al Dio, ke nenio malfeliĉa okazu al vi! Kial vi iras tiel malproksimen, tiel alten, por serĉi por mi fruktojn kaj florojn? Ĉu ni ne havas sufiĉe da ili en la ĝardeno! Kiel laca vi estas! Vi tute ŝvitas.” Kaj

per sia blanka tuketo, ŝi viŝis lian frunton kaj vangojn kaj faris al li kelkajn kisojn.

Sed, de kelka tempo, Virginio sentis, ke nekonata mal-sano agitas ŝin: ŝiaj belaj okuloj ĉirkaŭnigriĝas; ŝia vizaĝa koloro flaviĝas; plena konsumiĝo premas ŝian korpon. Sereneco ne vidiĝas plu sur ŝia frunto, nek rideto sur la lipoj. Subite ŝi montriĝis sen ĝojo kaj malgaja sen ĉagreno, forkuris de siaj simplaj ludoj, siaj dolĉaj laboroj kaj la kunesto kun sia amata familio; ŝi vagis ĉi tie kaj tie en la plej izolitaj lokoj de la loĝejo, ĉie serĉanta ripozon, nenie ĝin trovante. Kelkfoje, vidante Paŭlon, ŝi iris al li petolante; kaj alirante, ŝi subite embarasiĝis; ŝiaj palaj vangoj ruĝigis kaj ŝiaj okuloj ne kuraĝis plu rigardi liajn. Paŭlo diris: "Verdaĵo kovras ĉi tiujn ŝtonegojn, niaj birdoj kantas, kiam ili vin vidas; ĉio ĉirkaŭ vi estas gaja; vi sola estas malgaja." Kaj li provis refortigi ŝin per siaj kisoj; ŝi deturnis la kapon kaj, tremante, forkuris al sia patrino. La malfeliĉulino sentis, ke ŝin konfuzas la karesoj de ŝia frato. Paŭlo nenion komprenis pri tiel novaj kaj tiel strangaj kapricoj.

Malfeliĉo neniam sola okazas.

Unu el tiuj someroj, kiuj de tempo al tempo ruinigas la intertropikajn landojn, okazis. Tio estis ĉirkaŭ la fino de decembro, kiam la suno je Kaprikorno dum tri semajnoj varmigas *Ile-de-France* per siaj vertikalaj radioj. La sudorienta vento, kiu tie regas preskaŭ dum la tuta jaro,

ne blovis plu. Longaj polvtorniĝoj altiĝis super la vojoj kaj restis pendantaj en la aero. La tero ĉiaflanke fendiĝis; la herbo estis brulita; varmaj haladzoj eliĝis el la flanko de la montoj kaj la plimulto de la riveretoj estis sekiĝintaj. Neniu nubo venis el la maro. Nur dum la tago duonruĝaj vaporoj altiĝis super la ebenaĵoj kaj je sunsubiro ŝajnis kiel flamoj de ia dombrulo. Eĉ la nokto neniel malvarmigis la bakejcan atmosferon. La lunglobo leviĝis tute ruĝa ĉe la nebulega horizonto, supermezure granda. La brutaroj, duonfalintaj sur la flankoj de la montetoj, la kolo streĉita al la ĉielo, enspirante aeron, resonigis en la valoj malgajan blekadon. Eĉ la Kafro kondukanta ilin kusiĝis teren por tie trovi freŝecon; sed ĉe la tero estis varmega kaj la sufoka aero resonis la zumadon de la insektoj, kiuj provis sensoifiĝi en homa kaj besta sango.

En unu el tiuj flamaj noktoj Virginio sentis, ke pliiĝas ĉiuj antaŭsignoj de ŝia malsano: ŝi leviĝis, sidiĝis, rekuŝiĝis, neniel trovante dormon aŭ ripozon. Je la lunbrilo ŝi ekiras al sia fonto; ŝi vidas la fonton, kiu, malgraŭ la sek-eco, ankoraŭ fluigis kvazaŭ arĝentajn fadenetojn sur la brunaj flankoj de la ŝtonego; ŝi sin subakvigas en la kavo. Unue la malvarmetaĵo revigligas ŝiajn sentojn kaj multegaj agrablaj rememoroj prezentiĝas antaŭ ŝia spirito; ŝi rememoras ke, dum ŝia infaneco, ŝia patrino kaj Margarito sin amuzis banante ŝin kun Paŭlo en tiu sama

loko; ke poste Paŭlo, rezervinte por ŝi tiun banejon, plikavigis la fluejon, kovris la fundon per sablo kaj semis sur la bordoj aromajn herbojn. En la akvo, sur siaj nudaj brakoj kaj sia brusto, ŝi ekvidas la rebrilojn de la du palmoj plantitaj okaze de la naskiĝo de ŝia frato kaj de ŝi mem: ili interplektas super ŝia kapo siajn verdajn branĉojn kaj junajn kokosnuksojn; ŝi pensas pri la amikeco de Paŭlo, pli dolĉa ol la odoroj, pli pura ol la fontakvo, pli forta ol la kunigitaj palmoj, kaj ŝi sopiras, ŝi revas pri la nokto, pri la soleco; kaj flama pasio premas sin. Subite ŝi eliras, terurigita, el tiuj danĝeraj ombroj, el tiu akvo pli brulema ol la varmega suno; ŝi kuras al sia patrino por serĉi subtenon kontraŭ si mem. Kelkfoje, volante rakonti al ŝi siajn ĉagrenojn, ŝi premis ŝiajn manojn en siajn, kelkfoje ŝi estis tuj elparolonta la nomon de Paŭlo, sed ŝia premegata koro konfuzis ŝian langon; kaj metante sian kapon sur la patrinan bruston, ŝi povis nur plori.

Sinjinorino de la Tour ja bone suspektis la kaŭzon de la malsano de ŝia filino, sed ŝi mem ne kuraĝis ekparoli al ŝi pri tio. "Filino mia," ŝi diris, "turnu vin al Dio, kiu disponas, laŭ volo, sanon kaj vivon. Li hodiaŭ elprovas vin, por morgaŭ vin rekompenci. Pripensu, ke ni estas sur la tero nur por esti virtaj."

Jen, tiu vetera varmego altigis el la oceano vaporojn, kiuj kovris la insulon, kvazaŭ vasta sunombrelo. La

montosuproj amasigis ilin ĉirkaŭ sin kaj longaj fajraj fulmoj eliĝis de tempo al tempo el iliaj nebulkovritaj pintoj. Baldaŭ timigaj tondroj resonis en la arbaroj, sur la ebenaĵoj kaj en la valetoj: teruraj pluvoj, similaj al riverfaloj, falis de la ĉielo; ŝaŭmaj torentoj sin ĵetegis laŭlonge de la flankoj de tiu monto; la fundo de tiu ĉi enfermaĵo fariĝis kvazaŭ maro; la plataĵo, kie situas la kabanoj, fariĝis insuleto; kaj la enirejo al tiu valetoj fariĝis kluzo, de kie eliĝis, intermiksita kun brueganta akvo, tero, arboj kaj ŝtonegoj.

La tuta tremanta familio preĝis al Dio en la dometo de sinjorino de La Tour, kies tegmento terure krakis pro la penado de la vento. Kvankam la pordo kaj la fenestraj kovriloj estas fermitaj, ĉiuj objektoj distingiĝis tra la kunligiloj de la ĉarpentaĵo, tiel rapidaj kaj oftaj estis la fulmoj. Paŭlo, netimigebla, sekvata de Domingo, iris de unu dometo en la alian, malgraŭ la furioza ventego, ĉi tie firmigis muron per apogilo, kaj tie enŝovis foston; li reeniris por konsoli la familion, esperigante pri baldaŭa reveno de bela vetero. Efektive, en la vespero la pluvo ĉesis; la sudokcidenta kutima vento reblovis kiel ordinaro, kaj la subiranta suno aperis ĉe la horizonto.

Revidi sian ripozejon estis la unua deziro de Virginio. Paŭlo timeme alproksimiĝis al ŝi kaj prezentis sian brakon por sin helpi. Ridetante, ŝi akceptis kaj ili kune eliris el la dometo. La aero estis freŝa kaj sonora. Blankaj

fumoj montriĝis sur la flankoj de la monto, ĉi tie kaj tie strekitaj de ŝaŭmo de la ĉiaflanke sekiĝantaj torentoj. La ĝardeno estis tute renversita je teruraj kavaĵoj; plej multaj fruktarboj estis elradikigitaj; grandaj sablamasoj kovris la herbejlimojn kaj plenigis la banejon de Virginio. Tamen la du kokosarboj ankoraŭ staris tute verdaj; sed en la ĉirkaŭaĵo ne estis plu herbejo, nek laŭbo, nek birdo, escepte de kelkaj bengalfringoj, kiuj sur pinto de najbaraj ŝtonegoj ploris per plendaj kantoj la perdon de siaj idoj.

Vidante tiun ruinegaĵon, Virginio diris al Paŭlo: "Vi alportis tien ĉi birdojn; ilin mortigis la ventego. Vi plantis tiun ĝardenon, ĝi estas detruita. Sur la tero ĉio pereas; nur la ĉielo ne ŝanĝiĝas."

Paŭlo respondis: "Mi povu doni al vi ion el la ĉielo! sed mi nenion posedas, eĉ sur la tero."

Virginio diris ruĝiĝante: "Vi posedas la portreton de sankta Paŭlo."

Apenaŭ ŝi parolis pri tio, li kuris al la dometo de sia patrino por ĝin serĉi. Tiu portreto estis miniaturo prezentanta la ermiton Paŭlon: Margarito ĝin respektigis: ŝi longe portis ĝin pendanta ĉirkaŭ sia kolo, dum ŝi estis fraŭlino; poste, iĝinte patrino, ŝi metis ĝin ĉirkaŭ la kolo de sia ido. Eĉ okazis, ke dum sia gravediĝo, forlasita de ĉiuj, ŝi tiel admiris la figuron de la feliĉega dezertulo, ke ŝia filo iom similis lin; tio decidis ŝin doni al li la nomon

de la sanktulo, kiu pasigis sian vivon for de la homoj, kiuj ŝin mem trompis kaj forlasis.

Virginio, ricevante de Paŭlo tiun portreton, diris korduŝe: "Frato mia, dum mi vivos, ĝi neniam estos forprenata de mi kaj neniam mi forgesos, ke vi donis al mi vian solan posedaĵon en la mondo."

Aŭdante tiun amikan parolon, tiun neesperitan revenon al senĝeneco kaj amemo, Paŭlo volis ŝin kisi; sed tuj, vigla kiel birdo, ŝi forkuris, lasante lin mireganta, neniel komprenanta tiel eksterordinaran konduton.

Dume Margarito diris al sinjorino de La Tour: "Kial ni ne geedziĝu niajn gefilojn? Ili havas unu por la alia egan pasion, kiun mia filo ne ankoraŭ konscias. Kiam la naturo lin tuŝos, vane ni gardos ilin, ĉio estos timinda."

Sinjorino de La Tour respondis: "Ili estas tro junaj kaj tro malriĉaj. Kia ĉagreno al ni, se Virginio naskus idojn mizerajn, kiujn ŝi eble ne povus nutri! Via negro Domingo ja estas lacega; Mario estas kripla. Mi mem, kara amikino, de dek kvin jaroj sentas, ke mi tre malfortiĝis. Oni rapide maljuniĝas en varmaj landoj, kaj ankoraŭ pli rapide en ĉagrenado. Paŭlo estas nia sola espero. Ni atendu, ke la tempo estu forminta lian temperamenton kaj ke li povu nin subteni per sia laborado. Nun, vi scias, ni havas nur la ĉiutagan necesiĝon. Sed, veturigante Paŭlon al Hindujo dum kelka tempo, komercado liverus al li sumon necesan por aĉeti sklavon; kaj kiam li reve-

nos, li edziĝos kun Virginio, ĉar mi kredas, ke neniu povas fari mian Virginion pli feliĉa ol via filo Paŭlo. Ni parolos pri tio al nia najbaro.”

Efektive, tiuj sinjorinoj konsiliĝis kun mi kaj mi same opiniis kiel ili.

”La Hindaj maroj estas belaj,” mi diris. ”Elektante favoran sezonon por veturi Hindujojn, oni bezonas pleje sessemajnan vojaĝon kaj tiom same por la reveno. En mia kvartalo ni aranĝos komercaĵaron por Paŭlo, ĉar mi havas najbarojn, kiuj lin tre amas. Eĉ se ni donos al li nur krudan kotonon, kiun ni ne uzas pro manko da senŝeligiloj, ebonlignon, tiel oftan ĉi tie, ke oni ĝin uzas por hejtado, kaj kelkajn rezinojn, kiuj perdiĝas en niaj arbaroj: ĉio ĉi sufiĉe bone vendiĝas en Hindujo kaj estas al ni tute senutila tie ĉi.”

Mi prenis sur min la zorgon peti de sinjoro de La Bourdonnais permeson enŝipiĝi por tiu vojaĝo; kaj, antaŭ ĉio, mi volis pri tio sciigi Paŭlon. Sed kiel mi miregis, kiam tiu junulo diris al mi kun saĝo tre supera al sia juna aĝo: ”Kial vi volas, ke mi forlasu mian familion por ia nekonata projekto de riĉiĝo? Ĉu en la mondo ekzistas komerco pli profita ol kulturado de kampo, kiu kelkfoje redonas kvindek kaj cent por unu? Se ni volas komerci, ĉu ni ne povas tion fari, portante nian superfluan de ĉi tie al la urbo, ne bezonante, ke mi kuru tra Hindujo? Niaj patrinoj diras, ke Domingo estas maljuna kaj lace-

ga; sed mi estas juna kaj ĉiutage plifortiĝas. Dum mia foresto povus okazi ia malfeliĉo, precipe al Virginio, kiu jam estas malsaneta. Ho ne, ne, mi ne povos decidi ilin forlasi.”

Lia respondo ĵetis min en grandan embarason; ĉar sinjorino de La Tour ne kaŝis al mi la farton de Virginio kaj ŝian deziron atingi profiton de kelkaj jaroj, disigante tiujn gejunulojn. Tiujn kaŭzojn mi ne kuraĝis eĉ suspektigi al Paŭlo.

Dume ŝipo alveturinta el Francujo, alportis al sinjorino de La Tour leteron de ŝia onklino. La timo pri morto, sen kiu netuŝeblaj koroj neniam estus sentemaj, ŝin premis; ŝi ĵus suferis gravan malsanon longiĝintan kaj ne elkuraceblan pro ŝia maljuneco. Al sia nevino ŝi sciigis, ke ŝi veturu Francujon, aŭ, se ŝia farto malhelpus fari tiel longan vojaĝon, ŝi sendu Virginion, al kiu ŝi rezervos bonan edukon, edziĝon kun kortegulo kaj donacon de ĉiuj siaj bienoj; ŝi efektivigos siajn promesojn, ŝi diris, nur se ŝiaj ordonoj estos obeitaj.

Apenaŭ tiu letero estis legita en la familio, ĉiuj malgajegiĝis. Domingo kaj Mario ekploris. Paŭlo, senmova de miro, ŝajnis preta ekkoleri. Virginio, insiste rigardante al sia patrino, ne kuraĝis eldiri unu vorton. ”Ĉu vi povus nin forlasi nuntempe?” diris Margarito al sinjorino de Tour.

”Ne, amikino mia; ne, infanoj miaj,” respondis sinjorino de La Tour, ”mi ne forlasos vin. Mi vivis kun vi kaj kun vi mi volas morti. Feliĉon mi konis nur per via amikeco. Se mia farto estas malbona, aliaj ĉagrenoj estas la kaŭzo de tio. Mi estis korbvundita de la maldolĉeco de miaj parencoj kaj de la perdo de mia kara edzo. Sed de tiu tempo, mi konsoliĝis kaj feliĉiĝis kun vi, en ĉi tiuj mizeraj kabanoj, pli multe ol mi povis iam esperi el miaj familiaj riĉaĵoj en mia patrujo.”

Aŭdante tiun parolon, ĉiuj verŝis larmojn de ĝojo. Paŭlo, premante sinjorinon de La Tour en siaj brakoj, diris al ŝi: ”Mi ankaŭ ne forlasos vin; mi ne veturos Hindujon. Ni ĉiuj laboros por vi, kara patrineto; nenio iam mankos al vi kun ni.”

Sed el la tuta societo, Virginio estis plej ĝoja, kvankam ŝi tion ne montris. Dum la fino de la tago, ŝi ŝajnis dolĉe gaja kaj la reveno de ŝia trankvileco plej grandigis la ĝeneralan kontentecon.

La morgaŭan tagon je sunleviĝo, kiam ili ĵus kune preĝis laŭ kutimo antaŭ la matenmanĝo, Domingo sciigis ilin, ke rajdanta sinjoro sekvata de du sklavoj venas al la loĝejo. Tio estis sinjoro de La Bourdonnais. Li eniris la dometon, en kiu la tuta familio sidis ĉirkaŭ la tablo. Laŭ la tiea kutimo, Virginio ĵus servis kafon kaj rizon akve kuiritan. Al tio ŝi aldonis varmajn patatojn kaj freŝajn bananojn. La tuta teleraro konsistis el duonaj botelnu-

ksoj kaj la tolaĵaro estis nur folioj de bananarbo. La insulestro miris pro la malriĉeco de tiu dometo. Poste, alparolante sinjorinon de La Tour, li diris, ke la ĝeneralaj aferoj kelkfoje malhelpas, ke li pensu pri la privatuloj, sed ke ŝi havas multajn rajtojn kontraŭ li. "Vi havas," li aldonis, "sinjorino, en Parizo nobelan kaj tre riĉan onklinon, kiu konservas por vi siajn riĉaĵojn kaj atendas vin."

Sinjorino de La Tour respondis, ke ŝia malbona farto ne ebligas al ŝi fari tiel longan vojaĝon.

"Almenaŭ," diris sinjoro de LaBourdonnais, "vi ne povus senigi vian filinon je tiel granda heredaĵo sen maljusteco. Mi ne kaŝas al vi, ke via onklino petis la aŭtoritaton, ke oni venigu ŝin al ŝi. La oficistoj pri tio skribis, ke mi uzu mian potencon, se necese; sed ĉar mi ĝin uzas nur por feliĉigi la kolonianojn, mi esperas de via propra bonvolo kelkjaran oferon, de kiu dependas la establiĝo de via filino kaj la bonstato de via tuta vivo. Kial oni venas en tiun insulon? Ĉu ne por riĉiĝi? Ĉu ne estas pli agrable trovi la riĉecon en sia patrujo?"

Dirante tiujn vortojn, li metis sur la tablon dikan sakon da piastroj, portitan de unu el liaj negroj. "Jen," li kromdiris, "la preparaĵoj de via onklino por la vojaĝo de via filino."

Fine li afable riproĉis sinjorinon de La Tour, ke ŝi ne turnis sin al li, kiam ŝi bezonis ion kaj li tamen laŭdis ŝin

pro ŝia nobla kuraĝo. Paŭlo tuj ekparolis kaj diris al la insulestro: "Sinjoro, mia patrino sin turnis al vi kaj vi ŝin malbone akceptis."

"Ĉu vi havas alian idon, sinjorino?" demandis sinjoro de La Bourdonnais sinjorinon de La Tour.

"Ne, sinjoro," ŝi respondis, "tiu ĉi estas filo de mia amikino, sed li kaj Virginio estas komunaj inter ni kaj same karaj."

"Junulo," diris la insulestro al Paŭlo, "kiam vi eksperimentos pri la societo, vi konos la malfeliĉon de la registoj; vi scios, kiel senpene oni povas ilin antaŭaverti; kiel facile ili donas al intrigemaj malvirtuloj, tion ŝuldatan al tro modestaj merituloj."

Invitita de sinjorino de La Tour, sinjoro de La Bourdonnais sidiĝis ĉe la tablo apud ŝi. Li matenmanĝis laŭ kreola maniero, kafon miksitajn kun akve kuirita rizo. Li estis ĉarmita de la ordo kaj pureco de la malgranda domo, de la agordo de tiuj ambaŭ ĉarmaj familioj, eĉ de la fervoro de iliaj maljunaj geservistoj. "Estas tie ĉi," li diris, "nur lignaj mebloj; sed oni trovas ankaŭ kvietajn vizaĝojn kaj bonegajn korojn." Paŭlo, ĉarmita de la popolamo de la insulestro, diris: "Mi deziras esti via amiko, ĉar vi estas honesta homo." Sinjoro de La Bourdonnais plezure akceptis tiun insulanan amikaĵon. Li premis la manon de Paŭlo kaj certigis, ke li povos konfidi al li.

Post la manĝo li parolis aparte kun sinjorino de La Tour kaj diris, ke estos baldaŭa okazo por sendi ŝian filinon en Francujon sur tuj forveturonta ŝipo; ke li rekomendos ŝin al sia parencino kunvojaĝanta; ke ŝi ne rajtas forlasi tian grandegan riĉaĵon por kelkjara kontentiĝo. "Via onklino," li diris, "ne povos viveti pli ol du jarojn, ŝiaj amikoj sciigis min pri tio. Pripensu bone; riĉeco ne venas ĉiutage. Konsiliĝu kun vi mem; ĉiuj saĝuluj opinios kiel mi."

Al li ŝi respondis, ke, ĉar ŝi ne deziras en la mondo alian feliĉon ol feliĉon de sia filino, ŝia forveturo en Francujon estas decidota laŭ ŝia plaĉo."

Sinjorino de La Tour ne bedaŭris trovi okazon por disigi dum kelka tempo Virginion kaj Paŭlon, tiel preparante por la estonto ilian reciprokan feliĉon. Al sia filino ŝi do parolis aparte kaj diris: "Infano mia, niaj geservistoj estas maljunaj; Paŭlo estas tre juna, Margarito maljuniĝas; mi jam estas kripla: se mi mortus, kio okazus kun vi, malriĉa, meze de ĉi tiuj dezertaĵoj? Vi do restus sola; neniu povus tre helpi al vi; vi devus, por vivi, senĉese terkulturi kvazaŭ dungatino? Tia ideo al mi doloras."

Virginio respondis: "Dio kondamnis nin laboradi. Vi instruis min, ke mi laboru kaj benu Lin ĉiutage; Li ĝis nun ne forlasis nin; Li ankaŭ ne forlasos nin. Lia Providenco aparte zorgas pri la malfeliĉuloj. Tiom da fojoj vi

tion diris al mi, patrino mia! Mi ne povus decidi vin forlasi.”

SinJORINO de La Tour, kortuŝita, aldonis: ”Vin feliĉigi, kaj iam edzinigi kun Paŭlo, kiu ne estas via frato, jen mia sola projekto. Pripensu nun, ke lia riĉeco dependas de vi.”

Amanta junulino kredas, ke neniu scias pri tio; ŝi metas sur la okulojn sian surkoran vualon; sed kiam ĝin sublevas amika mano, tiam foriĝas la sekretaj amoĉagrenoj kvazaŭ tra malfermita barilo, kaj la antaŭajn singardojn kaj misterojn anstataŭas dolĉaj konfidoj. Virginio, danka pro la novaj certigoj pri la boneco de sia patrino, rakontis siajn internajn batalojn, kiujn sole Dio vidis; ŝi diris, ke ŝi vidas helpon de la Providenco en la aprobo de amema patrino, kiu gvidos ŝin per siaj konsiloj; ke nun, kiam ŝi estas subtenata de ŝia helpo, ĉio admonas ŝin, ke ŝi restu apud sia patrino, sen timo por la estanto nek por la estonto.

Vidante, ke ŝia konfidaĵo havas efikon kontraŭan al ŝia espero, sinJORINO de La Tour diris: ”Infano mia, mi ne volas vin perforti; konsiliĝu kviete kun vi mem; sed kaŝu al Paŭlo vian amon. Kiam koro de junulino kaptiĝis, ŝia amanto ne plu havas ion por peti de ŝi.”

En la vespero ŝi estis sola kun Virginio, kiam eniris altkreska homo, vestita de pastra blua vesto. Li estis ekleziulo, misiisto en la insulo kaj konfesprenanto de

sinjorino de La Tour kaj de Virginio. Li estis sendita de la insulestro: "Infanoj miaj," li diris, enirante, "estu laŭdata Dio! Jen, vi estas riĉaj. Vi povos kontentigi vian bonan koron, bonfaradi al la malriĉuloj. Mi scias, kion diris al vi sinjoro de La Bourdonnais kaj kion vi respondis. Bona patrino, via malbona farto vin devigas resti ĉi tie; sed vi, juna fraŭlino, vi ne havas ian pretekston. Oni devas obei la Providencon, niajn maljunajn, eĉ maljustajn parencojn. Tio ne estas ofero, sed ordono de Dio. Li donis sin por ni; laŭ Lia ekzemplo, ni devas nin doni por la familia bono. Via vojaĝo Francujon feliĉe finiĝos; ĉu vi ne volas tien veturi, kara fraŭlino?"

Virginio, mallevente la okulojn, respondis tremante: "Se tia estas la ordono de Dio, mi obeos. Estu la volo de Dio!" ŝi diris, plorante.

La misiisto foriris por raporti al la insulestro pri la sukceso de lia komisio. Tamen sinjorino de La Tour sendis al mi Domingon por peti, ke mi iru al ŝi, ĉar ŝi volas konsiliĝi kun mi pri la forveturo de Virginio. Mi tute ne opiniis, ke ŝi foriru. Mi konsideras kiel nepran principon de feliĉo, ke oni devas preferi la naturajn profitojn al riĉeco kaj ke ni ne serĉu malproksime tion, kion ni havas ĉe ni. Mi uzas tiun regulon por ĉio, senescepte. Sed kion povis miaj moderaj konsiloj kontraŭ iluzioj pri granda riĉeco kaj miaj naturaj argumentoj kontraŭ societaj antaŭjuĝoj kaj aŭtoritato, sankta por sinjorino de

La Tour? Tiu ĉi sinjorino do konsiliĝis kun mi nur por konveneco. Kaj ŝi ne ŝanceliĝis plu post la decido de ŝia konfesprenanto. Eĉ Margarito, kiu malgraŭ la profitoj espereblaj por ŝia filo sekve de la riĉigo de Virginio, forte kontraŭstaris al ŝia foriro, estis konsenta.

Paŭlo, kiu ne sciis pri la decido, miris pri la sekretaj interparoloj de sinjorino de La Tour kun sia filino kaj maldolĉe malgajiĝis. "Oni ion komplotas kontraŭ mi, ĉar oni sin kaŝas de mi."

Sed la famo pri la riĉigo de tiuj ŝtonanoj disvastiĝis en la insulo, kaj oni vidis ĉiuspecajn negocistojn tien alkurantajn. En tiuj mizeraj dometoj ili montris la plej riĉajn hindajn ŝtofojn: belegajn gondelurajn kotonajojn, paliakcitajn kaj mazulipatanajn tukojn, glatajn dakajn muslinojn, strekitajn, broditajn, travideblajn kvazaŭ taglumo, suratajn baftasojn tiel bele blankajn, ĉiukolorajn kaj plej maloftajn hindajn, katunojn kun nigra fundo kaj verdaj branĉetoj. Ili malvolvis belegaĵn ĉinajn silkoŝtofojn, "lampasojn" tratanĉitajn, damaskojn brilblankajn, aliajn herboverdajn, aliajn ruĝegajn; rozkolorajn taftojn, dikegajn atlasojn; pekinsilkojn dolĉajn kiel drapo, blankajn kaj flavajn nankinsilkojn, eĉ madagaskarajn antaŭtukojn.

Sinjorino de La Tour volis, ke ŝia filino aĉetu ĉion, kion ŝi deziras; ŝi nur atentis la prezon kaj la kvaliton de la komercaĵoj, timante ke la negocistoj ŝin trompos. Vir-

ginio elektis ĉion agrablan por sia patrino, Margarito kaj ŝia filo. "Tio," ŝi diris, "taŭgas por mebloj, tio por la uzao de Mario kaj Domingo." Fine la sako da piastroj estis jam malplenigita kaj ŝi ne ankoraŭ estis pensinta pri siaj propraj bezonoj. Oni devis repreni ŝian porcion el la donacoj, kiujn ŝi faris al la societo.

Paŭlo premata de doloro ĉe la vido de tiuj riĉaj donacoj, kiuj antaŭmontris la foriron de Virginio, venis al mi post kelkaj tagoj. Li diris al mi, premegate: "Mia fratino baldaŭ foriros; ŝi jam antaŭpretigis ĉion por la vojaĝo. Venu hejmen, mi vin petas. Uzu vian influon al la spirito de ŝia kaj de mia patrino por ŝin reteni." Mi cedis al la petegoj de Paŭlo, kvankam estante certa, ke miaj konsiloj estos senefikaj.

Se Virginio, vestita per blua bengala tolo kun ruĝa tuko ĉirkaŭ la kapo, ŝajnis al mi ĉarma, tiu impresio ankoraŭ pliiĝis, kiam mi vidis ŝin ornamita laŭ la maniero de la ĉi tieaj sinjorinoj; ŝi estis vestita per blanka muslino kaj rozkolora tafta subŝtofo; ŝia gracia kaj alta talio aperis perfekta sub la korseto, kaj ŝiaj blondaj haroj, plektitaj en du harligoj, mirinde akordiĝis kun ŝia virga kapo; ŝiaj belaj blujaj okuloj estis melankoliaj kaj ŝia koro, agitata de batalata pasio, donis vivan koloron al la vizaĝo kaj kortuŝan tonon al la voĉo. La kontrasto mem de ŝia eleganta ornamaĵo, kiun ŝi ŝajnis konservi kontraŭvole, faris ŝian konsumiĝon pli kortuŝa. Neniu po-

vis ŝin vidi, nek aŭdi, senkompate. La malĝojeco de Paŭlo pliiĝis pro tio.

Margarito, malĝojigita de la stato de sia filo, diris al li aparte: "Kial nutri vanan esperon, kiu faras la malriĉecon ankoraŭ pli maldolĉa, filo mia? Jen venos la tempo por malkovri al vi la sekreton de via kaj mia vivo. Fraŭlino de La Tour, per sia patrino, estas parenca kun riĉa nobelino: vi estas nur filo de malriĉa kamparanino kaj, des pli malbone, vi estas bastardo."

Tiu vorto bastardo tre mirigis Paŭlon, kiu neniam aŭdis ĝin; li demandis pri ĝia signifo sian patrinon, kiu respondis: "Vi ne havis laŭleĝan patron. Kiam mi estis fraŭlino, amo instigis min fari senprudentaĵon, kies frukto vi estas. Mia kulpo vin senigis de via patra familio kaj mia pento vin senigis de via patrina familio. Malfeliĉulo, mi estas via sola kunfamiliano en la mondo!" Kaj ŝi ekploris.

Paŭlo, premante ŝin en siaj brakoj, diris: "Ho, patrino mia! Ĉar vi estas mia sola parencino en la mondo, mi vin amos pli multe. Sed kian sekreton vi ĵus malkovris al mi! Mi nun komprenas, kial fraŭlino de La Tour sin fortentas de mi de du monatoj kaj kial ŝi decidis nun forveturi. Ha! sendube ŝi malsatas min!"

Tamen, je la horo de vespermanĝo, oni sidiĝis ĉirkaŭ la tablon, kie tiu el la manĝantoj, agitata de diversaj sentoj, malmulte manĝis kaj ne parolis. Virginio, la unua,

eliris kaj sidiĝis en la lokon, kie ni nun estas. Paŭlo baldaŭ sekvis ŝin kaj sidiĝis apude. Ambaŭ profunde silentis dum kelka tempo. Tio estis dum unu el tiuj ravaj noktoj, tiel oftaj en la tropikoj, kaj kies belecon ne reproduktus la plej lerta pentristo. La luno, ĉirkaŭata de nuboj, iom post iom forigataj de siaj radioj, aperis meze de la ĉielo; ĝia heleco netakseble disvastiĝis super la montoj de la insulo kaj la pintoj, kiuj brilis arĝenteverdaj. La ventoj kvazaŭ retenis sian blovadon. En la arbaroj, ĉe la fundo de la valoj, sur la supro de la ŝtonegoj, oni aŭdis krietojn, dolĉajn murmurojn de birdoj, kiuj ĝojigitaj de la hela nokto kaj kvieta aero, sin karesis en la nestoj; ĉiuj, eĉ insektoj, bruatis en herbo.

La steloj brilis sur la ĉielo kaj rebrilis sur la maro, kiu reproduktis iliajn tremantajn figurojn. Virginio senatente rigardis la vastan, malhelan maran horizonton, diferencigatan de la bordo de la ruĝaj fajroj de la fiŝkaptistoj. Apud la enirejo al la haveno ŝi ekvidis lumon kaj ombbron: ĝi estis la lumo kaj korpo de la ŝipo, sur kiu ŝi estis veturonta Eŭropon; preta por forveturi, ĝi atendis ankore la finiĝon de la mara kvieteco. Je tiu vido, ŝi konfuziĝis kaj turnis la kapon, por ke Paŭlo ne vidu ŝian ploron.

Sinjinorino de La Tour, Margarito kaj mi sidis, je kelkaj paŝoj, sub la bananarboj; kaj tra la silento de la nokto ni klare aŭdis ilian interparolon, kiun mi ne forgesis.

Paŭlo diris: "Fraŭlino, vi foriros, oni diras, post tri tagoj. Vi ne timas la mardanĝerojn ... la maron, kiu vin tiel terurigas."

"Mi devas obei miajn parencojn, mian devon," respondis Virginio.

"Vi forlasas nin," aldonis Paŭlo, "por malproksima parenco, kiun vi neniam vidis!"

"Ve!" diris Virginio, "mi volis resti ĉi tie; tion ne volis mia patrino. Mia konfesprenanto diris, ke mia foriro estis la volo de Dio, ke la vivo estas elprovado ... Ho! ĝi estas vere maldolĉa provado!"

"Kiel!" respondis Paŭlo, "tiom da kaŭzoj vin decidis kaj neniu vin retenis! Ha! ekzistas ankoraŭ unu, kiun vi ne diras. Riĉeco estas alloga. Vi baldaŭ trovos en la nova mondo iun, kiun vi nomos frato, ĉar vi min ne plu nomas tiamaniere. Tiun fraton vi elektos inter viaj samranguloj, kiuj prezentos al vi nobelecon kaj riĉecon, kiujn mi ne povas proponi. Sed por esti pli feliĉa, kien vi volas iri? En kiun teron vi elŝipiĝos, pli karan ol via naskoloko? Kie vi formos pli amindan societeton ol tiun, kiu vin amas? Kiel vi vivos sen la kutimaj karesoj de via patrino? Kio fariĝos de ŝi mem, jam maljuna, kiam ŝi ne plu vidos vin apud si, ĉirkaŭ la tablo, en la domo, sur la promenejo, kie ŝi sin apogis sur vin? Kio fariĝos de mia patrino, kiu vin amegas tiom, kiom la via? Kion mi diros al unu kaj al la alia, kiam mi vidos ilin plorantaj pro via

foresto? Kruelulino! Mi ne parolas pri mi; sed kio de mi mem fariĝos, kiam mi ne plu vidos vin kun mi en la mateno, kiam ni ne estos kune ĉe la noktiĝo? Kiam mi ekvidos tiujn ĉi du palmojn, plantitaj je nia naskiĝo kaj tiel longe atestantaj pri nia reciproka amikeco? Ha! Ĉar nova sorto vin tuŝas, ĉar vi serĉas alian landon ol vian naskolokon, alian bienon ol tiun preparitan de miaj laboroj, lasu min akompani vin sur la ŝipo, per kiu vi forveturos. Mi vin trankviligos dum la ventegoj, kiuj tiel terurigas al vi sur la tero. Mi ripozigos vian kapon sur mia brusto, mi varmigis vian koron kontraŭ mia koro kaj en Francujo, kien vi iras por serĉi riĉecon kaj altrangecon, mi servos al vi kvazaŭ sklavo. Feliĉa pro via sola feliĉo, en tiuj hoteloj, kie mi vin vidos servata kaj adorata, mi estos ankoraŭ sufiĉe riĉa, sufiĉe nobla por fari al vi la plej grandan oferon, mortante ĉe viaj piedoj.”

La ploregoj konfuzis lian voĉon kaj mi tuj aŭdis Virginion, kiu diris al li tiujn vortojn interrompatajn de ĝemoj: ”Por vi, mi foriras ... por vi, kiun mi vidis ĉiutage lacigita de laborado por nutri du kriplajn familiojn. Se mi konsentas la okazon riĉigi, ĝi estis por milfoje redoni al vi la bonon, kiun vi faris al ni; ĉu riĉeco estas preferinda al via amikeco? Kion vi diras pri via naskiĝo? Ha! Se estus ankoraŭ eble doni al mi fraton, ĉu alian mi elektus ol vin? Ho! Paŭlo! ho, Paŭlo, multe pli kara ol frato vi estas por mi! Kiom mi suferis por vin forigi de mi! Mi

volis, ke vi helpu min mem disduiĝi, ĝis la ĉielo povos beni nian kuniĝon. Nun mi restas, mi foriras, mi vivas, mi mortas: faru el mi, kion vi volas. Senvirtulino! mi povis kontraŭstari al viaj karesoj, kaj vian doloron mi ne povas elporti!”

Andante tiujn vortojn, Paŭlo ŝin prenis en siajn brakojn kaj premegante, li ekkriis kun terura voĉo: ”Mi foriros kun ŝi! Nenio povas min forpeli de ŝi!”

Ni ĉiuj kuris al li. Sinjorino de La Tour diris: ”Filo mia, se vi nin forlasos, kio fariĝos de ni?”

Li, tremante, ripetis tiujn vortojn: ”Filo mia ... filo mia ... Vi, patrino,” li diris, ”vi kiu disigas fraton de fratino! Ni ambaŭ suĉis vian lakton; ambaŭ, edukitaj sur viaj genuoj, ni lernis de vi ami unu la alian; ni ambaŭ tion diris multfoje. Kaj nun vi forigas ŝin de mi! Vi sendas ŝin en Eŭropon, en tiun barbaran landon, kiu rifuzis al vi rifuĝejon, al kruelaj parencoj, kiujn vi mem forlasis. Vi diros al mi: Vi ne havas plu ian rajton sur ŝi; ŝi ne estas via fratino. Por mi ŝi estus ĉio, mia riĉeco, mia familio, mia nobeleco, mia tuta bieno. Alian mi ne konas. Nur unu tegmenton, nur unu lulilon ni havis, nur unu tombon ni havos. Se ŝi foriras, mi devas ŝin sekvi. La insulto tiun malhelpos? Ĉu li malhelpos, ke mi ĵetu min en maron? Mi sekvos ŝin naĝante. La maro ne povos esti pli pereiga ol la tero. Ĉar mi ne povas vivi tie ĉi kun ŝi, almenaŭ mi mortos antaŭ ŝiaj okuloj, for de vi, kruela

patrino! Senkompata virino! Tiu oceano, sur kiun vi ŝin metas, neniam redonu ŝin al vi! Reportu ĝiaj ondoj mian korpon kaj ĝin rulante kun ŝia korpo inter la ŝitonoj de tiu marrando, ili anoncu al vi eternan doloron pro la perdo de viaj ambaŭ infanoj.”

Je tiuj vortoj, mi prenis lin en miajn brakojn; ĉar la malespero forpelis de li la saĝon. Liaj okuloj brilegis; lia brulanta vizaĝo ŝvitegis; liaj genuoj tremis kaj mi sentis, tra lia flama brusto, rapidegan korbataĉon.

Virginio terurigita diris: ”Ho, amiko mia! mi certigas, pro la plezuroj de nia infaneco, viaj kaj miaj malfeliĉoj kaj ĉio, kio kunligas por eterne du malfeliĉulojn, ke, se mi restos, nur por vi mi vivos; se mi foriros, iam mi revenos por aparteni al vi. Vi ĉiuj, kiuj min edukis dum mia infaneco, kiuj disponas mian vivon kaj vidas miajn larmojn, estu miaj atestantoj. Mi tion ĵuras je la ĉielo min aŭdanta, je la maro transirota de mi, je la aero, kiun mi enspiras, kaj neniam malpuriĝis per mensogo.”

Kiel suno fandas kaj ĵetegas glacieron el Apenina supro, tiel same malaperis la bolanta kolero de tiu junulo, ĉe la aŭdo de la voĉo de la amatino. Lia fiera kapo malleviĝis kaj ploregoj fluis el liaj okuloj. Lia patrino, miksante siajn larmojn kun liaj, ĉirkaŭprenis lin, ne povante paroli. Sinjorino de La Tour, elrenversita, diris al mi: ”Mi ne kuraĝas kontraŭstari; mia animo estas disŝirata. Tiu

malfeliĉa vojaĝo ne okazos. Najbaro mia, provu forkonduki mian filon. De ok tagoj, neniuj dormis tie ĉi.”

Mi diris al Paŭlo: ”Amiko, via fratino restos. Morgaŭ ni parolos al la insulestro; lasu vian familion ripozi kaj venu al mi por pasigi la nokton. Estas malfrue, estas noktomeze; la suda stelkruceto estas rekta ĉe la horizonto.”

Li lasis sin konduki, nenion dirante kaj post tre malvieta nokto leviĝis ĉe la tagiĝo kaj reiris en sian loĝejon.

Sed ĉu mi bezonas daŭrigi pli longe tiun rakonton? Nur unu flanko en la homa vivo estas agrabla por konatiĝi: Simila al nia globo turnanta, nia rapida rotado daŭras nur unu tagon, kaj parto de tiu tago povas ricevi lumon, nur se la alia estas en mallumo.

”Patro,” mi diris, ”mi petegas vin, daŭrigu rakonti tion, kion vi tiel kortuŝe komencis. La raportoj pri feliĉo plaĉas al ni; sed tiuj pri malfeliĉo nin instruas. Kio fariĝis, mi petas, el la malfeliĉa Paŭlo?”

La unua persono vidita de Paŭlo, reirante hejmen, estis la negrino Mario kiu, suririnte sur ŝtonego, rigardis la maran malproksimaĵon. Li kriis al ŝi de kiel eble plej malproksime: ”Kie estas Virginio?”

Mario turnis la kapon al sia juna mastro kaj ekploris. Paŭlo, sensencigita, returnen iris kaj kuris al la haveno. Li tie eksciis, ke Virginio enŝipiĝis je la tagiĝo, ke ŝia ŝipo

tuj forveturis kaj ke ĝi ne estas plu videbla. Li reiris la loĝejon, kiun li trapasis, nenion dirante al iu.

Kvankam tiu ŝtonega zono ŝajnas post ni preskaŭ vertikala, tamen tiuj verdaj plataĵoj, kiuj dividas ĝian altecon, formas tiom da etaĝoj, per kies kelkaj malfacilaj vojetoj oni alvenas ĝis la piedo de tiu kliniĝanta kaj neatingebla ŝtonega konuso, nomata *Dikfingro*. Je la fundamento de tiu ŝtonego kuŝas ebenaĵo kovrata de grandaj arboj, sed tiel alta kaj kruta, ke ĝi estas kvazaŭ granda arbaro enaera, ĉirkaŭata de teruregaj profundegaĵoj. La nuboj, senĉese altiritaj de la supro de *Dikfingro*, provizas tie multajn riveretojn, kiuj falas tiel profunden en la fundon de la postmonta valo, ke de tiu altaĵo oni ne aŭdas la bruon de ilia falo. De tiu loko oni vidas grandan parton de la insulo kun ĝiaj montetoj, superataj de pintoj, interalie *Pieter Booth* kaj *Tri mamoj*, kun iliaj arbarplenaj valetoj; kaj poste la plenmaron kaj insulon *Bourbon*, kiu situas je kvardek leŭkoj de tie ĉi, okcidente.

De tiu altaĵo Paŭlo ekvidis la ŝipon, sur kiu forveturis Virginio. Li ĝin vidis malproksime, je pli ol dek leŭkoj, ŝajnanta kvazaŭ nigra punkto en la mezo de la maro. Dum parto de la tago li tie restis, tute okupata je ĝia rigardado: ĝi jam estis malaperinta, kiam li kredis, ke li ĝin ankoraŭ vidas. Kiam ĝi perdiĝis en la horizonta nebulo, li sidiĝis en tiu sovaĝa loko, ĉiam batata de la ventoj, senĉese skuantaj la suprojn de la palmoj kaj de la tata-

makoj. Ilia mallaŭta kaj muĝa murmurado similas malproksiman bruon de orgenoj kaj inspiras profundan melankolion. Tie mi trovis Paŭlon, kun la kapo apogita kontraŭ ŝtonego kaj la okuloj mallevitaj al la tero. Mi marŝis al li jam de la sunleviĝo: mi kun granda peno decidigis lin remalsupreniri kaj revidi lian familion. Mi tamen rekondukis lin al lia loĝejo; kaj revidante sinjorinon de La Tour, li maldolĉe plendis, ke ŝi lin trompis. Sinjorino de La Tour diris al ni, ke, ĉar vento ekblovis je la tria horo matene, la ŝipo estis forveturonta; tiam la insulestro sekвата de parto el lia stabo kaj de la misiisto, palankene venis por serĉi Virginion. Malgraŭ ŝiaj propraj argumentoj, ŝiaj larmoj kaj la ploroj de Margarito, kriante ke tio estis por la bono de ĉiuj, ili forkondukis ŝian filinon duonmortintan.

”Se mi almenaŭ estus adiaŭinta ŝin,” diris Paŭlo, ”mi estus nun trankvila. Mi estus al ŝi dirinta: Virginio, se, dum nia kunvivado, mi diris ian ofendan parolon, antaŭ ol vin forlasi por eterno, diru al mi, ke vi tion pardonas. Mi estus al ŝi dirinta: Ĉar mi vin neniam revidos, adiaŭ, kara Virginio mia, adiaŭ! Vivu malproksime de mi, kontenta kaj feliĉa.”

Kaj, ĉar li vidis, ke lia patrino kaj sinjorino de La Tour ploras, li diris: ”Nun serĉu alian ol min por viŝi viajn larmojn!” kaj li foriris ĝemante kaj vagis tien ĉi kaj tien en la loĝejo. Li trairis ĉiujn lokojn plej amitajn de Virginio.

Li diris al ŝiaj kaprinoj kaj al la kapridetoj, kiuj lin sekvis, blekante: "Kion vi petas de mi? vi ne revidos plu kun mi tiun, kiu proponis nutraĵon al vi en ŝia mano." Li iris al la Ripozejo de Virginio kaj je la vido de la ĉirkaŭflugantaj birdoj, li ekkriis: "Malfeliĉaj birdoj, vi ne plu flugos al via bona nutrantino." Kaj vidante Fidelan flaranta ĉi tie kaj tie kaj antaŭmarŝanta flarserĉante, li ekĝemis kaj diris: "Ho! neniam vi ŝin retrovos." Fine li sidiĝis sur la ŝtonegon, kie li parolis kun ŝi la hieraŭan tagon; kaj je la vido de la maro, sur kiu li vidis la forveturantan ŝipon malaperanta, li ploris.

Dume ni sekvis lin paŝe-post-paŝe, timante ian pereigan sekvon de lia spirita konfuzeco. Lia patrino kaj sinjorino de La Tour petis, per plej karesaj esprimoj, ke li ne pliigu ilian doloron per sia malespero. Fine tiu ĉi lasta sukcesis lin kvietigi, ripetante la plej esperigajn nomojn: ŝi nomis lin sia kara filo, sia bofilo, la edziĝonto de sia filino; ŝi admonis, ke li reiru hejmen kaj manĝu ian nutraĵon. Li sidiĝis ĉe la tablo, apud la loko ordinaro difinita por sia kunulino; kaj, kvazaŭ ŝi ankoraŭ okupus ĝin, li alparolis ŝin kaj prezentis la manĝaĵojn, kiujn ŝi plej ŝatis; sed, tuj kiam li ekvidis sian eraron, li ekploris. La sekvantajn tagojn li kolektis ĉion, kion ŝi uzis por siaj propraj bezonoj, la lastajn bukedojn portitajn de ŝi, koston, el kiu ŝi kutime trinkis; kaj kvazaŭ tiuj restaĵoj estus la plej valoraj objektoj en la mondo, li kisis ilin kaj

metis sur sian bruston. Sukceno ne havas tiel dolĉan odoron, kiel objektoj tuŝitaj de amatino. Fine, vidante, ke liaj bedaŭroj pliigas la ĉagrenon de lia patrino kaj de sinjorino de La Tour, kaj ke la familiaj bezonoj postulas senĉesan laboradon, li ekriparis la ĝardenon, kun la helpo de Domingo.

Baldaŭ tiu junulo, indiferenta kiel ĉiuj kreoloj pri la aferoj okazantaj en la mondo, petis, ke mi instruu lin legi kaj skribi, por ke li povu korespondi kun Virginio. Li volis poste studi geografion por koni la landon, en kiun ŝi elŝipiĝos, kaj la historion por ekscii pri la moroj de la societo, en kiu ŝi vivos. Tiel same, pro la amo, li perfektigis en terkulturado kaj en agrabla aranĝado de la plej malebena teraĵo. Sendube plej multajn sciencojn kaj artojn la homoj ŝuldas al la ĝuado instigita de tiu flama kaj malkvieta pasio, kaj de ĝia manko naskiĝis filozofie, kiu instruas konsoliĝi pri ĉio. Tiel naturo farinte el amo la ligilon de ĉiuj estaĵoj, faris ĝin la unua kaŭzo de niaj societoj kaj la instigilo de niaj sciaĵoj kaj plezuroj.

Paŭlo ne tre ŝatis studadon de geografio, kiu, anstataŭ priskribi la naturon de ĉiu lando, prezentas nur ĝiajn politikajn dividaĵojn. Historio, kaj precipe nuntempa historio, ne interesis lin pli multe. Li vidis en ĝi nur ĝeneralajn kaj periodajn malfeliĉojn, kies kaŭzojn li ne konis; senpravajn kaj sencelajn militojn, malklarajn intrigojn kaj malhumanajn regnestrojn. Li preferis lega-

don de romanoj, kiuj, ĉar ili sin okupas pli multe pri homaj sentoj kaj interesoj, prezentis kelkfoje statojn similajn al la lia. Tial neniu libro tiel plezurigis lin kiel Tele-mako, pro ĝiaj priskriboj de kampara vivado kaj naturaj homkoraj pasioj. Li legis al sia patrino kaj al sinjorino de La Tour ĝiajn preferitajn eltiraĵojn; tiam, ekscitita de kortuŝaj rememoroj, lia voĉo konfuziĝis kaj larmoj fluis el liaj okuloj. Al li ŝajnis rekoni en Virginio la noblan fierecon kaj saĝecon de Antiopo, kun la malfeliĉoj kaj amemo de Eŭkario. Aliflanke li estis tute terurigata de la legado de niaj modaj romanoj, plenaj de malmoralaj moroj kaj sentencoj, kaj, kiam li eksciis, ke tiuj romanoj vere priskribas la eŭropajn societojn, li ektimis, ne sen ia praveco, ke Virginio malvirtiĝos aŭ lin forgesos.

Efektive, pasis pli ol unu jaro kaj duono, dum kiu sinjorino de La Tour havis nenian sciigon pri sia onklino kaj sia filino: ŝi nur eksciis, per alia persono, ke Virginio feliĉe alvenis Francujon. Fine ŝi ricevis, per ŝipo alveturanta Hindujon, pakaĵeton kaj leteron skribitan de Virginio. Malgraŭ la singardemo de ŝia aminda kaj indulgema filino, ŝi juĝis, ke ŝi estas tre malfeliĉa. Tiu letero tiel bone priskribas ŝian staton kaj karakteron, ke mi ĝin preskaŭ laŭvorte rememoras.

”Tre kara kaj amata patrineto,

Jam multajn leterojn mi skribis al vi; sed, ĉar mi ne ricevis respondon, mi timas, ke ili ne alvenis al vi. Mi espe-

ras ke ĉi tiu, dank'al mia antaŭzorgo, sciigos vin pri mi kaj ebligos al mi ricevi novaĵojn pri vi.

Mi verŝis multajn larmojn de nia disiĝo, mi, kiu antaŭe preskaŭ neniam ploris, escepte pri la malfeliĉoj de aliaj personoj. Mia onklino estis tre konfuzita je mia alveno, kiam min demandinte pri miaj talentoj, mi diris al ŝi, ke mi scias nek legi, nek skribi; ŝi demandis min, kion mi do studis de mia naskiĝo; kaj kiam mi respondis, ke mi povas zorgi pri mastrumado kaj fari ŝian volon, ŝi diris, ke tio estas edukiteco de servistino. La postan tagon ŝi kondukis min apud Parizo en abatejon, kie mi havis ĉiuspecajn instruistojn: ili edukis min, interalie, pri historio, geografio, gramatiko, matematiko kaj ĉevalrajdado; sed mi tiel malmulte inkliniĝas por ĉiuj tiuj sciencoj, ke mi ne progresos kun tiuj sinjoroj. Mi sentas, ke mi estas sensprita mizerulino, kiel ili diras. Tamen la bonaĵoj de mia onklino ne malpliĝas: ĉiusezone ŝi donas al mi novajn vestojn; ŝi metis apud mi du servistinojn, kiuj estas tiel bone ornamataj kiel altrangaj sinjorinoj; ŝi donis al mi la titolon grafino; sed ŝi aliigis mian nomon La Tour, kiu estis al mi tiel kara kiel al vi, pro ĉio, kion vi rakontis pri la suferoj elportitaj de mia patro por edziĝi kun vi: ŝi anstataŭis vian edzinan nomon per la familia, kiu tamen estas al mi ankoraŭ kara, ĉar ĝi estas via fraŭlina nomo. Vidante min tiel riĉa, mi petegis, ke ŝi sendu al vi kelkajn helpaĵojn. Kiel raporti ŝian respondon? Sed vi ĉiam admonis, ke mi diru la veron.

Al mi do ŝi respondis, ke malmulto utilas al vi por nenio kaj multo vin embarasus pro via simpla vivo. Mi unue provis vin sciigi pri mi per fremda mano, pro manko de mia. Sed, ĉar alvenante ĉi tien mi konis neniun konfidindan, tage kaj nokte mi penis lerni legadon kaj skribadon; Dio bonvolis, ke mi sukcesu post malmulte da tempo. Mi komisiis al la ĉi tieaj sinjorinoj sendadon de miaj unuaj leteroj; mi pensas, ke ili redonis ilin al mia onklino. Tiu ĉi fojon, mi turnis min al kunedukativo mia: viajn respondojn mi petas, ke vi skribu laŭ ŝia ĉi tie aldonita adreso. Mia onklino malpermesis al mi ĉian korespondadon eksteren, ĉar tio povus, laŭ ŝia opinio, kontraŭstari al ŝiaj grandaj projektoj pri mi. Nur ŝi povas min viziti tra krado, kaj ankaŭ maljuna nobelo el ŝiaj amikoj, kiu, ŝi diris, min tre ŝatus. Vere parolante, mi tute ne ŝatus lin, eĉ se mi povus iun ami.

Mi vivas meze de brilo de riĉeco kaj mi ne povas disponi eĉ unu moneron. Oni diras ke, se mi havus monon, tio povus havi gravajn sekvojn. Eĉ miaj vestoj apartenas al miaj servistinoj, kiuj interkverelas pri ili, antaŭ ol mi ilin formetis. Inter riĉaĵoj, mi estas multe pli malriĉa ol mi estis, kiam mi vivis kun vi, ĉar mi havas nenion por donaci. Kiam mi vidis, ke la grandaj kapabloj, pri kiuj oni min instruas, ne ebligos eĉ iomete bonfari, mi turnis min al mia kudrilo, pri kies uzo vi feliĉe min instruis. Mi do sendas kelkajn de mi faritajn parojn da ŝtrumpoj por vi kaj panjo

Margarito, ĉapon por Domingo kaj unu el miaj ruĝaj tukoj por Margarito. Al ĉi tiu pakajeto mi aldonas grajnoj kaj kernojn el la fruktoj de miaj manĝaĵoj kun ĉiaspecaj arbosemoj, kiujn mi kolektis en la abateja parko dum la ludaj horoj. Mi ankaŭ aldonis semojn de violoj, lekantoj, akraj ranunkoloj, grenpapavoj, cejanoj, skabiozoj, kiujn mi kolektis sur la kampoj.

”En la ĉi tieaj herbejoj estas pli belaj floroj ol en niaj, sed neniu atentis pri ili. Mi estas certa, ke vi kaj panjo Margarito estos pli kontentaj pro ĉi tiu sako da grajnoj ol pro la sako da piastroj, kaŭzo de nia disiĝo kaj de miaj larmoj. Estos al mi granda ĝojo, se vi havos iam plezuron vidi, ke pomarboj kreskas apud niaj bananarboj kaj ke fagoj miksas sian foliaron kun la folioj de niaj kokosarboj. Vi kredos, ke vi estas en Normandujo, kiun vi tiel amas.

”Vi postulis, ke mi sciigu vin pri miaj ĝojoj kaj ĉagrenoj: ĝojon mi ne havas plu, for de vi, la ĉagrenojn mi malpliigas, pensante, ke mi estas en loko, kien vi sendis min laŭ la volo de Dio. Neniu ĉi tie parolas kun mi pri vi, kaj kun neniu mi povas pri vi paroli: jen estas mia plej granda ĉagreno. Miaj servistinoj, aŭ pli guste la servistinoj de mia praonklino, ĉar ili estas pli ŝiaj ol miaj, diras, kiam mi provas ekparoli pri miaj geamatoj: ”Fraŭlino, rememoru, ke vi estas francino kaj ke vi devas forgesi la landon de la sovaĝuloj!” Ha! pli volonte min mem mi forgesus, ol la lokon, kie mi naskiĝis, kie vi vivas! Tiu ĉi lando, kie mi

nun loĝas, estas por mi lando de sovaĝuloj; ĉar mi vivas sola, konante neniun konfidindan por priparoli la amon, kiun ĝis en la tombo havos por vi, tre kara kaj amata patrineto,

Via obeema kaj amema filino,

VIRGINIO DE LA TOUR.

Mi rekomendas al via boneco Marion kaj Domingon, kiuj tiel multe zorgis pri mi dum mia infaneco; karesu por mi Fidelon, kiu retrovis nin en la arbaro.”

Paŭlo tre miris, ke Virginio tute ne parolas pri li, dum ŝi forgesas eĉ ne la doman hundon: sed li ne sciis ke, kiel ajn longa estas letero de virino, sian plej karan personon ŝi metas nur en la fino.

En postskribo, Virginio speciale rekomendis al Paŭlo du specojn da grajnoj: la violojn kaj la skabiozojn. Al li ŝi donis kelkajn sciigojn pri la naturo de tiuj kreskaĵoj kaj pri la lokoj, kie oni povas ilin semi.

”La violo,” ŝi skribis, ”produktas malpalan violkoloran floretan, kiu emas sin kaŝi sub la tufegoj, sed ĝia ĉarmaodoro tuj malkovrigas ĝin.” Li ŝirmu ĝin, ŝi admonis, ĉe la fontbordo, apud ŝia kokosarbo. ”La skabiozoj,” ŝi aldonis, ”kreskigas beletan palebluan floran, kun nigra fundo blanke punktita. Oni kredus, ke ĝi estas en funebro; tial oni nomas ĝin ankaŭ floro de vidvino; ĝi ŝatas la malglatajn lokojn, batatajn de la ventoj.” Tiun floran,

ŝi petis, li ŝirmu sur la ŝtonegon, kie ŝi parolis kun li dum la nokto por la lasta fojo kaj tiun ŝtonegon li nomu, pro amo al ŝi, *Roko de la adiaŭo*. Tiujn semojn ŝi enfermis en tre simpla teksita monujeto, kiu ŝajnis altegvalora al Paŭlo, kiam li ekvidis P. kaj V. kunplektitajn kaj formitajn el haroj, kiujn li opiniis aparteni al Virginio, pro ilia beleco.

La letero de tiu sentoplina kaj virta fraŭlino plorigis la tutan familion; ŝia patrino respondis, en la nomo de la societo, ke ŝi povas, laŭ sia plaĉo, resti aŭ reveni; ŝi certigis, ke ili ĉiuj perdis la plej bonan parton de sia feliĉo kaj ke ŝi mem precipe estas ne konsolebla.

Paŭlo skribis al ŝi tre longan leteron, en kiu li certigis, ke li tuj faros la ĝardenon inda je ŝi kaj miksos la eŭropajn plantojn kun la afrikaj, same kiel ŝi intermiksas la nomojn en sia trikaĵo. Li sendis perfekte maturajn fruktojn de la kokosarboj de ŝia fonto. Alian insulan semon li ne aldonis, li skribis, por ke la deziro revidi tiajn produktojn ŝin decidigu baldaŭ reveni. Li petegis, ke ŝi plej rapide kontentigu la flamajn dezirojn de ilia familio kaj liajn aparte, ĉar li nun povas ĝui nenian ĝojon, estante malproksime de ŝi.

Paŭlo zorge, plej zorge semis la eŭropajn grajnoj, kaj precipe la violojn kaj skabizojn, kies floroj ŝajnis iel simili la karakteron kaj staton de Virginio, kiu tiel speciale rekomendis ilin; sed, ĉu ĉar ili velkis dum la vojaĝo,

ĉu, pli kredinde, ĉar la klimato de tiu parto de Afriko ne estas favora por ili, nur malmultaj ĝermis; kiuj ne povis kreski ĝis sia perfekta stato.

Sed envio, kiu naskiĝas eĉ antaŭ la feliĉo de la eniĉoj, precipe en francaj kolonioj, disvastigis en la insulo famon, kiu tre maltrankviligis Paŭlon. La ŝipanoj, kiuj alportis la leteron de Virginio, certigis, ke ŝi estas edzi-niĝonta: ili nomis la kortegulon, kiu edziĝos kun ŝi; kelkaj eĉ diris, ke tio okazis kaj ke ili tion vidis. Unue Paŭlo malestimis sciigojn alportitajn de komercaj ŝipanoj, kiuj ofte disvastigas malveraĵojn en la haltlokoj. Sed ĉar multaj insulanoj, instigitaj de perfida kompatato, rapidis kondolenci lin pri tiu okazo, li komencis ĝin kredi. Cetere en kelkaj el la romanoj, kiujn li legis, li vidis, ke perfidaĵon oni konsideras kvazaŭ ŝercon; kaj ĉar li sciis, ke tiuj libroj estas preskaŭ fidela priskribo de la eŭropaj moroj, li ektimis, ke la filino de sinjorino de La Tour malvirtigiĝos kaj forgesos siajn promesojn. Liaj sciaĵoj jam faris lin malfeliĉa. Dum ses monatoj de tiu tempo multaj ŝipoj alveturis ĉi tien el Eŭropo; neniuj alportis ian sciigon pri Virginio: tio ankaŭ pliigis lian timon.

Tiu malfeliĉa junulo, agitata de ĉiuj animaj konfuzoj, ofte vizitis min, por ke mia societa sperto certigu aŭ forpelu lian maltrankvilecon.

Kiel mi diris al vi, mi loĝas je unu mejlo kaj duono de tie ĉi, sur bordo de malgranda rivereto fluanta laŭlonge de *Longa monto*. Tie mi pasigas mian vivon, sola, sen edzino, sen ido, sen sklavo.

Post tiu malofta feliĉo, — trovi bone samkarakteran edzinon, — vivi sola estas sendube la malplej mizera stato de la vivo: ĉiu homo, kiu devis multe plendi pro la homoj, serĉas izoliĝon. Eĉ estas tre rimarkinde, ke ĉiuj popoloj, malfeliĉaj pro siaj opinioj, moroj aŭ registaroj, naskis tutajn klasojn da regnantoj, dediĉitaj al soleco kaj fraŭleco. Tiaj estis la egiptoj dum sia faltempo, la grekoj de la Orienta imperio; tiaj estas nuntempe la hindoj, la ĉinoj, la unuaj grekoj, la italoj kaj plej multaj el la orientaj kaj sudaj popoloj. Soleco parte rekondukas homon al la natura feliĉo, forigante de li la societan malfeliĉon. Inter niaj societoj, disigataj de tiom da antaŭjuĝoj, la animo estas senĉese agitata; ĝi kvazaŭ ruligas en si mem multegajn maltrankvilaĵojn kaj kontraŭajn opiniojn, kiujn membroj de ambiciema kaj mizera societo volas trudi unuj al aliaj. Sed en soleco, ĝi demetas tiujn eksterajn, konfuzajn iluziojn; ĝi rekonscias pri si, pri naturo kaj ĝia kreinto. Tiel same akvo de ŝlima torento ruiniginta niajn kampojn, okaze verŝiĝas en malproksiman akvokavon, reklariĝas, kaj, hela, rebrilas sur siaj propraj bordoj la surterajn verdaĵojn kaj ĉielan lumon. Soleco restarigas bone kaj la korpojn kaj la animajn harmoni-

ojn. Inter la dezertuloj oni trovas la plej maljunajn homojn: tiaj estas la hindaj bramanoj. Fine, mi kredas, ke ĝi estas tiel necesa por la feliĉo en la mondo, ke ŝajnas al mi neeble ĝui daŭreblan plezuron de ia ajn sento aŭ reguligi sian konduton laŭ ia firma principo, se oni ne faras en si ian internan solejon, el kie tre malofte eliras nia opinio, kien neniam eniras alies penso. Mi tamen ne diros, ke homo nepre devas vivi sola: pro siaj bezonoj li estas ligita kun la tuta homaro; li do devas labori por la homoj kaj ankaŭ por la cetera naturo. Sed, ĉar Dio al ĉiu el ni donis organojn perfekte kunmetitajn kun la elementoj de la globo sur kiu ni vivas, piedojn por la tero, pulmojn por la lumo, ne ebligante interŝanĝi uzadon de tiuj sentoj, li rezervis por si, kreinto de la vivo, la koron, kiu estas la ĉefa organo.

Mi do pasigas mian vivon for de la homoj, kiujn mi volis servi kaj kiuj min turmentis. Travojaĝinte grandan parton de Eŭropo kaj kelkajn regionojn de Ameriko kaj Afriko, mi ekloĝis en ĉi tiu malmulte homohava insulo, allogita de la dolĉa temperaturo kaj de la solejoj: kabano, kiun mi konstruis en la arbaro kontraŭ arbo, malgranda kampo, kulturata de mi mem, rivereto fluanta antaŭ mia pordo, sufiĉas por miaj bezonoj kaj plezuroj. Al tiuj ĝuoj mi aldonas legadon de kelkaj bonaj libroj, kiuj min instigos al plivirtiĝo. Ili ankaŭ faras utila por mia feliĉo la mondon mem, kiun mi forlasis; ili priskri-

bas la pasiojn, kiuj faras ĝiajn loĝantojn tiel mizeraj; kaj komparante ilian sorton kun la mia, mi iel ĝuas negativan feliĉon. Kvazaŭ homo savita sur ŝtonego el ŝippe-reo, mi rigardas de mia solejo la ventegojn blovantajn en la cetera mondo. De la tempo, kiam la homoj ne aperas plu en mia vivo kaj mi en la ilia, ilin mi ne plu malamas, ilin mi priplendas. Se mi renkontas malfeliĉulon, mi penas ĝin helpi per miaj konsiloj, same kiel preteriranto sur torenta bordo proponas manon al dronanto. Sed nur simplulojn mi trovis atentaj pri mia parolo. Vane naturo vokas al si la ceterajn homojn; ĉiu el ili imagas pri ĝi, laŭ siaj propraj pasioj. Dum sia tuta vivo ili persekutas tiun erarigan fantomon kaj poste riproĉas la ĉielon pro sia propra eraro. Inter multaj malfeliĉuloj, kiujn mi kelkfoje provis rekonduki al la naturo, ĉiujn mi trovis fieraj pro siaj propraj mizeroj. Ili unue atente aŭskultis min, esperante, ke mi helpos ilin akiri famon aŭ riĉecon, sed vidante, ke mi volas nur instrui ilin pri maniero vivi sen tio ĉi, min mem ili trovis kompatinda, ĉar mi ne postkuris ilian mizeran feliĉon: ili mallaŭdis mian solecan vivon; ili certigis, ke nur ili utilas al la homoj kaj ili penis min logi en sian turniĝejon. Sed, se kun ĉiu mi komunikas, al neniu mi liveriĝas. Ofte mi estas sufiĉe instruata de mi mem. En la nuna kvieto mi rememoras pri la pasintaj maltrankvilaĵoj de mia vivo, kiujn mi kredis tiel valoraj: pri protektoj, riĉeco, famo, volupto kaj opinioj, kiuj ba-

talas unu kontraŭ alia en la tuta mondo. Mi komparas tiujn homojn kiuj pro ĥimeroj furioze interinsultas sin, kaj kiuj ne plu ekzistas, kun la ondoj de mia rivereto, kiuj ŝaŭme disrompiĝas kontraŭ la ŝtonegoj de la fluejo kaj malaperas poreterne. Pri mi, mi lasas min kviete fortirigi al la riverego de la tempo, al la senlima oceano de la estonto; kaj, laŭ la vidaĵo de la nunaj harmonioj de la naturo mi altiĝas ĝis ĝis kreinto kaj mi esperas pli feliĉan sorton en alia mondo.

Kvankam de mia arbarmeza izolejo oni ne vidas tiel multajn objektojn, kiel ni tie ĉi vidas pro la alteco de la loko, kie ni estas, tamen troviĝas tie interesaĵoj; precipe por miaspeca homo, kiu pli amas enpeniĝi internen ol eksteren disrevi. La rivero, fluanta antaŭ mia pordo, rekte pasas tra la arbaro, tiel ke ĝi prezentas longan kanalon ombratan de diversfoliaj arboj: tie estas tatamakoj, ebonlignoj, speco tie ĉi nomata pom-, oliv- kaj cinamlignoj; palmaretoj ĉi tie kaj tie starigas siajn nudajn kolumnojn, longajn je pli ol cent futoj, supre ornamatajn de palma bukedo, kaj ŝajnas super la aliaj arboj kvazaŭ arbaro plantita sur alia arbaro. Diversfoliaj lianoj kunplektiĝas de arbo al alia kaj formas ĉi tie florajn arkaĵojn, tie longajn verdaĵajn kurtenojn. Aromaj odoroj eliĝas el la plejmulto de tiuj arboj kaj iliaj odoroj tiel influas eĉ la vestojn, ke homon pasintan tra arbaro oni ĉi tie flaras du horojn post lia eliro. En la sezono, kiam ili produktas

florojn, ili ŝajnas kvazaŭ duonkovritaj de neĝo. En la fino de la somero, multspecaj fremdaj birdoj, instigataj de nekomprenebla instinkto, flugas el nekonataj regionoj, trans vastaj maroj, por rikolti la grajnojn de la ĉi tieaj vegetaĵoj, kaj ilia hela koloro kontrastas kun la arba verdeco, brunigita de la suno. Tiaj estas interalie diversaspecaj bluaj kolomboj, ĉi tie nomataj holandaj kolomboj. La simioj, loĝantoj de tiuj arbaroj, ludas sur iliaj malhelaj branĉoj, el kiuj vidiĝas ilia griza, duonverda hararo kaj tute nigra vizaĝo; kelkaj pendas ĉe la branĉoj per la vosto kaj balanciĝas en la aero; aliaj saltas de branĉo al branĉo, portante siajn idojn en la brakoj. Neniam mortiga pafilo terurigis tiujn idojn de la naturo. Oni tie aŭdas nur ĝojkriojn, nekonatajn pepadojn de kelkaj aŭstraliaj birdoj, kies voĉon malproksime ripetas la eĥoj de tiuj arbaroj. La rivero, kiu muĝe fluas sur ŝtonaĵo, tra la arboj, rebrilas ĉi tie kaj tie sur sia klara akvo iliajn respektindajn verdojn kaj ombrajn masojn kaj la ludojn de iliaj feliĉaj loĝantoj: je milo da paŝoj de tie, ĝi sin ĵetegas el diversaj ŝtonegaĵoj kaj formas ĉe ŝia falejo kristalglatan lageton, kiu, falante, ŝaŭmonde rompiĝas. Multegaj konfuzaj bruoj eliras el tiu brueganta akvo, kaj, disigitaj de la ventoj tra la arbaro, jen ili malproksimen foriĝas, jen ili samtempe alproksimiĝas kaj surdigas kvazaŭ sonoj de preĝejaj sonoriloj. La aero, senĉese renovigita de la akvomovo, provizas sur la bordo de tiu ĉi rivero, mal-

graŭ somera varmeco, verdaĵaron kaj freŝecon, kiujn oni malofte trovas sur ĉi tiu insulo, eĉ sur la supro de la montoj.

Proksime de tie staris ŝtonego, sufiĉe malproksime de la akvofalo, por ke oni ne estu surdigata de la akvobruo kaj sufiĉe proksima, por ke oni povu ĝui ĝian vidaĵon, freŝecon kaj murmuron. Dum la varmega tempo sinjorino de La Tour, Margarito, Virginio, Paŭlo kaj mi kelkfoje iris sub la ombron de tiu ŝtonego por tagmanĝi. Virginio, ĉar ŝi ĉiam faris eĉ siajn sensignifajn agojn utilaj por la aliaj, ne manĝis frukton en la kamparo sen meti en la teron la kernon aŭ grajnoj.

”El tio, ŝi diris, kreskas arboj, kiuj havigos siajn fruktojn al iu vojaĝanto aŭ almenaŭ al iu birdo.”

Iun tagon, kiam ŝi manĝis papajon sub tiu ŝtonego, ŝi plantis semojn de tiu frukto. Post malmulte da tempo tie kreskis multaj papajarboj, interalie virinseksa, tio estas portanto de fruktoj.

Tiu arbo ne estis tiel alta kiel la genuo de Virginio, kiam ŝi foriris; sed, ĉar ĝi rapide kreskas, post du jaroj ĝi estis alta je dudek futoj kaj ĝis trunko estis ĉirkaŭplektita ĉe la supra parto de multaj rangoj da maturaj fruktoj. Paŭlo, okaze pasinta en tiu loko, ĝojis vidante tiun grandan arbon produktitan de grajneto, kiun lia amikino plantis; kaj samtempe, li fariĝis malgajega, revidante tiun atestaĵon pri ŝia longa foresto. La objektoj, kiujn

ni kutime vidas, ne montras la rapidecon de la vivo; ili kun ni netakseble maljuniĝas; sed se ilin ni subite revidas, ne atentinte dum kelkaj jaroj, tiam ili nin sciigas pri la rapida fluo de la riverego de la vivo. Paŭlo estis tiel surprizita, tiel konfuzita, vidante tiun fruktoŝarĝitan papajarbon, kiel vojaĝanto post longa foresto el sia patrolando, kiam li ne retrovas plu siajn samtempulojn, kaj vidas infanojn, antaŭe mamnutritajn, kiuj fariĝis patroj. Jen li volis dehaki la papajarbon, ĉar ĝi montris tre klare la longecon de la tempo pasinta de la foriro de Virginio; jen, konsiderante ĝin kiel monumenton de ŝia bonfaremo, li ĉirkaŭprenis la trunkon kaj diris al ĝi amajn kaj bedaŭrajn vortojn. Ho, arbo, kies idaro ankoraŭ ekzistas en niaj arbaroj, mi mem vin vidis kun pli granda intereso kaj respekto ol la triumfarkojn de la romanoj! Naturo, kiu ĉiutage detruas la monumentojn de la ambicio de reĝoj, multigu en niaj arbaroj la signojn de la bonfaremo de malriĉa junulino!

Sub tiu papajarbo mi do estis certa, ke mi renkontos Paŭlon, kiam li venis en mian regionon. Iun tagon, mi trovis lin premata de melankolio kaj mi havis kun li interparolon, kiun mi tuj raportos al vi, se mi ne estas tro enuiga pro miaj longaj flankaj paroloj pardoneblaj al mia maljuneco kaj al miaj lastaj amikaĵoj. Mi ĝin rakontos al vi dialoge, por ke vi juĝu pri la natura saĝeco de tiu

junulo, vi facile distingos la interparolantojn laŭ la senco de liaj demandoj kaj de miaj respondoj. Li diris al mi:

”Mi estas tre ĉagrenita. De du jaroj kaj du monatoj fraŭlino de La Tour foriris; kaj de ok monatoj kaj duono ŝi ne sciigis nin pri si. Riĉa ŝi estas; mi estas malriĉa: ŝi forgesis min. Mi intencas enŝipiĝi; mi veturos Francujon, mi servos la reĝon, mi riĉiĝos kaj la onklino de fraŭlino de La Tour donos al mi sian nevinon kiel edzinon, kiam mi estos nobelo.”

LA MALJUNULO

Ho, amiko mia! Ĉu vi ne diris, ke vi ne estas nobelo?

PAŬLO

Tion diris mia patrino; ĉar mi, mi ne scias, kio estas nobeleco. Mi neniam rimarkis, ke mi havas malpli nobelan naskiĝon ol aliaj.

LA MALJUNULO

Via manko da nobeleco malebligas, ke vi en Francujo plenumu altrangajn oficojn; vi eĉ ne povas esti akceptata en eminentan kaston.

PAŬLO

Vi multfoje diris al mi, ke unu el la kaŭzoj de la fameco de Francujo estas la egaleco de ĉiuj regnanoj por la oficoj kaj vi citis multajn glorulojn, kiuj devenis el malalt-

rangaj metioj, sed honoris sian patrujon: ĉu vi do volis trompi mian kuraĝon?

LA MALJUNULO

Filo mia, neniam mi ĝin malincitos. Mi diris al vi la veron pri estintaj tempoj; sed la aferoj nun estas ŝanĝitaj: ĉio en Francujo fariĝis aĉetebla; ĉio estas hereda propraĵo de malmultaj familioj aŭ apartaĵo de la kastoj. La reĝo estas la suno, kiun ĉirkaŭas, kvazaŭ nuboj, nobeloj kaj kastoj; preskaŭ neeble estas, ke unu el ĝiaj radioj brilu al vi. Antaŭe, kun malpli komplika administracio, oni vidis tiajn fenomenojn. Tiam talentoj kaj meritoj ĉialoke disvolviĝis, same kiel teroj, ĵus ekkulturitaj, produktas per sia plena suko. Sed maloftaj estas grandaj reĝoj, kiuj konas kaj bone elektas la homojn. Ordinara reĝo sin lasas gvidi de la ĉirkaŭantaj altranguloj kaj kastanoj.

PAŬLO

Sed mi eble trovos iun altrangulon, kiu min protektos?

LA MALJUNULO

Por esti protektata de altranguloj, estas necese servi ilian ambicion aŭ plezuramon. Neniam vi sukcesos en tio, ĉar vi estas malnobela kaj honesta.

PAŬLO

Sed mi agos tiel kuraĝe, mi estos tiel fidela al mia promeso, tiel fervora kaj konstanta en mia amikeco, ke mi

fariĝos inda esti adoptita de iu el ili, kiel mi vidis en la antikvaj historioj, kiujn vi lasis min legi.

LA MALJUNULO

Ho, amiko mia! Ĉe la grekoj kaj ĉe la romanoj, eĉ dum ilia dekadenco, altranguloj respektis virton; sed ni havis multajn ĉiuspecajn glorulojn, devenintajn el ĉiuj popolaj rangoj, kaj mi ne konas iun el ili, kiun adoptis nobela familio. Sen niaj reĝoj, virto en Francujo estus eterne malnobela. Kiel mi diris, ili kelkfoje honoras ĝin, kiam ili ĝin ekvidas; sed nuntempe privilegioj, antaŭe rezervitaj por ĝi, estas donataj nur por mono.

PAŬLO

Pro manko de altrangulo, mi klopodos plaĉi al iu kasto. Mi tute alprenos ĝiajn spiriton kaj opiniojn; mi faros min aminda por ĝi.

LA MALJUNULO

Vi do agos kiel la ceteraj homoj; vi forlasos vian konsciencon por riĉiĝi?

PAŬLO

Ho, ne! mi ĉiam serĉos nur la veron.

LA MALJUNULO

Anstataŭ fariĝi amata, vi kredeble estos malamata. Cetero, kastoj malmulte interesiĝas pri serĉado de la vero;

ĉia opinio estas indiferenta al la ambiciuloj, se nur ili regas.

PAŬLO

Kiel malfeliĉa mi estas! Ĉio min forpelas. Mi estas kondamnita pasigi mian vivon en malfama laboro, for de Virginio! — kaj li profunde ekspiris.

LA MALJUNULO

Dio estu via sola mastro kaj la homaro via kasto. Estu ĉiam ligita al ambaŭ. Familioj, kasto, popoloj, reĝoj, havas siajn antaŭjuĝojn kaj pasiojn; ofte per malvirtoj, oni devas servi al ili; Dio kaj homaro nur virtojn postulas de ni.

Sed kial vi volas distingiĝi de la ceteraj homoj? Tio estas kontraŭnatura sento, ĉar, se ĉiu estas tia, ĉiu militus kontraŭ sia najbaro. Kontentiĝu, plenumante vian devon, en la stato al vi trudita de la Providenco; malplendu pri via sorto, kiu ebligas al vi havi propran konsciencon, kaj kiu ne devigos vin, kiel la altrangulojn, konsistigi vian feliĉon laŭ la opinio de la malaltranguloj, kaj, kiel la malaltrangulojn, rampi al la altranguloj por ricevi tion, kio estas necesa por vivi. Vi estas en lando kaj en situacio, kie por vivi vi bezonas nek trompi, nek flati, nek vin malaltigi, kiel devas fari la plej multo el tiuj, kiuj en Eŭropo celas al riĉiĝo; via stato malhelpas nenian virtan; vi povas esti senpune bona, vera, sincera, klera, pa-

ciencia, sobra, ĉasta, indulgema, piema, ne timante, ke iu ridindigo velkigu vian ankoraŭ ekflorantan saĝon. La ĉielo donis al vi liberon, sanon, bonan konsciencon kaj amikojn; la reĝoj, kies favoron vi ambicias, ne estas tiel feliĉaj.

PAŬLO

Ha! Virginio mankas al mi! Sen ŝi, nenion mi havas; kun ŝi, ĉion mi havos. Nur ŝi estas mia nobeleco, gloro kaj riĉeco. Sed ĉar fine ŝia parencino volas, ke ŝi edziniĝu kun famulo, per studado kaj libroj oni fariĝas klera kaj konata: mi tuj studos. Mi estos klerulo: mi utile servos al mia patrujo per mia klereco, malutilante al neniu, ne dependante de iu; mi fariĝos fama kaj mia gloro apartenos nur al mi.

LA MALJUNULO

Filo mia, talentoj estas ankoraŭ pli maloftaj ol nobeleco kaj riĉeco; kaj ili sendube estas pli grandaj bienoj, ĉar nenio povas ilin forrabi, ĉar ĉie ili faras nin indaj je publika estimo. Sed ili kostas multe.

Oni akiras ilin nur per ĉiaspecaj malĝuoj per treega sentemo, kiu faras nin malfeliĉaj interne kaj ekstere pro la persekutoj de niaj samtempoj. En Francujo, magistratano ne envas gloron de militisto, nek militisto la gloron de maristo; sed tie ĉiu sin okupos pri vi, ĉar ĉiu

sin opinias sprita. Vi servos al la homoj, vi diris? Sed tiu, kiu produktigas el la tero unu plian grengarbon, tiu servas pli al ili ol tiu, kiu verkas libron.

PAŬLO

Ho! la plantintino de ĉi tiu papajarbo faris por la loĝantoj de tiuj arbaroj pli utilan kaj pli dolĉan donacon ol se ŝi estus stariginta bibliotekon.

— Kaj samtempe, li ĉirkaŭprenis tiun arbon kaj ĝin fervorege kisis.

LA MALJUNULO

La plej bona el la libroj, la Evangelio, kiu predikas nur egalecon, amikecon, humanecon kaj fratecon, estis preteksto de la eŭropanaj fuziozagoj dum multaj jarcentoj.

Kiom da publikaj kaj privataj tiranoj fariĝas ankoraŭ sur la tero je ĝia nomo! Post tio, kiu povas esperi, ke li utilos al homoj per libro? Rememoru pri la sorto de la plimultaj filozofoj, kiuj predikis saĝecon. Homero, kiu ĝin montris en tiel belaj versoj, almozpetis dum sia vivo. Sokrato, kiu donis al la atenanoj tiel amindajn instruojn en siaj paroloj kaj moroj, estis venenita post juĝistara ordono. Lia altega instruito, Platono, estis sklavigita de la princo mem, kiu lin protektis; kaj antaŭ ili Pitagoro, kiu etendis humanecon ĝis al bestoj, estis vive bruligita de la krotonianoj. Kion mi diras? La plimulto el tiuj gloraj nomoj venis al ni kripligitaj de iaj karakterizaj satiroj,

ĉar la homa sendankemo volonte rekonas ilin per tio; kaj se en la amaso la gloro de kelkaj atingis nin klara kaj senmiksa, tio estas ĉar tiuj gloruloj vivis for de la tiama societo: simile al tiuj statuoj, sendifekte eltiritaj el la grekaj aŭ italaj kampoj, kiujn preterlasis barbaraj fuziozaĵoj, ĉar ili estis antaŭe enterigitaj.

Vi do vidas, ke por akiri la maltrankviligan gloron literaturan, oni devas esti altvirta kaj preta oferi sian propran vivon. Cetere, ĉu vi kredas, ke en Francujo tia gloro interesas la riĉulojn? Ili tute ne okupas sin pri literaturistoj, kies klereco havigas nek altan oficon en la patrujo, nek regadon, nek korteganecon! Oni malmulte persekutas en ĉi tiu jarcento, indiferenta pri ĉio ekster riĉeco kaj volupto; sed klereco kaj virto kondukas al nenio eminenta, ĉar ĉio en la ŝtato estas aĉetebla. Antaŭe ili estis certe rekompencataj per diversaj ekleziaj, magistrataj, administraciaj oficoj; ili hodiaŭ nur servas por verkado de libroj. Sed tiu frukto, malmulte ŝatata de la altranguloj, ĉiam estas inda de ŝsia ĉiela deveno. Per tiuj libroj oni povas aparte glorigi senbruan vivon, konsoli malfeliĉulojn, instrui naciojn kaj diri la veron; eĉ al la reĝoj. Tio sendube estas la plej nobla funkcio, per kiu la ĉielo povas honori estulon sur la tero. Kiu homo ne konsoliĝas pri la maljusteco aŭ malestimo de la altaj donantoj, kiam li pensas pri sia verko, kiu, jarcenton post jarcento kaj nacion post nacio, estos barilo kontraŭ eraroj

kaj tiraneco; kiam de la malfamo, en kiu li vivis, ŝprucos gloro, kiu forstrekos la famon de la plejmulto de la reĝoj, kies monumentoj forgesite pereas, malgraŭ la flatuloj, kiuj ilin starigas kaj laŭdas?

PAŬLO

Ha! tiun gloron mi volus nur por disŝuti super Virginion kaj fari ŝin kara al la universo. Sed vi, kiu estas tiel klera, diru al mi, ĉu ni geedziĝos. Mi volus esti klera, almenaŭ por scii pri la estonteco.

LA MALJUNULO

Kiu volus vivi, filo mia, se li konus la estontecon? Unu sola antaŭvidita malfeliĉo donas al ni tiom da vanaj maltrankviloj! Vidaĵo de certa malfeliĉo venenus ĉiujn antaŭpasontajn tagojn. Ni eĉ ne devas tro detale esplori nian ĉirkaŭaĵon; kaj la ĉielo, kiu donas al ni pripenson por antaŭvidi niajn bezonojn, donis al ni bezonojn por limigi nian pripenson.

PAŬLO

Per mono, vi diras, oni akiras en Eŭropo privilegiojn kaj honorojn. Mi veturos Bengalujon por riĉiĝi kaj poste Parizon por edziĝi kun Virginio. Mi tuj enŝipiĝos.

LA MALJUNULO

Kiel! vi forlasus ŝian patrinon kaj la vian?

PAŬLO

Vi mem konsilis, ke mi veturu al Hindujo.

LA MALJUNULO

Virginio tiam estis tie ĉi. Sed nun vi estas la sola subtenanto de via kaj de ŝia patrinoj.

PAŬLO

Virginio bonfaros al ili per sia riĉa parenfino.

LA MALJUNULO

La riĉuloj plej ofte bonfaras nur al tiuj, kiuj honoras ilin en la mondo. Ili havas parenfinojn pli kompatindajn ol sinjorino de La Tour, kiuj, pro manko de helpo, oferas sian liberecon por pano kaj pasigas sian vivon en monaĥejoj.

PAŬLO

Kia lando estas Eŭropo! Ho! Virginio nepre devas reveni tien ĉi. Vere, ĉu ŝi bezonas riĉan parenfinon? Tiel kontenta ŝi estis sub tiuj kabanetoj; tiel beleta kaj bone ornamita kun ruĝa tuko aŭ floroj ĉirkaŭ la kapo! Revenu Virginio! Forlasu viajn hotelojn, vian altrangecon. Revenu al ĉi tiuj ŝtonegoj, al la ombro de ĉi tiuj arbaroj kaj de niaj kokosarboj. Ve! vi eble nun estas malfeliĉa! ... — kaj li ekploris.

Patro, nenion kaŝu al mi: ĉar vi ne povas diri, ĉu mi edziĝos kun Virginio, almenaŭ sciigu al mi, ĉu ŝi min

ankoraŭ amas, meze de tiuj altrangaj nobeluloj, kiuj parolas al la reĝo kaj ŝin vizitas.

LA MALJUNULO

Ho, amiko! Mi estas certa, ke ŝi vin amas pro multaj kaŭzoj, sed precipe ĉar ŝi estas virta. — Aŭdante tiujn vortojn, li ĝojege saltis al mia kolo.

PAŬLO

Sed ĉu vi kredas, ke la eŭropaj virinoj estas tiel hipokritaj, kiel oni montras ilin en la libroj, kiujn vi pruntedonis al mi?

LA MALJUNULO

La virinoj estas hipokritaj en landoj, kie viroj estas tiranoj; ĉie perforto elvokas ruzon.

PAŬLO

Kiel oni povas esti tirano de la virinoj?

LA MALJUNULO

Edzinigante ilin sen konsiliĝo kun ili: junulinon kun maljunulo, sentemulinon kun indiferentulo.

PAŬLO

Kial ne geedzigi kune tiujn, kiuj konvenas unu por alia: junulojn kun junulinoj, amantojn kun amantinoj.

LA MALJUNULO

Ĉar en Francujo la plimultaj junuloj ne estas sufiĉe riĉaj por edziĝi kaj ili akiras riĉaĵojn, nur kiam ili estas maljunaj. Junaj, ili delogas la edzinojn de siaj najbaroj; maljunaj, ili ne povas fiksi la amon de siaj edzinoj. Junaj, ili trompas; maljunaj, ili estas siavice trompataj. Tio estas unu el la reagoj de la universala justeco, kiu regas super la mondo: troaĵo ĉiam egalpezas kun alia troaĵo. Tiel la plimultaj eŭropanoj pasigas sian vivon en tia duobla malordo; kaj tiu malordo pliiĝas en societo laŭ tio, ke la riĉaĵoj estas amasigataj de pli malgranda nombro da anoj. La ŝtato similas ĝardenon, en kiu arbetoj ne povas kreski, ĉar arbegoj ombrumas ilin; sed estas tiu diferenco: la beleco de ĝardeno povas esti konsekvenco de malmulteco de arbegoj, dum la prospero de ŝtato ĉiam dependas de la multeco kaj egaleco de la regatoj, kaj ne de la malmulteco de la riĉuloj.

PAŬLO

Sed kial oni bezonas esti riĉa por edziĝi?

LA MALJUNULO

Por pasigi sian vivon en plenegeco, nenion farante.

PAŬLO

Kaj kial ne labori? Mi ja laboras mem!

LA MALJUNULO

En Eŭropo manlaborado senhonorigas: oni ĝin nomas mekanika laborado. Terplugado estas la plej malŝatata el ĉiuj. Metiiston oni multe pli estimas ol kamparanon.

PAŬLO

Kiel? Laboradon, kiu nutrigas la homojn, oni malŝatas en Eŭropo! Mi ne komprenas vin.

LA MALJUNULO

Ho! Neeble estas al homo, edukita en la naturo, kompreni la societajn malpravegaĵojn. Oni havas precizan ideon pri ordo, sed ne pri malordo. Beleco, virto, feliĉo havas konturojn; ilin ne havas malbeleco, malvirto kaj malfeliĉo.

PAŬLO

La riĉuloj ja estas feliĉaj. Nenio malhelpas ilin; ili povas plezurigi siajn amatojn.

LA MALJUNULO

La plimultaj estas tedataj de ĉiuj plezuroj pro tio, ke ili kostas nenian penon: ĉu vi ne spertis, ke la plezuro de ripozo akiriĝas per antaŭa laciĝo; la plezuro de manĝo per antaŭa malsatiĝo; la plezuro de trinko per la soifo? Nu! amon kaj amiĝon oni akiras nur per multaj malĝuoj kaj oferoj. La riĉaĵoj malebligas al la riĉuloj ĝui tiajn plezurojn, ĉar ili antaŭe forigas iliajn bezonojn. Aldonu al

la enuo, sekvo de ilia sateco, la fieregecon kaŭzatan de la riĉeco kaj vundeblan de la plej malgrava malĝuo, kiam eĉ la plej grandaj ĝuoj ne flatas ĝin plu. Laodoro de multegaj rozoj plaĉas nur dum mallonga tempo; sed la doloro, kaŭzita de unu sola el iliaj dornoj, daŭras longe post la piko. Malfeliĉo en la mezo de plezuroj estas por la riĉuloj kvazaŭ domo meze de floroj. Kontraŭe, por la malriĉuloj, plezuro meze de malfeliĉoj, estas kvazaŭ floro meze de domoj: ili multe gustumas ĝian ĝuon. Jes, ĉia efiko estas pliigata de ĝia kontrasto. Naturo ĉion egalpezigis. Cetere, kiun staton vi preferas: havi preskaŭ nenion por esperi kaj ĉion por timi, aŭ havi preskaŭ nenion por timi kaj ĉion por esperi? La unua eco estas la stato de la riĉuloj kaj la dua estas la stato de la malriĉuloj. Sed tiajn ekstremaĵojn same malfacile toleras homoj, kies feliĉo konsistas en modereco kaj virto.

PAŬLO

Kion vi nomas virto?

LA MALJUNULO

Filo mia! Vi, kiu subtenas viajn parencojn per viaj laboroj, ne bezonas, ke mi ĝin klarigu al vi. Virto estas klopodo kontraŭ ni mem por aliula bono kun la intenco plaĉi nur al Dio.

PAŬLO

Ho! kiel virta estas Virginio! Pro virto ŝi volis riĉiĝi por bonfari. Pro virto ŝi forveturis de ĉi tiu insulo; tien ĉi la virto ŝin rekondukos.

La ideo pri ŝia baldaŭa reveno flamigis la imagon de tiu junulo, kaj lia tuta maltrankvileco malaperis. Virginio ne skribis, ĉar ŝi estis revenonta. En malmulte da tempo oni veturas el Eŭropo kun favora vento! Li nombris la ŝipojn, kiuj faris tiun kvarmilkvincentmejlan vojaĝon en malpli ol tri monatoj. La ŝipo, en kiu ŝi enŝipiĝis, certe faros ĝin en malpli ol du monatoj! La konstruistoj estas nuntempe tiel instruitaj kaj la maristoj tiel lertaj! Li parolis pri la aranĝoj, kiujn li faros por ŝin akcepti, pri la nova loĝejo konstruota, pri la plezuroj kaj surprizoj, kiujn li ĉiutage pretigos, kiam ŝi estos lia edzino. Lia edzino! ... Tiu ideo lin ravis. "Almenaŭ, patro mia," li diris al mi, "vi faros nenion plu, krom por via propra plezuro. Ĉar Virginio estos riĉa, ni havos multajn negrojn, kiuj laboros por ni. Vi ĉiam estos kun ni, havante neniun zorgon ol amuziĝi kaj ĝoji." Kaj ekscitita, li iris al ŝia familio por ĝin sciigi pri sia ĝojego.

En malmulte da tempo grandan timon anstataŭas granda espero. La vivaj pasioj ĉiam ĵetas la animon en la kontraŭajn ekstremojn. Ofte, la postan tagon, Paŭlo revenis por min viziti, premegata de malĝojo. Li diris:

”Virginio ne skribas. Se ŝi forirus el Eŭropo, ŝi sciigus min pri sia forveturo. Ha! la diroj pri ŝi ja estas veraj! Certe ŝia onklino ŝin edzinigis kun altranga nobelulo. La amo al riĉeco ŝin erarigis, kiel multajn aliajn. En tiuj libroj, kiuj tiel bone priskribas la virinon, virto estas nur temo por romano. Se Virginio estus virta, ŝi ne forlasus sian propran patrinon kaj min mem. Dum mi pasigas mian vivon pensante pri ŝi, ŝi forgesas min. Mi malĝojigâs, ŝi amuzigâs. Ha! tia penso min senesperigas. Al mi malplaĉas ĉia laboro; ĉia societo min tedas. Dio volu, ke estu milito en Hindujo! Mi tien irus por morti.

”Filo mia,” mi respondis, ”kuraĝo, kiu nin puŝas al morto, estas nur momenta kuraĝo. Ofte ĝin ekscitas la vanaj homaj aplaŭdoj. Sed ekzistas unu kuraĝo, pli malofta kaj pli necesa, kiu helpas nin por elporti ĉiutage, senateste kaj senlaŭde, la malfeliĉojn de la vivo: ĝi estas la pacienco. Tiu ĉi sin apogas ne sur la aliula opinio aŭ sur la puŝo de niaj pasioj, sed sur la volo de Dio. Pacienco estas la kuraĝo de la virto.”

”Ha?” li ekriis; ”mi do ne estas virta! Min ĉio preme gas kaj senesperigas.”

”Virto,” mi respondis, ”ĉiam egala, konstanta, neŝanĝebla, ne estas homa eco. Meze de tiom da pasioj, kiuj nin agitas, nia saĝo konfuziĝas kaj malklariĝas; sed ekzistas lumturoj, kie ni povas rebruligi ĝian torĉon: ĝi estas la belliteraturo.”

”Literaturo, filo mia, estas ĉiela helpo, ĝi estas kvazaŭ radioj de tiu saĝeco, kiu regas la universon; kiun homo, inspirita de la ĉielo, lernis fiksi sur la tero. Simila al sun-radio, ĝi lumigas, ĝojigas, varmigas, ĝi estas dia fajro. Kiel fajro, ĉi preparas la tutan naturon por nia uzo. Ni per ĝi kunigas ĉirkaŭ nin la lokojn, homojn kaj tempojn; ĝi rememorigas nin pri reguloj de la homa vivo; ĝi kvietigas pasiojn; ĝi haltigas malvirtojn; ĝi ekscitas virtojn per respektindaj ekzemploj de la bonuloj, kiujn ĝi famigas kaj prezentas en ĉiam honorataj figuroj; ĝi estas kvazaŭ angelo ĉiela, malsupreniranta sur la teron por ĉarmi la homajn malfeliĉojn. La famaj verkistoj, kiujn ĝi inspiras, ĉiam aperis dum la plej malfacile elportebaj tempoj, la barbaraj kaj malvirtaj tempoj. Filo mia, literaturo konsolis multajn homojn pli malfeliĉajn ol vi: Ksenofonton forpelitan de sia patrujo, en kiun li rekondukis dekmil grekojn; Scipion Afrikanan, teditan de la kalumnioj de la romanoj; Lukullon, teditan de iliaj subpostuloj; Catinat, de maldankemo de la reĝo. La grekoj tiel lerte difinis por ĉiu el la Muzoj, kiuj prezidas al literaturo, parton de nia inteligenteco por ĝin regi: ni do devas regigi de ili niajn pasiojn, por ke ili trudu al ili juĝon kaj baron. La literaturo devas plenumi, rilate al niaj animaj potencoj, samajn funkciojn kiel Horoj, kiuj jungis kaj kondukis la ĉevalojn de suno.

Legu do, filo mia. La saĝuloj, kiuj verkis antaŭ ni, estas vojaĝantoj, kiuj nin antaŭiris sur la vojon al malfeliĉo; ili prezentas al ni la manon kaj nin invitas kuniĝi al ili, kiam ĉio nin forlasis. Bona libro estas bona amiko.”

”Ha!” ekkriis Paŭlo, ”mi ne bezonis legi, kiam Virginio estis ĉi tie; ŝi ne studis pli ol mi; sed, kiam ŝi rigardis min, nomante min sia amiko, neeble estis al mi ĉagreniĝi.”

”Sendube,” mi diris, ”ne ekzistas tiel agrabla amiko kiel amantino. Plie en virino estas malserioza gajeco, kiu forigas la viran malĝojon; ŝiaj graciaĵoj malaperigas la nigrajn fantomojn de la pripenso. Sur ŝia vizago vidiĝas dolĉaj allogoj kaj konfido. Kian ĝojon ne pliigas ŝia ĝojo? Kian frunton ne sensulkigas ŝia rideto? Kian koleron ne pacigas ŝiaj larmoj? Virginio revenos pli filozofa ol vi nun estas. Tre surprizita ŝi estos, ne retrovante la ĝardonon tute rearanĝitan, ŝi, kiu songas nur pri ĝia plibeligo, malgraŭ la persekutado de ŝia parencino, for de sia patrino kaj de vi.”

La ideo pri la baldaŭa reveno de Virginio rekuraĝigis Paŭlon kaj rekondukis lin al la kampkulturaj okupoj. Feliĉa, meze de siaj ĉagrenoj, ĉar li proponis al sia laboro finon, kiu plaĉis al lia pasio.

Matenon, je la tagiĝo — tio okazis la 24-an de decembro 1744-a, — Paŭlo, leviĝante, ekvidis blankan flagon altiĝantan super la monto de la Eltrovo. Tiu flago estis signalo

pri ŝipo vidata sur la maro. Paŭlo kuris al la urbo, por ekscii, ĉu ĝi alportas informojn pri Virginio. Li tie restis ĝis la reveno de la havena piloto, kiu laŭ la kutimo enboatiĝis por ekkoni la ŝipon. Tiu homo revenis nur vespere. Li sciigis al la insulestro, ke la signalita ŝipo estas nomata *Saint-Géran*, sepcentbarela, komandata de ŝipestro nomata sinjoro Aubin; ke ĝi estas je kvar mejloj sur la plenmaro kaj albordiĝos en *Port-Louis* nur la morgaŭan tagon posttagmeze, se la vento estos favora. Tiam tute ne blovis vento.

La piloto donis al la insulestro leterojn el Francujo, alportitajn de tiu ŝipo. Unu estis skribita de Virginio por sinjorino de La Tour. Paŭlo ĝin tuj prenis, rave kisis ĝin, metis ĝin sur sian bruston kaj kuris al la loĝejo. Kiam li ekvidis de malproksime la familion, kiu sur la Ŝtonego de la adiaŭoj, atendis lian revenon, li suprenlevis la leteron, ne povante paroli; kaj ĉiuj tuj kunvenis ĉe sinjorino de La Tour por aŭdi la legadon de la letero. Virginio sciigis al ŝia patrino, ke ŝi elportis multajn malbonaĵojn de sia onklino, kiu volis ŝin edzinigi, malgraŭ ŝia volo, poste ŝin senheredigis kaj fine forpelis ŝin dum tempo, kiu ebligis alveni al *Ile-de-France* nur dum la urugana sezono; ke ŝi vane provis pacigi sian onklinon, montrante kion ŝi suldas al ŝia patrino kaj al la infanaj kutimoj; sed estis nomata malsaĝulino, kies kapon malbonigis romanoj; ke ŝi nun pensas nur pri la feliĉo revidi

kaj kisi sian karan familion, ke ŝi eĉ kontentigus tiun flaman deziron hodiaŭ mem, se la ŝipestro estus permesinta enŝipiĝi sur la boaton de la piloto, sed ke li kontraŭstaris tion pro la malproksimeco de la tero kaj la altondeco de la maro, kiu estas apude malgraŭ la kvieteco de la vento.

Apenaŭ tiu letero estis legita, la tuta familio ĝojega, ekkriis: "Virginio alvenis!" La gemastroj kaj geservistoj kisas unu la alian. Sinjorino de La Tour diris al Paŭlo: "Filo mia, iru antaŭsciigi nian najbaron pri la alveno de Virginio." Domingo tuj bruligis lignan lumingon kaj Paŭlo kaj li vojiris al mia loĝejo.

Estis ĉirkaŭ la deka horo vespere. Mi estis ĵus estinginta mian lampon kaj kuŝiĝinta, kiam mi ekvidis tra la palisaroj de mia kabano lumon en la arbaro. Poste mi aŭdis la voĉon de Paŭlo, kiu vokis min. Mi leviĝis, kaj apenaŭ mi estis vestita, Paŭlo, ekscitita kaj senspira, saltis al mia kolo, dirante: "Nu, nu, Virginio alvenis. Ni iru al la haveno; la ŝipo tie albordiĝos je la tagiĝo."

Ni tuj ekvojiris. Kiam ni trapasis la arbaron je *Longa monto* kaj jam estis sur la vojo de *Pamplemousses* al la haveno, mi aŭdis, ke iu paŝas post ni. Estis negro, kiu rapide antaŭenpaŝis. Tuj kiam li min atingis, mi demandis lin, de kie li venas kaj kien li tiel rapide iras. Li respondis: "Mi venas el la insula kvartalo nomata Orpudro; oni sendas min al la haveno por sciigi la insulestron,

ke ŝipo el Francujo ĵetis ankron ĉe la insulo Ambro; ĝi pafegas por peti helpon, ĉar la maro ja estas tre malfavora!” Tiel parolinte, tiu homo daŭrigis sian vojon, ne plu haltante.

Mi tiam diris al Paŭlo: ”Ni iru al la kvartalo Orpudro, al Virginio; ĝi estas nur je tri mejloj de tie ĉi.” Ni do ekiris al la norda parto de la insulo. La varmo estis sufoka. La luno leviĝis: ĉirkaŭ ĝi oni vidis tri grandajn nigrajn rondojn. La ĉielo estis terure malhela. Oni distingis, je la ofta lumaĵo de fulmoj, longajn striojn da dikaj, malhelaj, nealtaj nuboj, kiuj amasiĝis super la mezo de la insulo kaj rapidege venis el la maro, kvankam oni ne sentis ian venton sur la tero. Irante ni kredis, ke ni aŭdas tondron, sed aŭskultante atente, ni rekonis, ke tio estas pafego, ripetita de la eĥoj. Tiuj malproksimaj pafoj kun la vidaĵo de fulmotondra ĉielo min tremigis. Mi ne povis dubi, ke ili estas signaloj de pereanta ŝipo. Post duonhoro, ni ne aŭdis plu ian pafon; kaj tiu silento ŝajnis al ni pli teruriga ol la antaŭa funebra bruoj.

Ni rapidis, ne dirante unu vorton kaj ne kuraĝante interkomuniki niajn maltrankvilajn pensojn. Je nokto-mezo ni, tute ŝvitante, alvenis sur la marbordon en la kvartalon Orpudro. La maraj ondegaj disrompiĝis kun terurega bruoj; ili kovris la ŝtonegojn kaj la bordojn per blankega ŝaŭmo kaj fajraj eroj. Malgraŭ la mallumo ni

distingis, per tiuj fosforaj lumaĵoj, la pirogojn de la fiŝkaptistoj, tiritajn antaŭen sur la sablo.

Proksime de tie, ĉe la enirejo al arbaro, ni vidis fajron, ĉirkaŭ kiu kunvenis kelkaj insulanoj. Ni tien iris por ripozi, atendante la tagiĝon. Dum ni sidis apud tiu fajro, unu el la insulanoj rakontis al ni, ke dum la posttagmezo li vidis, sur la plenmaro ŝipon, portatan de marfluo al la insulo; ke la noktiĝo malhelpis ĝin vidi; ke du horojn post la sunsubiro li aŭdis pafegon por peti helpon; sed ke la maro estis tiel malfavora, ke oni ne povis meti ian ŝipon eksteren por veturi al ĝi; ke poste li kredis vidi ĝiajn lanternojn lumigitaj kaj, en tiu okazo li timis, ke la ŝipo, veturinta tiel proksime al la bordo, pasis inter la tero kaj insulo Ambro, konfuzante tiun ĉi kun la loko *Coin-de Mire*, preter kiu pasas la ŝipoj alveturantaj en *Port-Louis*; ke, se tio okazis, kion li ne povas certigi, tiu ŝipo estas en plej granda danĝero. Alia insulano ekparolis kaj diris, ke li multfoje trapasis la kanalon inter la insulo Ambro kaj la marrando; ke li sondis ĝin, ke la sido kaj ankrofundoj estas tre favoraj, ke la ŝipo tie estas tiel ekster la atingo de danĝero kiel en la plej bona haveno. "Mi metus tie mian tutan havaĵon kaj dormus same trankvile kiel sur la tero." Tria insulano diris, ke neeble estas al ŝipo flosi en tiun kanalon, kie apenaŭ ŝalupoj povas enveturi. Li certigis, ke li vidis ĝin ĵetantan ankron preter la insulo Ambro; tiel ke, se vento blovus en la

mateno, ĝi povus veturi aŭ al la plenmaro aŭ al la haveno. Aliaj insulanoj esprimis aliajn opiniojn.

Dum ili interdisputis, laŭ la kutimo de la senokupaj kreoloj, Paŭlo kaj mi tute silentis. Ni tie restis ĝis la tagiĝo; sed la ĉielo estis tro malhela, por ke oni povu distingian objekton sur la maro, kiu estis cetere kovrata de nebulegoj; ni nur vidis sur la plenmaro malhelan nubon; oni diris al ni, ke tio estas la insulo Ambro, situanta je kvaronmejlo de la bordo. Tra tiu malhela lumaĵo oni vidis nur la pinton de la marbordo, kie ni estis, kaj kelkajn suprojn de la mezinsulaj montoj, kiuj, de tempo al tempo, aperis inter la ĉirkaŭantaj nuboj.

Je la sepa horo matene ni aŭdis tamburadon en la arbaro: tio estis la insulestro, sinjoro de la Bourdonnais, kiu alrajdis, sekvata de taĉmento de pafilistoj kaj de multaj insulanoj kaj negroj. Li metis siajn soldatojn sur la marbordo kaj ordonis, ke ili ĉiuj samtempe pafu. Apenaŭ ili malŝarĝis, ni ekvidis sur la maro lumaĵon, preskaŭ tuj sekvitan de pafego. Ni opiniis, ke la ŝipo estas proksima kaj ni ĉiuj kuris al la flanko, kie ni vidis ĝian signalon. Ni tiam ekvidis tra la nebulo, korpon kaj velstangojn de granda ŝipo. Ni estis tiel proksime, ke malgraŭ la bruo de la ondegoj ni aŭdis la fajfilon de la manovrestro kaj la kriojn de la ŝipanoj, kiuj trifoje eldiris: "*Vivu la reĝo!*" Ĉar tio estas la krio de la francoj kaj en danĝeregoj kaj en ĝojegoj; kvazaŭ, en la danĝeroj, ili

petus helpon de sia princo, aŭ kvazaŭ ili volus montri, ke ili estas pretaj perei por li.

De la momento, kiam *Saint-Géran* ekvidis, ke ni povas ĝin helpi, ĝi ne ĉesis pafegi post ĉiu tria minuto. Sinjoro de la Bourdonnais bruligis grandajn fajrojn ie post ie sur la marbordo kaj serĉigis nutraĵojn, tabulojn, ŝnuregojn kaj malplenajn barelojn, ĉe ĉiuj najbaraj loĝantoj. Baldaŭ oni vidis multegon da ili, akompanataj de iliaj negroj, ŝarĝitaj de provizaĵoj kaj ŝnurarmiloj; ili venis el la loĝejoj de Orpudro, el la kvartalo *Flaque* kaj de la rivero Remparo. Unu el la plej maljunaj el tiuj loĝantoj proksimiĝis al la insulestro kaj diris: "Sinjoro, dum la nokto ni aŭdis mallaŭtajn bruojn sur la monto; en la arbaroj la arbofolioj senĉese moviĝas, kvankam la vento ne blovas; la marbirdoj rifuĝas al la tero: certe tiuj ĉi signoj antaŭmontras uraganon."

"Nu, amikoj miaj," respondis la insulestro, "ni estas pretaj por tio, kaj certe la ŝipo ankaŭ."

Efektive ĉio antaŭsignis baldaŭan uraganon. La nuboj, kiujn oni distingis je la zenito, estis terure nigraj en la centro kaj duonruĝaj ĉe la randoj. En la aero resonis la krioj de la mevoj, fregatoj kaj multegaj marbirdoj kiuj, malgraŭ la mallumo, alflugis el ĉiuj partoj de la horizonto por serĉi rifuĝejon sur la insulo.

Matene ĉirkaŭ la naŭa horo oni aŭdis el la maro teruregajn bruojn, kvazaŭ akvofaloj miksitaj kun tondroj

ruliĝus de la supro de la montoj; ĉiuj ekkriis: "Jen la uragano!" kaj samtempe terura turnovento forigis la nebulon, kiu kovris la insulon Ambro kaj ĝian kanalon. *Saint-Géran* tiam malkaŝiĝis kun sia homplena ferdeko, siaj velstangoj kaj bretmastoj, sia duonaltigita flago, kvar ŝnuregoj sur sia antaŭa parto kaj unu alligita sur la malantaŭa. Ankron ĝi jetis inter la insulo Ambro kaj la tero, ĉiflanke de la rifzono ĉirkaŭanta *Isle-de-France*, kaj kiun ĝi transveturis en loko, kie neniu ŝipo pasis antaŭe; ĝi prezentis al la ondegoj de la plenmaro sian antaŭan parton, kiu je ĉiu ondego enfluanta la kanalon tute leviĝis, tiel ke oni vidis ĝian kilon en la aero; sed, dum tiu movo, ĝis posta parto malaperis ĝis la kronaĵo, kvazaŭ ĝi estus subakvigita. En tiu sido, vento kaj maro ĝin ĵetis al la tero kaj neeble estis al ĝi forveturi tra la alkondukinta vojo aŭ, tranĉante la ŝnuregojn, veni al la bordo, kiun apartigas alta fundo plena de rifoj; ĉiu ondego, kiu rompiĝis kontraŭ la marbordo, muĝante antaŭensaltis ĝis la fundo de la golfetoj kaj ĵetis marŝtonojn ĝis pli ol kvindek futoj sur la teron; kaj, foriĝante, ĝi malkovris grandan parton de la bordo, kies ŝtonojn ĝi rulis kun raŭka kaj terura bruo. La maro, levata de la vento, ĉiumomente pli ŝvelis, kaj la tuta kanalo inter tiu ĉi insulo kaj la insulo Ambro estis vasta akvamaso da blanka ŝaŭmaĵo, sulkigata de profundaj ondegoj. Tiu ŝaŭmo amasiĝis en la fundon de la golfetoj je pli ol ses futoj alte kaj la ven-

to, balaante la supraĵon, portis ĝin super la bordkrutaĵon ĝis pli ol duona mejlo sur la teron. Pro la blankaj, nekalkuleblaj ŝaŭmeroj, horizontale pelataj ĝis la malsupro de la montoj, oni kredis vidi neĝon eliĝantan el la maro. Je la horizonto prezentiĝis ĉiuj signoj de daŭra ventego; la maro ŝajnis konfuzita kun la ĉielo. Senĉese diseliĝis malbelegformaj nuboj, kiuj flugrapide trapasis zeniton, dum aliaj ŝajnis senmovaj, kvazaŭ grandaj ŝtonegoj. Oni vidis nenian bluan parton de la ĉielo; nur olivkolora kaj pala lumaĵo heligis ĉiujn terajn, marajn kaj ĉielajn objektojn.

En la balanciĝoj de la ŝipo, kion oni timis, tio okazis. La ŝnuregoj de ĝia antaŭa parto rompiĝis kaj, ĉar ĝi estis jam tenata nur de unu ankreto, ĝi jetiĝis sur la ŝtonegojn, je sesklafta interspaco de la bordo. Ni ĉiuj dolorkriis. Paŭlo volis sin ĵeti en la maron, sed mi kaptis lin en la brako: "Filo mia, mi diris, ĉu vi volas pere?"

"Mi helpu al ŝi aŭ mi mortu!" li ekkriis. Ĉar la malespero forprenis de li la saĝon, por eviti lian pereon, Domingo kaj mi ligis ĉirkaŭ lia talio longan ŝnuron, kies ekstremajon ni tenis. Paŭlo tiam antaŭeniris al *Saint-Géran* jen naĝante, jen marŝante sur la rifoj. Kelkfoje li esperis atingi la ŝipon, ĉar la maro, en siaj neregulaj movoj, lasis la ŝipon preskaŭ seka, tiel ke oni povus piede ĉirkaŭmarŝi; sed poste, revenante kun nova furiozeco, ĝi kovris la ŝipon per grandegaj akvarkaĵoj, kiuj levis la tutan antaŭan kilon kaj reĵetis malproksimen sur la bordon la

malfeliĉan Paŭlon duondronintan, kun sangantaj kruroj kaj kontuzita brusto. Apenaŭ tiu junulo rekonsciiĝis, li restariĝis kaj reiris kun nova fervoro al la ŝipo, dume dispicigata de la teruregaj marskuoj.

La tuta ŝipano, tiam malesperante pri sia saviĝo, sin ĵetegis en la maron sur velstangoj, tabuloj, kokokaĝoj, tabloj kaj bareloj. Oni tiam vidis ion eterne kompatindan: juna fraŭlino aperis sur la ferdeko de *Saint-Géran*, levante la brakojn al tiu, kiu tiel klopodis por ŝin savi. Estis Virginio; ŝi rekonis sian amanton laŭ lia kuraĝego. La vido de tiu amindulino, riskanta tiel teruran danĝeron, nin plenigis je doloro kaj malespero. Virginio, kun nobla kaj sentima sinteno faris signojn, kvazaŭ por diri eternan adiaŭon. En la maron sin ĵetis ĉiuj ŝipanoj; nur unu, tute nuda kaj muskolita kiel Herakio, restis sur la ferdeko. Li respekte alproksimiĝis al Virginio: ni vidis lin genufleksanta kaj eĉ penanta forŝiri ŝiajn vestojn; sed ŝi inde forpuŝis lin kaj deturnis la kapon. Oni tuj aŭdis tiujn multajn kriojn de la vidantoj: "Savu ŝin, savu ŝin, ne forlasu ŝin!" Sed en tiu momento, kvazaŭ akvomonto terure grandega, ensaltegis inter la insulo Ambro kaj la marbordo kaj, muĝegante, antaŭenkuris al la ŝipo, kiun ĝi minacis per siaj nigraj flankoj kaj ŝaŭmantaj pintoj.

Je tiu terura vidaĵo, la ŝipano sola sin ĵetis en la maron; kaj Virginio, vidante, ke morto estas neevitebla, metis

unu manon sur sian veston kaj la alian sur sian koron, kaj, alten levante serenajn okulojn, ŝi ŝajnis kvazaŭ anĝelo forflugonta al la ĉielo.

Ho, terurega tago! ho ve! ĉio englutiĝis. La ondego renversis sur la teron parton de la rigardantoj, kiujn humaneco instigis antaŭeniri al Virginio, kaj la ŝipanon, kiu volis ŝin savi, naĝante. Tiu ĉi homo, evitinte certan morton, genufleksis sur la sablon, dirante: "Ho, Dio mia! Vi savis al mi la vivon; sed mi volonte ĝin oferus por tiu inda fraŭlino, kiu neniam volis senvestiĝi, kiel mi."

Domingo kaj mi fortiris el la ondoj la malfeliĉan Paŭlon, senkonscian, sangantan ĉe la buŝo kaj oreloj. La insulestro liveris lin al kirurgoj, kaj, niaflanke, ni serĉis sur la marbordo la korpon de Virginio: sed la vento subite aliiĝis, kiel okazas en uraganoj, kaj ni ĉagreniĝis, pensante, ke ni eĉ ne povos honori al tiu malfeliĉulino per entombigaj ceremonioj. Ni ĉiuj foriris el tiu loko, preme-gataj de konsterno, malĝojegaj pro tiu perdo, en ŝipper-eo, kie multaj mortis; la plimultaj el ni dubis pri la ekzisto de Providenco, post tiel malgajega morto de virtulino; ĉar okazas tiel teruraj kaj nemerititaj malfeliĉoj, ke eĉ la espero de saĝulo ŝanceligas.

Tamen oni metis Paŭlon rekonsciantan en najbara domo, ĝis li provis transportiĝi al sia loĝejo. Mi revenis kun Domingo por sciigi la patrinon de Virginio kaj ŝian amikino pri tiu malfeliĉega okazo. Kiam ni alvenis al la

enirejo al la valo de la rivero *Latania*, la negroj diris al ni, ke la maro reĵetas multajn ŝiprubejojn en apudan golfeton. Ni tien malsupreniris kaj la unua objekto, kiun mi vidis sur la bordo, estis la korpo de Virginio; ŝi estis duonkovrita de sablo, kun sama sinteno, kiun ni vidis, kiam ŝi pereis; ŝiaj trajtoj ne estis videble aliigitaj; ŝiaj okuloj estis fermitaj, sed sereneco ankoraŭ vidigis sur la frunto; nur pala morta violkoloro konfuziĝis sur siaj vangoj kun la ĉasteca rozkoloro. Unu el ŝiaj manoj estis sur la vestoj kaj la alia, apogita sur la koro, estis forte fermita kaj rigida. Mi pene eltiris el ĝi skatoleton; sed kiel mi surpriziĝis, kiam mi vidis, ke tio estas la portreto de Paŭlo, kiun ŝi promesis neniam forlasi dum sia vivo! Vidante tiun lastan signon de konstanteco kaj amemo de tiu malfeliĉulino, mi maldolĉe ploris. Domingo frapis al sia brusto kaj dolorkriis. Ni portis la korpon de Virginio en kabanon de fiŝkaptistoj, kie ni ĝin gardigis de malabraj mizerulinoj, kiuj ĝin zorge lavis.

Dum ili sin okupis pri tiu malgaja ofico, ni supreniris al la loĝejo. Ni tiam trovis sinjorinon de La Tour kaj Margariton preĝantajn, atendante sciigojn pri la ŝipo. Tuj kiam sinjorino de La Tour nin ekvidis, ŝi ekkriis: "Kie estas mia filino, mia karulino, mia infanino?" Ne povante dubi pri ŝia malfeliĉo, laŭ mia silento, ŝi subite premiĝis je sufoko kaj dolora korpremo; ŝia voĉo konfuziĝis

je sopiro kaj ploregoj. Margarito ekkriis: "Kie estas mia filo? mi ne vidas mian filon!" kaj ŝi svenis.

Ni kuris al ŝi; kaj ŝin malsveniginte mi certigis al ŝi, ke Paŭlo vivas kaj ke la insulestro zorgas pri li. Rekonsciiginte, ŝi sin okupis pri sia amikino, kiu de tempo al tempo longe svenis. Sinjorino de La Tour pasigis la tutan nokton en tiaj kruelaj suferoj; kaj, laŭ ilia longedaŭreco, mi juĝis, ke neniu doloro egalvaloras patrinan doloron. Kiam ŝi rekonsciigis, ŝi obstine rigardis al la ĉielo. Vane ŝia amikino kaj mi premis ŝiajn manojn en niaj, vane ni vokis al ŝi per la plej amemaj nomoj; ŝi ŝajnis nesentema pri tiuj atestaĵoj de nia malnova amikeco, kaj el ŝia premita brusto eliĝis nur mallaŭtaj ĝemoj.

En la mateno oni alportis Paŭlon kuŝanta en palankeno. Li rekonsciigis, sed ne povis eldiri unu vorton. Lia intervidiĝo kun sia patrino kaj sinjorino de La Tour, pri kiu mi unue timis, pli bone efikis ol ĉiuj miaj ĝisnunaj zorgoj. Konsola radio aperis sur la vizaĝoj de tiuj ambaŭ malfeliĉaj patrinaj. Ili ambaŭ sidiĝis apud li, premis lin en siaj brakoj, lin kisis; kaj iliaj larmoj, ĝis nun haltigitaj de troa ĉagreno, ekfluis. Paŭlo baldaŭ ankaŭ ekploris. Kiam la naturo tiamaniere kvietigis ĉi tiuj tri malfeliĉuloj, longa dormetado anstataŭis ilian konvulsian doloron kaj havigis letargian, vere mortsimilan ripozon.

Sinjoro de La Bourdonnais sekrete sciigis al mi, ke, laŭ lia ordono, la korpo de Virginio estis portita en la urbon

kaj ke de tie oni ĝin translokos en la preĝejon de *Pamplemousses*. Mi tuj malsupreniris al *Port-Louis*, kie mi trovis, ke ĉiukvartalaj loĝantoj kunvenis por ĉeesti ŝian funebbron, kvazaŭ la insulo perdis tion, kion ĝi plej amas. En la haveno la ŝipoj krucigis siajn velstangojn, duonlevigis la flagojn kaj pafegis de tempo al tempo. Grenadistoj antaŭmarŝis la irantaron. Ili mallevis siajn pafilojn: iliaj tamburoj, kovritaj per longaj krepoj, aŭdigis nur funebrajn sonojn, kaj oni vidis, premitaj de malĝojo, tiujn militistojn, kiuj tiom da fojoj estis sentime mortontaj en bataloj. Ok junulinoj, la plej nobelaj en la insulo, blanke vestitaj kaj tenantaj palmofoliojn en la mano, portis la florkovritan korpon de ilia virta kunulino. Ĥoro da infanetoj ĝin sekvis, kantante himnojn: post ili marŝis la plej altrangaj insulanoj kaj stabanoj, la insulestro, sekvata de la popolamaso.

Jen tio, kion ordonis la registaro por honori la virton de Virginio. Sed kiam ŝia korpo alvenis malsupren de tiu monto, je la vido de tiuj samaj kabanaj, kiujn ŝi faris tiel longe feliĉaj, kaj nun malgajegaj pro ŝia morto, la funebra ceremonio malordiĝis: la himnoj kaj kantoj ĉesis; en la ebenaĵo oni aŭdis nur sopirojn kaj ploregojn. Oni vidis la najbarajn junulinojn tiam alkurantajn por tuŝigi de la ĉerko de Virginio tukojn, rozariojn kaj kronojn, vokante al ŝi kvazaŭ al sanktulino. Patrinoj petis de Dio saman filinon; junuloj tiel konstantajn amantinojn; mal-

riĉuloj tiel ameman amikinon; sklavoĵoj tiel bonan mastri-non.

Kiam la ĉerko alvenis sur la tombon, madagaskaraj negrinoj kaj mozambikaj kafrinoj ĉirkaŭmetis fruktokorbojn kaj alpendigis ŝtofpecojn al la najbaraj arbaretoj, laŭ la kutimo de sia lando; bengalaj kaj malabraj hindinoj alportis kaĝojn plenajn de birdoj, kiujn ili liberigis apud ŝia korpo: tiom perdo de aminda persono interesas ĉiujn naciojn! Kaj tiel granda estas la povo de malfeliĉa virtulo, ĉar ĝi kunigas ĉiujn religianojn ĉirkaŭ sia tombo!

Oni devis starigi gardistojn apud ŝia tombo kaj forigi kelkajn junajn malriĉulinojn, kiuj obstine volis sin ĵeti internen, dirante, ke ili ne plu esperas konsolon en tiu ĉi mondo kaj ke ili devas morti kune kun sia sola bonfarintino.

Oni entombigis ŝin apud la preĝejo *Pamplemousses*, sur ĝia orienta flanko, proksime de bambuareto, kie, venante al la meso kun sia patrino kaj Margarito, ŝi ŝatis ripozi, sidante apud sia tiama frato.

Revenante el tiu funebra ceremonio, sinjoro de La Bourdonnais, sekvata de multenombra popolamaso, ĉi tien supreniris. Li proponis al sinjorino de La Tour kaj al ŝia amikino ĉiujn eblajn helpojn. En malmultaj, sed indignaj vortoj, li parolis pri ŝia malbona onklino; kaj,

alirante Paŭlon, li diris ĉion, kion li kredis taŭga por konsolo.

”Mi deziris,” li diris, ”vian feliĉon kaj la feliĉon de via familio. Dio atestas pri tio. Amiko mia, iru Francujon; mi havigos al vi militistan oficon. Dum via foresto, mi zorgos pri via patrino kvazaŭ pri la mia.” Kaj samtempe li prezentis al li sian manon; sed Paŭlo metis la sian kaj deturnis la kapon por lin ne vidi.

Mi restis en la loĝejo de miaj malfeliĉaj amikinoj por doni al ili kaj al Paŭlo ĉiujn eblajn helpaĵojn. Post tri semajnoj Paŭlo povis marŝi; sed ju pli refortiĝis lia korpo, des pli kreskis lia ĉagreno. Li estis nesentema pri ĉio; liaj rigardoj estis malvivaj kaj li nenion respondis al ĉiuj demandoj. Sinjorino de La Tour, kiu estis mortanta, diris ofte al li: ”Filo mia, kiam mi vidas vin, mi kredas vidi mian karan Virginion.”

Aŭdante tiun nomon ”Virginio” li ekstremis kaj foriris, malgraŭ la admonoj de lia patrino, kiu revokis lin al sia amikino. Sola li rifuĝis en la ĝardenon, sidiĝis sub la kokosarbo de Virginio, obstine rigardante al ŝia fonto. La kirurgo de la insulestro, kiu plej zorge flegis lin kaj la sinjorinojn, diris ke, por forigi de li la melankoliecon, ni devas fari ĉion, kio plaĉas al li, neniel kontraŭstarante; ke nur tiu rimedo povus venki lian obstinan silenton.

Mi decidis obei tiun konsilon. Tuj kiam Paŭlo sentis sin iom reforta, li foriris el la loĝejo. Ĉar mi senĉese

observis lin, mi marŝis post li, kaj diris al Domingo, ke li kunprenu nutraĵon kaj nin akompanu. Ju pli tiu junulo malsupreniris el tiu monto, des pli lia ĝojo kaj forteco ŝajnis renaskiĝi. Li unue sekvis la vojon al Pamplermousses, kaj kiam li estis apud la preĝejo, en la bambualeo, li rekte iris al loko, kie li vidis teron freŝe fositan; li tie genufleksis kaj, levante la okulojn al la ĉielo, li longe preĝis. Lia faro ŝajnis al mi bona antaŭsigno pri la reveno de lia saĝo, ĉar tiu konfido al la Supera Estulo montris, ke lia animo denove nature funkcias. Domingo kaj mi genufleksis, laŭ lia ekzemplo, kaj ni preĝis kun li. Poste li leviĝis kaj iris al la nordo de la insulo, ne tre atentante pri ni. Estante certa, ke li ne nur ne scias, en kiun lokon oni metis la korpon de Virginio, sed ke li eĉ ne scias, ĉu oni eltiris ĝin el la maro, mi demandis lin, kial li preĝis al Dio sub tiuj bambuoj; li respondis: "Ni tiel ofte tien iris!"

Li daŭrigis sian iradon ĝis la enirejo al ĉi tiu arbaro, kie nokto nin surprizis. Tie mi admonis lin, ke li sorbu iom da nutraĵo, laŭ mia ekzemplo, poste ni dormis sur herbo, sub arbo. La morgaŭan tagon, mi ekkredis, ke li decidiĝos returnen iri. Efektive, li kelkatempe rigardis sur la ebenaĵo la preĝejon *Pamplermousses* kun ĝiaj longaj bambualeoj, kaj moviĝis kvazaŭ li volis tien reiri; sed li subite ensoviĝis en la arbaron, ĉiam irante al la nordo. Mi divenis lian intencon kaj mi vane klopodis lin detur-

ni. En la tagmezo, ni alvenis en la kvartalon Orpudro. Li rapide malsupreniris sur la marbordon, al la loko, kie pereis *Saint-Géran*. Vidante la insulon Ambro kun la tiam spegulglata kanalo, li ekkriis: "Virginio! Ho, kara Virginio mia!" kaj li tuj svenis.

Domingo kaj mi portis lin en la arbaron, kie ni pene malsvenigis lin. Tuj kiam li rekonsciiĝis, li volis reiri sur la marbordon; sed mi petegis, ke li ne renovigu sian doloron kaj la mian per tiel kruelaj rememoroj, kaj ekiris aliloken. Fine, dum ok tagoj, li iris en ĉiujn lokojn, kie li trovigis kun sia infana kunulino. Li trapasis la vojeton, kiun ŝi sekvis por peti la pardonigon de la sklavino de la Nigra rivero; li poste revidis la bordojn de la rivero Trimama, kie ŝi sidiĝis, ne povante plu marŝi, kaj la arbaron, en kiu ŝi perdiĝis; ĉiuj lokoj, kiuj rememorigis lin pri maltrankviliĝoj, ludoj, manĝoj, bonfaremo de lia amatinio; la rivereto de la *Longa monto*, mia dometo, la najbara akvofalo, la papajarbo plantita de ŝi, la herbejoj, kie ŝi ŝatis kuri, la arbaraj vojkruciĝoj, kie ŝi kantis, lin unu post la alia plorigis; kaj la samaj eĥoj, kiuj tiel ofte resonadis iliajn kunajn ĝojkriojn, nun malgaje ripetis tiujn dolorajn vortojn: "Virginio! ho, kara Virginio mia!"

En tiu sovaĝa kaj amema vivo, liaj okuloj kaviĝis, lia vizaĝa koloro flaviĝis kaj lia farto pli kaj pli malboniĝis. Konvinkita, ke sento pri niaj malfeliĉoj multobliĝas per rememoro pri niaj plezuroj kaj ke la pasioj pliigis en

izoleco, mi decidis forigi mian malfeliĉan amikon el la lokoj, kiuj lin rememorigas pri la perdo de sia amatino, kaj transmeti lin en ian lokon de la insulo, kie estas multaj plezuroj. Por tio, mi kondukis lin sur la loĝatajn altaĵojn de la kvartalo *Williams*, kien li neniam iris. Terkulturado kaj komerco faris tiun parton de la insulo bruple-na kaj diversa. Tie troviĝis ĉarpentistoj, kiuj kvadratis lignaĵon kaj aliaj, kiuj ilin tabuligis, veturiloj iris kaj venis laŭlonge de la vojoj; grandaj brutaroj da bovoj kaj ĉevaloj sin pastiĝis sur vastaj herbejoj, kaj la kamparo estis kovrita de diversaj loĝejoj. La teralteco ebligis en multaj lokoj kulturadon de diversaspecaj vegetaĵoj el Eŭropo. Oni vidis ĉi tie kaj tie grenrikoltojn sur ebenaĵo, fragarojn en arbaraj maldensejoj kaj rozajn plektobari-
lojn laŭlonge de la stratoj. La aerfreŝeco, streĉante la nervojn, estis eĉ favora por la sano de la blankuloj. De tiuj altaĵoj, situantaj meze de la insulo kaj ĉirkaŭataj de grandaj arbaroj, oni vidis nek la maron nek *Port-Louis* nek la preĝejon *Pamplemousses* nek ion, kio povus rememorigi Paŭlon pri Virginio. Eĉ la montoj, kiuj prezentas diversajn ĉenerojn ĉe la flanko de *Port-Louis*, estas, ĉe la flanko de la *Williams*-aj ebenaĵoj, rekta kaj perpendikula promontoro, el kie altiĝas multaj longaj ŝtonpiramidoj, ĉirkaŭ kiuj kuniĝas la nuboj.

Sur tiujn ebenaĵojn mi do kondukis Paŭlon. Mi senĉese lin agadigis, marŝante kun li sune kaj pluve, tage kaj nokte, vagante tra arbaroj, displugitaj kampoj, por distri lian spiriton per korpa laceco kaj okupi lin per la nesio pri la loko kaj perdita vojo. Sed animo de amanto ĉie retrovas postsignojn de la amatino. Nokto kaj tago, kvieteco de solejoj kaj bruo de loĝejoj, eĉ tempo, kiu forprenas tiom da rememoroj, nenio povis lin distri. Same kiel magneta montrilo tuŝita, se oni ĝin agitas, turniĝas al la altiranta poluso, kiam ĝi restaras, tiel, kiam mi demandis al Paŭlo, perdita meze de la *Williams*-aj ebenaĵoj; "Kien ni nun iru?" li turnis sin al la nordo kaj diris: "Jen niaj montoj, ni reiru al ili."

Mi ja komprenis, ke ĉiuj miaj rimedoj por lin distri estas senutilaj kaj ke mi devas ataki lian propran pasion, uzante por tio ĉiujn fortojn de mia malforta saĝo. Mi do respondis: "Jes, jen la montoj, en kiuj loĝis via kara Virginio kaj jen la portreto, kiun vi donis al ŝi; mortante ŝi portis ĝin sur sia koro, kies lastaj batoj estis por vi."

Mi tiam prezentis al Paŭlo la portreton, kiun li donis al Virginio, ĉe la rando de la fonto sub la kokosarboj. Je tiu vidaĵo, pereiga ĝojo ekflamis en liaj okuloj. Li avida kaptis per siaj malfortaj manoj tiun portreton, kiun li metis sur sian buŝon. Lia bruste tiam premiĝis kaj en liaj duonsangantaj okuloj ploroj haltis, ne fluante.

Mi diris: "Filo mia, aŭskultu min, kiu estas via amiko; kiu estis amiko de Virginio; kiu, meze de viaj esperoj, ofte penis fortigi vian saĝon kontraŭ la neantaŭvideblaj okazoj de la vivo. Kion vi tiel maldolĉe bedaŭras? Ĉu vian malfeliĉon? Ĉu la malfeliĉon de Virginio?"

Vian malfeliĉon? Jes, sendube ĝi estas granda. Vi perdis la plej amindan fraŭlinon, kiu estus estinta la plej inda edzino; ŝi oferis sian interesaĵon por via, kaj vin preferis ol la riĉecon, kiel solan indan rekompenco de ŝia virto. Sed ĉu vi scias ĉu la amatino, de kiu vi atendis tiel puran feliĉon, ne estus estinta por vi kaŭzo de multegaj penoj? Senbiena kaj senhereda ŝi estis; vi de tiam estus devinta dividi kun ŝi vian solan laboradon. Reve-ninta pli delikata pro sia edukiteco kaj pli kuraĝa pro sia malfeliĉo mem, ŝi ĉiutage estus pli lacegiĝinta, penante labori kun vi. Kiam ŝi estus naskinta idojn, ŝiaj kaj viaj pripensoj estus pliiĝintaj pro la malfacileco subteni, sola kun vi, la maljunajn patrinojn kaj naskiĝantan familion.

Vi diros: la insulestro estus al ni helpinta. Sed ĉu vi scias, ĉu vi havos ofte estrojn, similaj al sinjoro de La Bourdonnais, en insulo, kiu tiel ofte ŝangas registon? Ĉu ne venos senmoralaj kaj senvirtaj estroj? Ĉu, por havi ian mizeran helpaĵon, via edzino ne estus devinta amindumi? Aŭ ŝi estus estinta malforta kaj vi estus plendinda; aŭ ŝi estus saĝa kaj vi restus malfeliĉa: feliĉa se, pro ŝia

beleco kaj virto, vi ne estus persekutita de viaj esperitoj protektontaj!

Mi havus ankaŭ, vi diros, feliĉon, sendependan de riĉeco, protekti la amatinon, kiu alligiĝas al ni laŭ sia malforto mem; sin konsoli per miaj propraj maltrankviloj; ŝin ĝojigi per mia malgajeco kaj pliigi mian amon per niaj reciprokaj ĉagrenoj. Sendube, virto kaj amo ĝuas siajn maldolĉajn plezurojn. Sed ŝi ne estas plu kaj restas tio, kion al plej amis ekster vi, ŝia patrino kaj la via, kiujn via nekonsolebla doloro entombigos. Helpu ilin kaj, kiel por ŝi, tio estos via feliĉo. Filo mia, bonfarado estas feliĉo de virto; ne estas sur la tero alia pli certa, nek pli granda. Projektoj pri plezuro, ripozo, ĝojego, plenegeco, gloro ne konvenas por la homo, malforta, vaganta kaj pasanta. Vidu, kiel paso al riĉeco vin ĉiujn enkondukis de malfeliĉo en malfeliĉon. Vi ja vere kontraŭstaris; sed kiu ne estus kredinta, ke la vojaĝon de Virginio ne finos ŝia kaj via feliĉo? Invitoj de riĉa kaj maljuna parencino, konsiloj de saĝa insulestro, aplaŭdoj de kolonio, admonoj kaj aŭtoritato de pastro decidis la malfeliĉon de Virginio. Ni tiel kuras al nia perdiĝo, trompitaĵoj de la prudento mem de niaj regantoj. Pli bone estus sendube ne kredi al ili, nek fidi al la voĉo kaj espero de trompa mondo. Sed fine, inter tiom da homoj okupataj sur ĉi tiuj ebenaĵoj, inter tiom da homoj, kiuj iras Hindujon por riĉiĝi, aŭ hejme ĝuas ripoze en Eŭropo la laborojn

de la unuaj, ĉiu el ili iam perdos, kion ĝi plej amas: famecon, riĉecon, edzinon, idon, amikon. La pli multaj aldonos al sia perdaĵo rememoron pri sia propra senprudentaĵo. Enpensigante, vi neniel povas vin riproĉi. Vi estis fidela je via fido; dum juneco vi havis la prudenton de saĝulo, ĉar vi ne forigis de la naturo. Viaj projektoj estis rajtaj, ĉar ili estis puraj, simplaj, malprofitemaj kaj ĉar vi havis sur Virginio sanktajn rajtojn, neniel kontraŭstareblajn de ia ajn riĉeco. Vi perdis ŝin, nek pro via senprudento, nek via avareco, nek via malvera saĝeco, sed pro Dio mem, kiu uzis aliulajn pensojn por forpreni de vi la amatinon; Dio, de kiu vi ĉion havas, kiu vidas ĉion konvenan por vi kaj kies saĝeco allasas nenian pretekston por pento kaj malespero, kiuj venas post la malfeliĉoj kiujn ni mem kaŭzis.

Jen estas tio, kion vi povas diri en via malfeliĉo: tion mi ne meritis. Nu, ĉu la malfeliĉon de Virginio, ŝian finiĝon, ŝian nunan staton vi bedaŭras? La sorton rezervitan al nobeleco, beleco kaj imperioj mem ŝi suferis. Homa vivo kun ĉiuj siaj projektoj staras kvazaŭ tureto, kies morto estas kronaĵo. Naskiĝante, ŝi estis difinita por morto. Feliĉa ŝi estis, ke ŝi malligis la ligilojn de la vivo pli frue ol ŝia patrino, ol la via, ol vi, tio estas, ke ŝi ne mortis la lasta el ĉiuj.

Morto, filo mia, estas bono por ĉiuj homoj; ĝi estas la nokto de tiu malkvieta tago nomata *la vivo*. En morta

dormo ripozas poreterne malsanoj, doloroj, ĉagrenoj, timoj, kiuj senĉese agitas la malfeliĉajn vivantojn. Ekzameniu la ŝajne plej feliĉajn homojn; vi vidas, ke sian falsan feliĉon ili tre kare akiris: publikan estimon per hejmaj malfeliĉoj; riĉecon per malsaniĝo, la tiel maloftan plezuron de la amo per senĉesaj oferoj: kaj ofte, je la fino de vivo oferita al aliula profito, ili vidas ĉirkaŭ si nur malverajn amikojn kaj sendankajn parencojn. Sed Virginio estis feliĉa ĝis la lasta momento. Tia ŝi estis kun ni per la naturo, for de ni per la virto; kaj eĉ en la terura momento, kiam ŝi pereis, ŝi estis ankoraŭ feliĉa; ĉar, ĉu rigardante la tutan kolonion, kiun ĉagrenegas ŝia perdo, ĉu vin, kiu tiel kuraĝe kuris al ŝia helpo, ŝi vidis, kiel ŝi estas kara al ĉiuj; ŝi fortiĝis kontraŭ la estonto per la rememoro pri sia senkulpa vivo; ŝi tiam ricevis la premion, rezervitan de la ĉielo al la virto: superan kuraĝon en danĝero. Al la morto ŝi prezentis serenon vizaĝon.

Filo mia, Dio elportigas de la virtulo ĉiujn okazojn de la vivo por montri, ke ĝi sola povas ilin uzi kaj el tio trovi feliĉon kaj gloron. Kiam Li rezervas famon, Li altigas ĝin sur altan teatron, ĝin bataligas kun morto; tiam ĝia kuraĝo utilas por ekzemplo kaj la rememoron pri ĝiaj malfeliĉoj ploras poreterne la posteuloj. Jen la senmorta monumento rezervita al ĝi sur la tero, kie ĉio pasas, kie eĉ rememoro pri la plimultaj reĝoj baldaŭ forgesiĝas poreterne.

Sed Virginio ekzistas ankoraŭ. Filo mia, vidu ke ĉio sur la tero aliiĝas, kaj tamen nenio perdiĝas. Neniu homa arto povos neigi la plej etan materieron; kaj kio estis saĝa, sentema, amanta, virta, religia, tio pereus, kiam korpaj elementoj estas nedetruiblaj! Ha! se Virginio estis feliĉa kun ni, ŝi nun estas feliĉa pli multe. Dio ekzistas, filo mia; la tuta naturo tion montras; tion mi ne bezonas pruvi. Nur la malboneco de la homoj neigas justecon, kiun ili timas. Sento pri Li estas en via koro kaj en Liaj verkoj antaŭ vi. Nu, ĉu vi kredas, ke Li lasos Virginion senrenkompece? Ĉu vi kredas, ke la sama Potenco, kiu enigis tiel noblan animon en tiel belan formon, en kiu vi sentis dian arton, ne povus sin savi el la maro? Ke tiu, kiu aranĝis la nunan homan feliĉon per nekonataj leĝoj, tiu ne povos prepari alian al Virginio per same nekonataj leĝoj? Kiam ni estis en nenieco, se ni estus povintaj pensi, ĉu ni povus havi ideon pri nia ekzisteco? Kaj nuntempe, kiam ni estas en tiu malluma, forfluganta ekzisto, ĉu ni povas antaŭvidi trans la morto, kio ni fariĝos poste? Kiel teatron de sia inteligento kaj boneco, ĉu Dio bezonas, kiel homo, nian malgrandan terglobon, kaj ĉu Li povis disvastigi la homan vivon nur en la kampoj de la morto? En la oceano ne estas akvoguto, kiu ne estas plena de vivantaj estaĵoj, rilatantaj kun ni; kaj nenio por ni ekzistus inter tiom da astroj, rulantaj super niaj kapoj! Kiel! Supera inteligento kaj dia bo-

neco ekzistus ĝuste nur kie ni estas! Kaj en tiuj radiantaj kaj sennombraj globoj, en tiuj senfinaj ĉirkaŭaj lumkampoj, neniam malheligitaj de fulmotondroj kaj noktoj, estus nur vana spaco kaj eterna nenieco! Se ni, kiuj nenion donis al ni, kuraĝus starigi limojn al la potenco de Tiu, de kiu ni ĉion ricevis, ni povus kredi, ke ni estas tie sur la limoj de Lia imperio, kie vivo batalas kun morto, kaj senkulpeco kun tiraneco!

Sendube virto ie ricevas rekompencan. Virginio nun estas feliĉa. Ha! Se el la anĝelejo ŝi povus komuniki kun vi, ŝi dirus kiel en siaj adiaŭoj: Ho, Paŭlo! vivo nur estas elproviĝo. Mi estis trovata fidela al la leĝoj de la naturo, amo kaj virto. Mi traveturis la marojn por obei miajn parencojn; mi forlasis riĉecon por konservi mian fidon kaj mi pli amis perdi vivon ol malrespekti la ĉastemon. La ĉielo trovis mian vivon sufiĉe plena. Mi foriĝis poreterne el malriĉeco, kalumnio, agiteco, vidaĵo de la aliaj doloroj. Neniu el la malfeliĉoj, kiuj timigas al la homoj, de nun povas min atingi; kaj vi kompatas al mi! Mi estas tiel pura kaj nedifektebla kiel lumero; kaj vi min revokas al la nokto de la vivo! Ho, Paŭlo! ho, amiko mia! Rememoru pri tiuj feliĉaj tagoj, kiam de la mateno ni ĝuis la volupton de la ĉielo, leviĝante kun la suno sur la pintoj de tiuj ŝtonegoj kaj disiĝanta kun ĝiaj radioj en niajn arbarojn. Ni sentis ravadon, kies kaŭzon ni ne povis kompreni. En niaj senkulpaj deziroj ni volis ĉion

vidi por ĝui la riĉajn kolorojn de la matenruĝo; flari la odoron de niaj plantoj; aŭdi la kantadon de niaj birdoj; korsenti tiujn bonfarojn. Nun ĉe la fonto de la beleco, el kie venas ĉio, kio estas agrabla sur tero, mia animo vidas, gustumas, aŭdas, tuŝas senpere tion, kion ĝi antaŭe sentis per malakraj organoj. Ha! kiu lingvo povus priskribi tiujn senlimaĵojn, kiujn mi eterne loĝas? Kion senfina potenco kaj ĉiela boneco povis krei por konsoli malfeliĉulon; kion amikeco de multegaj estuloj, ĝojigitaj pro sama ĝojo, povas harmoniigi en komunaj entuziasmoj, ĉion ĉi ni senmikse sentas. Elportu do vian ricevitan elproviĝon, por pliigi la feliĉon de via Virginio per senfinaj amoj, per neestingebla edzeco. Tie mi pacigos viajn bedaŭrojn; tie mi viŝos viajn larmojn. Ho, amiko mia! juna edzo mia! Altigu vian animon al la senfino por elporti momentajn ĉagrenojn.”

Mia propra kortuŝiĝo finis mian paroladon. Paŭlo, obstine rigardante al mi, ekkriis: ”Ŝi ne estas plu! Ŝi ne estas plu!” Kaj longa senkonscio sekvis tiujn dolorajn parolojn.

Poste, rekonsciante, li diris: ”Ĉar morto estas bono, ĉar Virginio estas feliĉa, mi ankaŭ volas morti por kuniĝi al Virginio.” Tiel miaj konsolaj pravigoj nur utilis por pliigi lian malesperon. Mi estis kvazaŭ homo volanta savi sian amikon, kiu dronas en la mezo de riverego kaj ne volas naĝi. Doloro lin superpremis. Ho ve! malfeliĉoj

dum juneco preparas homon por la vivo, kaj ilin neniam estis elportinta Paŭlo.

Mi rekondukis lin al lia loĝejo. Mi trovis lian patrinon kaj sinjorinon de La Tour en pli granda konsumiĝo. Margarito estis la plej premegata. La vivaj karakteroj, kiujn ne atingas malgravaj malfeliĉoj, malplej bone kontraŭstaras al la gravaj ĉagrenoj. Al mi ŝi diris: "Ho, bona najbaro mia, al mi ŝajnis ĉi nokte, ke mi vidas Virginion, blanke vestitan, meze de laŭboj kaj ravaj ĝardenoj; al mi ŝi diris: Mi ĝuas enviindan feliĉon. Poste, ŝi, ridetante, alproksimiĝis al Paŭlo kaj forprenis lin kune kun si. Penante deteni mian filon, mi sentis, ke mi lin sekvas kun neesprimebla feliĉo. Tiam mi volis adiaŭi al mia amikino; mi subite vidis ŝin, kiu postvenas kun Paŭlo kaj Domingo. Sed ion mi trovas ankoraŭ pli stranga: sinjorino de La Tour havis, tiun saman nokton, sonĝon akompanatan de samaj cirkonstancoj."

Mi respondis: "Amikino mia, mi kredas, ke nenio en la mondo okazas sen permeso de Dio. Sonĝoj kelkfoje antaŭmontras veron."

Sinjorino de La Tour rakontis al mi tute similan sonĝon, okazintan dum tiu sama nokto. Mi neniam rimarkis, ke tiuj sinjorinoj estas iel superstiĉemaj; mi do tre miris pri la konformeco de iliaj sonĝoj kaj mi ne dubis, ke ĝi efek-

tiviĝos. Opinio pri montrado de la vero dum nia dormeto estas kutima ĉe ĉiuj popoloj en la mondo. La plej famaj antikvuloj kredis je tio; interalie Aleksandro, Cesaro, Scipio, ambaŭ Katonoj kaj Brutuso, kiuj ne estis kredemuloj. La Malnova kaj Nova Testamento prezentas multajn ekzemplojn de sonĝoj, poste efektivigintaj. Pri tio mi bezonas nur mian propran sperton; kaj mi multfoje sentis, ke sonĝoj estas avertoj al ni donataj de ia inteligento, kiu interesiĝas pri ni. Neeble estas, ke oni kontraŭparolu aŭ defendu per rezonado tiel superhomajn aferojn. Tamen, se la homa saĝo estas nur figuro de la Dia, ĉar plenaĝulo povas konigi siajn intencojn ĝis mondlimo per sekretaj kaj kaŝitaj rimedoj, kial univerversa inteligento ne uzus similajn rimedojn por sama celo? Amiko konsolas sian amikon per letero, kiu trapas multegajn landojn, rondiras meze de naciaj malamoj, kaj alportas ĝojon kaj esperon al unu sola homo; kial la supera Protektanto de la senkulpeco ne povas helpi, per ia sekreta vojo, al virta animo, kiu konfidas al ĝi sola? Ĉu Li bezonas ian eksteran signon por efektivigi sian volon, tiu, kiu senĉese agas en ĉiuj siaj verkoj per interna laborado. Kial dubi pri songoj? Ĉu la vivo, plena de tiom da pasantaj kaj vanaj projektoj, ne estas sonĝo?

Kio ajn estas, la sonĝo de miaj malfeliĉaj amikinoj baldaŭ efektiviĝis. Paŭlo mortis du monatojn post la morto de sia kara Virginio, kies nomon li senĉese elparolis. Margarito kun ĝojo ebligita nur de virto, vidis ke la morto alproksimiĝas al ŝi, ok tagojn post la morto de ŝia filo. La plej amajn adiaŭojn al sinjorino de La Tour ŝi diris, "esperante dolĉan kaj eternan kuniĝon. Morto estas la plej granda bono," ŝi aldonis, "oni devas ĝin deziri. Se vivo estas puno, oni devas deziri la finon; se ĝi estas elproviĝo, oni devas ĝin peti mallonga."

La registaro zorgis pri Domingo kaj Mario, kiuj ne povis plu servi kaj ne postvivis longe siajn mastrinojn.

La malfeliĉa hundo Fidela mortis de konsumigo proksimume en la sama tempo, kiel ĝia mastro.

Mi kondukis al mia hejmo sinjorinon de La Tour, kiu elportis tiel grandajn perdojn kun nekredebla grandanimeco. Paŭlon kaj Margariton ŝi konsolis ĝis lasta momento, kvazaŭ ŝi elportus nur ilian malfeliĉon. Kiam ŝi ne vidis ilin plu, ĉiutage ŝi parolis al mi kvazaŭ pri karaj najbaraj amikoj. Tamen ŝi postvivis ilin nur unu monaton.

Anstataŭ riproĉi sian onklinon pro siaj malfeliĉoj, ŝi preĝis al Dio, ke Li pardonu ŝin kaj ke Li pacigu la terurajn spiritkonfuzojn, kiuj ŝin atakis, tuj post kiam ŝi tiel malhumane forpelis Virginion.

Tiu malsaĝa parencino baldaŭ ricevis punon pro sia malbonkoreco. Mi eksciis de alveturantaj ŝipoj, ke ŝi estas agitata de malsanoj, kiuj faris ŝian vivon kaj morton same netolereblaj. Jen ŝi riproĉis sin pro la frumaturo finiĝo de ŝia ĉarma nevino kaj la sekvinta perdo de ŝia patrino; jen ŝi laŭdis sin, ke ŝi forpeligis du mizerulinojn, kiuj, ŝi diris, senhonorigis sian familion per siaj malnoblaj inklinoj. Kelkfoje, koleranta pro la multegaj mizeruloj, kiuj plenigis Parizon, ŝi ekkriis: "Kial oni ne forperegigas tiujn sentaŭgulojn en la koloniojn?" Kaj ŝi aldonis, ke humanaj, virtaj, religiaj ideoj, alprenitaj de ĉiuj popoloj, estas nur elpenaĵoj de la politiko de iliaj regnestroj. Kaj, sin ĵetante subite en kontraŭan ekstremon, ŝi liverigis al superstiĉaj teruroj, kiuj timegigis ŝin. Grandegan almozaĵon ŝi alportis al riĉaj monaĥoj, kiuj ŝin regis, petegante, ke ili pacigu Dion per la ofero de ŝia riĉeco: kvaŝaŭ bienoj rifuzitaj al malfeliĉuloj povus plaĉi al la Patro de la homoj! Ofte ŝia imago prezentis brulantajn kampojn, flamajn montojn aŭ malbelegajn fantomojn, kiuj vagis, vokante al ŝi per grandaj krioj; ŝi genufleksis antaŭ siaj konsilistoj kaj imagis kontraŭ si mem punegojn kaj turmentegojn, — ĉar la ĉielo, la justa ĉielo, sendas al kruelanimuloj teruregajn religiojn.

Tiel ŝi pasigis multajn jarojn laŭvice ateista kaj superstiĉa, same abomenante morton kaj vivon. Sed la sama

kaŭzo pro kiu ŝi oferis naturajn sentojn, finis tiel malbonan vivon.

Vidante, ke ŝiajn riĉaĵojn poste heredos malamataj parencoj, ŝi ĉagreniĝis; ŝi do provis vendi la pli bonajn partojn el ili; sed la heredontoj, profitantaj ŝian malsaniĝon, malliberigis ŝin kiel frenezulinon kaj administris ŝiajn bienojn. Tiel ŝiaj riĉaĵoj mem ŝin finigis; kaj, same kiel ili faris malbona la koron de tiu, kiu posedis ilin, tiel same ili malsaĝigis tiujn, kiuj ilin deziris. Do, ŝi mortis, kio estas plej malfeliĉega, sufiĉe konscia por scii, ke ŝi estis senigita kaj malŝatata de la samaj personoj, kies opinio regis ŝin dum ŝia tuta vivo.

Oni metis apud Virginio, sub la samajn kanojn, ŝian amikon Paŭlon kaj ĉirkaŭe iliajn amemajn patrinojn kaj fidelajn geservistojn. Oni ne starigis marmoraĵon super ilia humila altaĵeto, nek gravuris enskribon pri iliaj virtoj; sed rememoro pri ili restas neforigebla en la koro de iliaj ŝuldantoj. Iliaj ombroj ne bezonas famon, pri kiu ili ne zorgis dum sia vivo; sed se ili ankoraŭ interesiĝas pri tio, kio okazas sur la tero, sendube ili ŝatas vagi en pajlotegmentaj dometoj, loĝataj de laboremaj virtuloj; konsoli malriĉulojn malkontentajn pri sia sorto; eksciti ĉe junaj geamantoj daŭreblan pasion, guston al naturaj bienoj, amon al laboro kaj timon al riĉeco.

La popola voĉo, kiu silentas pri monumentoj starigitaj por la gloro de reĝoj, donis al kelkaj partoj de tiu insulo nomojn, kiuj eterne rememorigos pri la perdo de Virginio. Oni vidas apud la insulo Ambro, meze de la rifoj, lokon nomata *Pasejo de Saint-Géran*, laŭ la nomo de la ŝipo, kiu tie pereis, rekondukante Virginion el Eŭropo.

La rando de tiu longa promontoro, kiun ni vidas je tri mejloj, duonkovrata de marondegoj, kiun *Saint-Géran* ne povis preterpasi la tagon antaŭ la uragano por eniri la havenon, estas nomata *Promontoro malfeliĉa*: kaj jen estas antaŭ ni, ĉe la rando de tiu valetto, la golfo *Tombo*, kie oni trovis Virginion en la sablo, kvazaŭ la maro volis reporti ŝian korpon al ŝia familio kaj laste honoru al ŝia ĉastemo sur la samaj bordoj, honorigitaj de ŝia senkulpeco.

Gejunuloj tiel ame kunigitaj! malfeliĉaj patrinoj! kara familio! tiuj arbaroj, kiuj vin ombris, tiuj fontoj, kiuj fluis por vi, tiuj montetoj kie vi ripozis, ankoraŭ ploras pro via perdo.

Neniu, post vi, kuraĝis kulturi tiun dezertan teron, nek restarigi tiujn humilajn kabanojn. Sovaĝiĝis viaj kaprinoj; detruigiĝis viaj kampoj; forflugis viaj birdoj; oni nur aŭdas la kriojn de nizoj, rondeflugantaj super tiu ŝtonaĵo.

De la tempo kiam mi ne vidis vin plu, mi estas kvazaŭ amiko, kiu ne plu havas amikon, kvazaŭ patro, kiu perdis siajn infanojn; kvazaŭ vojaĝanto, vaganta sur tero, kie mi sola restas.

Dirante tiujn vortojn la bona maljunulo foriris, ellasante larmojn, kaj miaj ploroj multfoje fluis dum tiu malgaja rakonto.

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-180-1